

IL POPOLO CINIO

中國報道

4 1987





La Pekina Stacidomo en nokto

Foto de MA HONGGONG

Pasaĝeroj, kiuj ĵus elvagiĝis



TRA NIA LENSŌ

En la Pekina Stacidomo

Fotoj de ŜEN ĈEN

La Pekina Stacidomo ferveje interligiĝas kun diversaj partoj de la ĉina ĉeftero. Ĉiutage ĝi akceptas ĉ. 160 000 pasaĝerojn kaj pli multe dum festotagoj. Tagnokte ĉie sur ĝia placo kaj en ĝiaj salonoj estas homfluo. La pasaĝeroj en malsamaj vestoj kaj kun malsamaj moroj parolas malsamajn dialektojn. Tie videblas, ke parencoj kaj amikoj adiaŭas sin reciproke kun bedaŭro aŭ ĝojas pro refoja renkontiĝo, kaj ke fremduloj helpas unu al alia. Ĉio ĉi montras nur parton de la vivo de ordinaraj ĉinoj.



Novgeedzoj venintaj en Pekinon por pasigi mielan tempon



Handikapulo prizorgata

Sur la placo de la stacidomo





En atendejo

Antaŭ la stacidomo

Bonan vojaĝon!



Enhavo

Seninundaj 40 jaroj de la Flava Rivero	2
Ŝjuĝoŭ hieraŭ kaj hodiaŭ	6
VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (4): Loĝantoj sur la altebenaĵo	65
JUBILEA JARO DE ESPERANTO:	
Nova etapo, nova strebado	13
100 jaroj de literaturo en Esperanto	15
1859	18
Miaj impresoj pri la 71-a UK en Ĉinio	20
SUR NIA LIBROBRETO: Kun malnovspicaj metaforoj	45
POR KOMENCANTOJ: Urso ellaboras mielon; Lernema alaŭdo	56
ESP-NOVAĴOJ	22
Ora brilo	28
Oazo en dezerta tropika zono (Kolora bildoserio)	57
Neĝa animo (Novelo)	37
ĈINA LITERATURO:	
La <i>fu</i> -o de Han-dinastio	40
El la Han-dinastia <i>fu</i> -o: Sep aferoj edifaj (Fragmento)	43
Rakontaj filmoj de Ĉinio en nova provado	46
ĈINAJ ARTOJ: Papertondaĵoj	32
Junaj vartistinoj en Pekino	30
Antikva dongba-a kulturo	49
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Loĝlokoj de ĉinaj paleoantropoj	24
ĈINAJ POSTMARKOJ: Poŝtmarkoj pri antikvaj ĉinaj sciencistoj (Kolora bildoserio)	60
POR VIA SANO: Ok sanigaj ekzercoj (VIII)	27
Hirundoj revenis	52
Malseka lando — vindotuko de ekologia ekvilibro	53
AMUZO	54
KURANTAJ AFEROJ	61
INTER NI: Traduko kaj reaperigo de niaj artikoloj estas bonvenaj	55
KORESPONDI DEZIRAS	17 26
SUR LA KOVRILO: Kun fontakvo en profunda valo (Ĝenro pri Ĝino-nacieco)	de ŜA GENGŜI
TRA NIA LENSŬ: En la Pekina Stacidomo	Fotoj de ŜEN ĈEN

JARABONTARIFO		Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00	
Aŭstralio	\$A	14.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	13.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugalio	Esc	1100			
Por aliaj landoj en Eŭropo:		£	8.00	US\$	10.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US\$ 6.50					

Seninundaj 40 jaroj de la Flava Rivero

La Flava Rivero ricevis la nomon pro sia flava akvo kaj estas konata pro sia grandega malutiligo, sed kiel civilizacia lulilo de la ĉina nacio ĝi estas alte respektata de la ĉina popolo. En la pasintaj 40 jaroj ĝiaj gefiloj dediĉis grandegan laboron al bridado de la rivero. Dank' al tiu laboro la senbrida rivero, kiu siatempe malutilis al homoj, fariĝis iom post iom kvieta kaj bone servas al la loĝantoj de ambaŭ bordoj.

LA RIVERO PLENA DE LARMOJ

La Flava Rivero kun longeco de 5 464 kilometroj estas la dua granda rivero de Ĉinio. Ĝi fontas el la baseno Jüeguzonglje norde de la montaro Bajan Ĥar en Ĉinghaj-provinco de okcidenta Ĉinio, fluas orienten tra la provincoj Ĉinghaj, Siĉŭan kaj Gansu, la Ningŝja-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono, la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kaj la provincoj Ŝanŝji, Ŝenŝji, Henan kaj Ŝandong, kaj enfluas en la maron Bohaj ĉe Kenli-gubernio, Ŝandong-provinco.

En la historio ofte okazis inundoj ĉe Hŭa'jŭankoŭ de Ĝengĝoŭ, Henan-provinco, la malsupra baseno de la rivero. Tie la fluejo pro multjara sedimentiĝo estis je 3-5 metroj pli alta ol la tero trans la bordoj, eĉ je 10 metroj ol la tersurfaco de la urbo Kajfeng apud Ĝengĝoŭ, ke la rivero fariĝis fama "pendanta rivero".

La Flava Rivero estis tre furioza. Se la digo breĉiĝus, la rivero inundus la Nord-Ĉinian Ebonaĵon kun areo de 250 mil kvadrataj kilometroj kaj alportus al la loĝantoj grandajn suferojn kaj perdojn. Laŭ historiaj notoj, dum 2 540 jaroj (de 602 a. K. ĝis 1938) okazis 1 590 inundoj kaj

26-foje ŝanĝiĝis la fluejo, meznombro de inundoj en ĉiu tria jaro kaj unu ŝanĝo de fluejo en ĉiu centa jaro. Iam okazis eĉ kelkaj inundoj en unu jaro. Ĉiu inundo alportis grandan katastrofon, ke kuŝis kadavroj ĉie ambaŭborde. Inundo en 726 p. K. ĉe la gubernioj Cangŝjan kaj Heĝjan de Hebej-provinco forrabis la vivon de pli ol miliono da homoj. Inundo en 1642 p. K. ĉe Kajfeng viktimitis 340 mil loĝantojn.

NEBREĈEBLA "GRANDA MURO"

Por defendi sin kontraŭ inundo, en la pasintaj preskaŭ 40 jaroj la popolanoj de la malsupra baseno de la rivero trifoje dikigis la 2 000-kilometran digon kaj plialtigis ĝin ĝenerale je 2-6 metroj, kaj en iuj lokoj je pli ol 10 metroj. Ili garnis per ŝtono tiujn partojn masonitajn el sorgtigoj, salikbranĉoj, fragmito kaj tero.

Por regi la akvofluan de la rivero, ili konstruis pli ol 170 instalaĵojn kaj 3 000 kontraŭondajn digojn, kiuj ludas gravan rolon en sekura pasigo de la ĉefa fluo, defendo de digoj, drenado de inundo kaj leŭsoforportado. Ekz., dum 1919-1938 al la rivero okazis 11 superakvoj, ĉiu kun sekunda flukvanto de pli ol dekmil kubmetroj, kaj 7 el ili breĉis digon. Sed en la pasintaj preskaŭ 40 jaroj okazis 12 tiaj superakvoj, tamen neniu digbreĉiĝo okazis. Precipe en julio de 1958 ĉe Hŭa'jŭankoŭ okazis eksterordinara superakvo kun sekunda flukvanto de 23 mil kubmetroj, malofta en la lastaj cent jaroj. La furioza akvofluo rompita la grandan ferponton super la rivero ĉe Ĝengĝoŭ. La akvo preskaŭ atingis la digosupron, tamen la digoj restis sendifektaj. Oni kalkulis.

ke se oni amasigus ĉiujn teron kaj ŝtonojn uzitajn por fari serion da kontraŭinundaj konstruaĵoj, do ili estus 13-oble tiom longa kiom la Granda Muro.

Nun efektiviĝis la strategia plano “bari akvon supre, dreni akvon malsupre kaj dividi inundon ambaŭborde”. Jam formiĝis fundamente kontraŭinunda sistemo konsistanta el akvorezervejoj, digoj, flueja reguligo, inundo-entenejo, mezurado kaj prognozo pri pluvego kaj inundo, organizado de kontraŭinundaj laboro kaj fortoj. En la basenoj oni jam konstruis 174 akvorezervejojn grandajn, mezgrandajn kaj malgrandajn kun totala kapacito de 31.5 miliardoj da kubmetroj. Sur la rivero oni konstruis sep grandajn akvomastromajn, hidroelektrajn konstruaĵojn — Liŭĝjaŝja, Jan’gŭoŝja, Bapanŝja, Ĉingtongŝja, Sanŝenggong, Tjanĉjaŭ kaj Sanmenŝja — kaj 80 minimume 500-kilovattajn hidroelektrajn kun generatora kapacito de 2 540 000 kilovattoj. Krome, estas ankaŭ 35 grandaj irigaciaj regionoj ĉiu kun areo de pli ol 20 000 hektaroj kaj centoj

da mezaj kaj malgrandaj irigaciaj regionoj. Ili irigacias pli ol 4.6 milionojn da hektaroj da kampoj.

LA RIVERO NE BRIDIĜOS, SE ĜIA SABLO NE FORIĜOS

La Flava Rivero entenas 35 kg. da leŭso en ĉiu kubmetro, per kio ĝi multe superis la mondfamajn sablozajn riverojn Gango kaj Nilo. La ĉefa kaŭzo kuŝas en tio, ke la akvo-kaj grundperda areo en ĝiaj basenoj estis 430 mil kvadrataj kilometroj, t. e. 70% de la basena areo.

En la pasintaj dinastioj de Ĉinio estis personoj, kiuj proponis, ke “oni devas unue solvi la ŝlosilan problemon en forigo de la leŭso en la rivero”, sed ilia propono ne plenumiĝis. En la lastaj preskaŭ 40 jaroj la ŝtato multfoje organizis grandajn esplorojn, ellaboris politikon por reguligi la riveron kaj fondis la Komisionon por Konservado de Akvo kaj Grundo en la Meza Baseno de la Flava Rivero. Precipe en 1983 la ŝtato

Plifortigo de digo ĉe la malsupra Flava Rivero



pluapaŝe difinis malgrandajn basenojn kiel unuojn de reguligo kaj laŭkontraktan reguligon far kamparana familio kiel formon de reguligo. Dank' al tio leŭsofiksado ĉiuflanke komenciĝis. Ĝis nun en la basenoj de la rivero oni faris leŭsofiksadon en ĉ. 100 mil kvadrataj kilometroj da akvo- kaj grundperda areo, interalie, kun la konstruado de digoj oni konstruis pli ol 2.6 milionojn da hektaroj da kampoj ŝtuparaj, irigaciaj kaj ebenaj kaj plantis arbojn kaj herbojn sur pli ol 6 milionoj da hektaroj. En nemalmultaj lokoj vidiĝas kanaloj kun digoj kaj ŝtuparaj kampoj en kontinuo.

Lastatempe iuj specialistoj faris statistikon kaj analizon, kiuj montris, ke en la lastaj dek jaroj leŭso enfluinta en la riveron reduktiĝis meznombro je pli ol 320 milionoj da tunoj ĉiujare. Tio okazis pro multaj kaŭzoj, sed ĉefe pro la sukcesa laboro de akva kaj grunda konservado.

Nemalmultaj scienc-teknikistoj, sin dediĉantaj al bridado de la Flava Rivero, plene montris sian talenton en konado kaj bridado de la rivero. Ekz., s-ro Ĉjan Ning, teoriisto pri leŭso, faris longtempan surlokan esploradon. Li kaj liaj ko-


legoj rimarkis ke dikaj sableroj kun diametro de pli ol 0.05 mm. konsistigas 50% de la totala sedimenta kvanto en la malsupra baseno de la rivero, kaj fine trovis fonton de tiaj sableroj, kio liveris bazon por difini ĉefajn lokojn por akva kaj grunda konservado sur la Leŭsa Altebenaĵo. Tio ja estas la unua fojo en la leŭso-esplora historio de la Flava Rivero.


MULTFLANKA UTILIGO DE LA RIVERAKVO

Post longtempa praktiko la popolanoj de la malsupra baseno de la Flava Rivero trovis sedimentan rimedon por konstrui kampon. Samtempe pli kaj pli perfektigis la tekniko protekti digojn per sedimento.

Pasintecce, kiam oni taksis la Flavan Riveron, oni ĉiam diris, ke la "Flava Rivero faris senombrajn damaĝojn, sed ĝi riĉigis nur unu regionon", t. e., Hetaŭ-regionon en Ningŝja kaj la Interna Mongolio kun bonaj irigaciaj kondiĉoj. Nun en la malsupra baseno de la rivero, kie serioze mankas akvo, oni tamen havas riĉan rikolton en sekaj jaroj dank' al utiligo de la riverakvo.

Liŭĝjaŝja-hidroelektrajo ĉe la supra Flava Rivero





Granda konstruo por irigacii kampojn per akvo de la malsupra Flava Rivero

Jam en 1950 la popolanoj de la malsupra baseno de la rivero komencis konstrui irigaciajn staciojn. Tiam iuj opiniis, ke tio estas aŭdaca ago, ĉar tie la kondiĉoj estis malsamaj ol en Ningŝja kaj la Interna Mongolio. En tiu regiono la digo estis malfacile defendebla, kiel oni povus breĉi ĝin por irigacii kampojn? Sed oni tamen decidis konstrui kluzon ĉe la vilaĝo Tjanĝuang de Udoŭ-gubernio de Henan-provinco por irigacii kampojn. La unuaperioda konstruado finiĝis en 1952. La totala longeco de la trunka kanalo estas 52.7 kilometroj kaj ĝi estas nomata "Kanalo de Popola Venko". Nun la kampoj irigaciataj per la akvo de la rivero kaj alimaniere akvumataj kampoj ĉe la malsupra Flava Rivero jam atingis 1 667 mil hektarojn. Fekundaj kampoj irigaciataj per la riverakvo fariĝis pli grasaj, ankaŭ sablaj kaj alkalaj kampoj fekundiĝis, ricevinte sedimenton de la rivero. Pasintecce Heze, Ljaŭĉeng kaj Hujmin de Ŝandong-provinco estis famaj plagitaj regionoj de Ĉinio. En la lastaj dek jaroj ili fariĝis "grenejoj". En 1986 en Heze unu rikoltsezono jam donis 2.15 miliardojn da kilogramoj da tritiko, pli multe ol la jara produkto-kvanto en la pasinteco.

La akvo de la rivero turnis pli ol 4.6 milio-

nojn da hektaroj da tero en kampojn, kiuj donas stabilan kaj altan produkto-kvanton ĉu en sekegeco ĉu en troa pluvo. La rivero ne nur irigacias kampojn, sed ankaŭ liveris grandan elektroenergion al diversaj lokoj dank' al la hidroelektrejoj Liŭĝjaŝja kaj Sanmenŝja sur si. La rivero provizas per sia akvo nemalmultajn urbojn, inkluzive Tjanĝin, la duan grandan urbon en norda Ĉinio, malproksime de la rivero.

En la pasintaj preskaŭ 40 jaroj oni akumulis multan sperton por bridi la Flavan Riveron kaj akiris certan sukceson. Sed la rivero estas multtaŝlima kaj kompleksa, kaj plie la loĝantaro sur la Leŭsa Altebenaĵo duoble kreskis. Neracia ekspluatado de virga tero kaj minfosado kaŭzas novan akvan kaj grundan perdon. Pro tio la gvidantoj de la Komisiono por Mastrumado de la Flava Rivero opinias, ke tre peza estos la tasko por bridi la riveron. Tamen se nur oni persistos en la laboro de akva kaj grunda konservado sur la Leŭsa Altebenaĵo, konstruado de akvorezervejoj sur ĝiaj branĉoj, irigaciado per ĝia akvo kaj pluapaŝa reguligo de ĝia enfluejo, do ĝi ne ŝanĝos sian ĉefan fluejon en la venontaj cent jaroj, aŭ eĉ pli longe, kaj turniĝos el malutila en utilan. □

Ŝjuĝoŭ hieraŭ kaj hodiaŭ

Teksto de CAŬ BAJLONG

Fotoj de ŜJU JUĜJI kaj JANG ĜINGHŬA

Ŝjuĝoŭ estas unu el la famaj historiaj kulturaj urboj de Ĉinio. Jam antaŭ 3 000 jaroj oni faris noton pri Pengĉi aŭ Pengĉeng (la nuna urbo Ŝjuĝoŭ) sur besta osto. Poste multaj dinastioj prenis Ŝjuĝoŭ kiel ĉefurbon de reĝlandoj pro ĝiaj naturdotitaj geografiaj kondiĉoj. Ŝjuĝoŭ, konata kiel pasejo al kvin provincoj, sidas ĉe la Granda Kanalo inter Pekino kaj Hangĝoŭ kaj servas kiel vojnodon al la sudo kaj nordo de Ĉinio. En la urbo interkruciĝas la Fervojoj Ljanjungang-Lanĝoŭ-a kaj Pekin-Ŝanhaja, kio faris ĝin des pli grava trafike.

ANTIKA BATALKAMPO



De antikve Ŝjuĝoŭ estas

strategie grava loko. Precipe en la okazo de teritoria splitiĝo kaj kontraŭstaro inter la sudo kaj nordo de Ĉinio, la konkero aŭ perdo de Ŝjuĝoŭ ofte influis la prosperon aŭ malprosperon de la sudo kaj nordo. La nordanoj rigardis Ŝjuĝoŭ kiel gravan urbon de la sudo kaj la sudanoj kiel ŝlosilon por la nordo. Preskaŭ ĉe ĉiuj historiaj turnopunktoj dum jarmiloj, kiam Ĉinio alfrontis ŝanĝiĝon de dinastio, batalon inter militaristoj kaj insurekcion de kamparanoj, ĉe la urbo okazis militoj. Ĝis nun iris pli ol 200 bataloj ĉe ĝi kaj ĝi estis unu el la ĉinaj lokoj, kie plejofte okazis militoj. Cirkulas inter ĉinoj popolkanto, kiu legiĝas jene:

*Sur la antikva bataalkampo
antaŭ Ĝiŭli-monto,
malnovajn batalilojn trovis
paŝtist-knabo. Ondojn
en Uĝjang levis vento, kva-
zaŭ la venkita Ŝjang Ju
amatan Ju Ĝji adiaŭus
triste ĉe la fronto.*

Ĝi priskribas la historian batalon inter Liŭ Bang (256-195 a. K.) kaj Ŝjang Ju (232-202 a. K.). En 205 a. K. Liŭ Bang, ĉefo de insurekcia armeo kaj reĝo de Han-regno, kaj Ŝjang Ju, reĝo de Ĉu-regno, faris decidan batalon ĉe Ĝiŭli-monto de Ŝjuĝoŭ. Tiam Pengĉeng estis la ĉefurbo de Ĉu-regno. Profitante la okazon, ke Ŝjang Ju faris norden-ekspedi-

Ŝtonaj gravuraĵoj de Han-dinastio "Gastoj kaj Gastigantoj" kaj "Karavano" (Dua parto)



cion al Ŝandong kaj la urbo estis evakuita, Liŭ Bang kun 500 000 militistoj atakis la urbon. Informiĝinte pri tio, Ŝjang Ju retiris sian armeon kaj venkis Liŭ Bang en la batalo. La lasta panike fuĝis kun dekoj da rajdistoj. Poste Liŭ Bang venkis Ŝjang Ju, kiu povis fari nenion alian ol sin mortigi ĉe Uĝjang-rivero de Anhuĵ.

URBO ABUNDA JE HISTORIAJ RESTAĴOJ

Ŝjuĝoŭ havas multajn historiajn restaĵojn. En la ĉirkaŭurbo oni malkovris multe da kulturaj ruinoj de neolitiko kaj elterigis grandan kvanton da koloraj ceramikaĵoj, ŝtonaj hakiloj, aglobekaj ŝpatoj k.a.

Ŝjuĝoŭ prosperis en Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.), kiu postlasis al ĝi plej multe da historiaj restaĵoj. Tiam en Ŝjuĝoŭ jam 18 personoj funkciis kiel reĝo de Ĉu-regno aŭ de Pengĉeng. Iliaj tomboj sin lokas ĉe la montpiedo ĉirkaŭ la urbo. Nun ok el ili estas prifositaj. El ili la plej granda longas 90 metrojn, kovras 500 kvadratajn metrojn kaj konsistas el 12 ĉambroj. Sendube, ĝi impresas kiel subtera palaco. En la urbo estas

elterigitaj raraj historiaj objektoj, kiaj jadaĵ vestoj kunligitaj per arĝentaj aŭ kupraj fadenoj, arĝenta sigelilo de Liŭ Ĝu, la sesa reĝo de Ĉu-regno, bronzaĵoj kaj jadaĵoj. Decembre de 1984 oni malkovris pli ol 4 000 argilajn soldatojn, kiuj servis kiel kunaj entombigitaĵoj de la reĝo de Ĉu-regno, kiu mortis antaŭ 2 000 jaroj (Bv. legi artikolon "Argilaj Militistoj de Ĉu-regno" en la 5-a n-ro de EPĈ, 1986).

Ŝjuĝoŭ estas unu el la lokoj kun plej multe da ŝtonaj reliefoj de Han-dinastio. Estas jam elterigitaj ĉ. 400 tiaj reliefoj, kiuj temas pri mitoj, historiaj anekdotoj, karavano en ekskurso, festeno, skermo, muziko, teatro, ĉasado, plugado, teksado, raraj birdoj kaj bestoj. Ili servas kiel gravaj materialoj por studi la politikon, ekonomion, kulturon kaj arton de Han-dinastio.

En Ŝjuĝoŭ ne mankas historiaj restaĵoj postlasitaj de pluraj dinastioj kaj cirkulas legendoj pri ili. Sur Hubu-monto alte staras teraso, kie Ŝjang Ju revuis siajn trupojn kaj rigardis ĉevalvetkuron antaŭ 2 000 jaroj. La nuna turo sur la teraso estis konstruita en 1889.

En Pejŝjan-gubernio apud Ŝjuĝoŭ sin lokas la Domo "Kanto de Ventego", en kiu staras kantsteleo. Ĝi surhavas gravuritan tekston "Kanto de Ventego", kiu estis verkita de Liŭ Bang, la unua imperiestro de Han-dinastio, en lia hejmloko Pejŝjan-gubernio. La teksto legiĝas jene:

Leviĝas ventego, kirliĝas nub-flokoj.


Nun mi jam revenis en mian vilaĝon.


Defendu la landon bravuloj de l' lokoj.

La kanto kun emociaj kaj simplaj vortoj estis laŭdata de diversnaciecaj literaturistoj kaj gravurita sur la steleo.

En la urbo troviĝas ankaŭ la tombo de fama ĉina kuracisto Hŭa Tŭo (141-203 p.K.), 10-metre alta ŝtona budhostatuo de la Nordaj kaj Sudaj Dinastioj (420-589 p.K.), steleoj kun gravurita sutro de Tang-dinastio (618-907 p.K.), Fanghe-kiosko kaj Digo de Su Dongpo, fama literaturisto de Song-dinastio (960-1279 p.K.), kaj provizora palaco de imperiestro Ĉjanlong (1736-1795 p.K. sur trono) de Ĉing-dinastio (1644-1911 p.K.).

Ĉjiŝan-karbominejo





Maŭcun-elektrejo

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949 oni kreis novajn pitoreskejojn surbaze de la lokaj montoj kaj riveroj, kaj tiel beligis la medion kaj verdigis la urbon. En 1958 en la urbo estis konstruita Junlong-parko kun areo de 23 hektaroj. Junlong-lago okcidente de Junlong-monto kovras 5.8 kvadratajn kilometrojn. Ĝin brakumas verdaj montoj. Ĉie sur la montodeklivo oriente de la lago kreskas abrikotujoj kaj la Longa Digo sur la Sabla Insuleto en la lago estas turisma loko. Ĉjŭanŝan-rezervejo en la suda ĉirkaŭurbo estas frukto de forstokulturo de la Ŝjuĝoŭ-a popolo dum la pasintaj pli ol 30 jaroj. Sur la kvin ondantaj montoj kreskas arboj, arbedoj, grimpoplantoj, herboj kaj floroj, kaj kantas birdoj. Laŭ la malnova riverujo de la Flava Rivero oni konstruis rubandforman parkon 7 km. longan, kun kioskoj kaj skulptaĵoj en la ombrejoj. La Tombejo de Martiroj ĉe Fenikso-monto en la suda ĉirkaŭurbo kovras 38 hektarojn kaj en ĝi

pompas pinoj kaj cipresoj kaj majestas memor-turo 38.15 m. alta.

CENTRO DE LA EKONOMIA DISTRIKTO HŬAJHAJ

Ŝjuĝoŭ estas sola granda urbo ĉe la limo inter la provincoj Ĝjangsu, Ŝandong, Henan kaj Anhuj, kun periferio de 150 km., kie punktiĝas multaj vilaĝoj kaj urbetoj. De antikve Ŝjuĝoŭ estas loko de varo-distribuo. Antaŭ nelonge 15 subprovincoj kaj urboj en la limregiono fondis la ekonomian distrikton Hŭajhaj kun Ŝjuĝoŭ kiel la centro. La distrikto ampleksas Ljanjungang de Ĝjangsu oriente, Ŝangĉiŭ de Henan okcidente, Bengbu de Anhuj sude kaj Ĝjining de Ŝandong norde. Ĝi havas areon de 180 000 kvadrataj kilometroj kaj pli ol 90 milionojn da loĝantoj.

La distrikto estas fama energia bazo kaj latentia prilaborejo de agrikulturaj kaj kromokupaj produktaĵoj de Ĉinio. Ĝiaj grena

produktokvanto kaj karba rezervokvanto konsistigas po dekonon de tiuj de Ĉinio. Ĉiujare Ŝjuĝoŭ sola produktas pli ol dek milionojn da tunoj da karbo, per kies du trionoj oni kontentigas la bezonon de Ĝjangsu-provinco. La urbo estas unu el la termoelektraj bazoj de Ĉinio kaj havas tri 220 000-voltajn alttensiajn lineojn konektitajn kun la elektra reto de orienta Ĉinio kaj unu tian alttensian lineon konektitan kun la elektra reto norde de Hŭajhe-rivero. En 1985 estis konstruita ultra-alttensia lineo de 550 000 voltoj, kiu iras trans Hŭajjin ĝis Ĝjangdu, kaj poste tra Jangzi-rivero ĝis Ŝanhajo. La konstruita Ŝjuĝoŭ-a Elektrejo kun generatora kapacito de 1.3 milionoj da kilovattoj estas unu el la ĉefaj elektrejoj de la elektra reto de orienta Ĉinio.

Nun Ŝjuĝoŭ jam fariĝis industria urbo kun konsiderindaj skalo, kapablo kaj nivelo. Ĝi havas industriojn karban, elektran, metalurgian, maŝinan, konstru-materialan kaj kemian kiel la ĉefajn kaj ankaŭ kompare kompletajn industriojn tekstilan, lantekstilan, manĝaĵan, furaĝan, medikamentan, plastan, ledan k.a. La Fabriko de Konstruaj Maŝinoj de Ŝjuĝoŭ estas la plej granda fabriko de rulpremiiloj en Ĉinio kaj ĝia produktokvanto de rulpremiiloj konsistigas 40% de tiu de la lando. Ĝiaj produktaĵoj vendiĝas ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en aliaj pli ol 30 landoj kaj regionoj. La ferminejo Ligŭo de la urbo estas ercoriĉa. La cementa produktokvanto de la urbo estas kvinono de tiu de Ĝjangsu-provinco. La fondiĝo de la ekonomia regiono Hŭajhaj certe akcelos la disvolvigon de industrio, komerco, agrikulturo, scienca esplorado, trafiko kaj turismo de la loko. □



Parto de Šjuĝoŭ

Karbo-haveno ĉe la Granda Kanalo





En manĝaj-vendejo

En muntejo de rulpremioj




Statuo de Liŭ Bang kaj la Domo "Kanto de Ventego"





Koloraj argilaj homfiguroj nove elterigitaj

Kolora ceramikaĵo el neolitiko



*Lumilo surdorse de bronza
bovo elterigita en la urbo*




Nova etapo, nova strebado

— Memore al la 100-jara jubileo

de la naskiĝo de Esperanto

de ZHANG QICHENG*

Zhang Qicheng



Ni solene celebru la 100-jaran jubileon de la naskiĝo de Esperanto.

Eble oni dirus, ĉu tiajn propagandon kaj celebradon meritas la lingvo nur de 100 jaroj?

Vere, tio ne estas eksterordinara, ĉiu ajn nacia lingvo havas historion multe pli longan ol Esperanto. Tamen, la 100-jara ekzistado kaj disvolviĝo de Esperanto ja estas gravaj kaj admirindaj. Ĉar Esperanto esence diferencas de la naciaj lingvoj, ĝi estas artefarita, parolata de neniuj nacio kaj surbaze de neniuj profunda kultura tradicio, tamen ĝi vivis 100 jarojn. Ĝin ne ruinigis la du mondmilitoj, ne dronigis la tajdo de la kulturaj despotismoj kaj ne sufokis ĉiaj malestimoj kaj moko. Ĝi ne nur postvivis la historiajn katastrofojn sed multe disvolviĝis. Jam antaŭ 65 jaroj, nia esperanta pioniro Hujucz trafe finis sian artikolon "La idealo kaj la realo de internacia lingvo" per la frazo "Nun en Esperantujo la suno neniam subiras", kaj hodiaŭ ni havas pli multajn argumentojn por tion aserti.

Kompreneble, Esperanto estas

malgranda lingvo kompare kun diversaj vaste uzataj lingvoj. Tamen ni povas konstati, ke en multaj flankoj ĝi estas ne malpli bona kaj eble superas ilin, se ni komparas ĝin kun la etnaj lingvoj de iuj evoluantaj landoj. Ekzemple, en eldono de literaturo, Esperanto kompreneble ne povas rivali kun la ĉina, angla, franca, rusa, hispana, araba kaj aliaj grandaj lingvoj, sed ĝi certe superas iujn etnajn lingvojn kaj kvalite kaj kvante.

Ĉar Esperanto multe disvolviĝis en la pasintaj 100 jaroj, ĝi ludis ĉiam pli grandan rolon en la internacia komunikado, ĝi faris relative grandan kontribuon al la reciproka kompreniĝo kaj kultura interŝanĝo inter la popoloj de diversaj landoj, tial ĝia 100-jara jubileo estas celebra ne nur por la esperantistoj de la tuta mondo, sed ankaŭ por la tuta internacia komunumo. Kaj ĝuste en tio restas la grava signifo de la rezolucio por la 100-jara jubileo de Esperanto akceptita de la 23-sesia konferenco de Unesko — la internacia kultura organizo plej prestiĝa en la mondo.

Sed, aliflanke, ni ankaŭ devas

sobre vidi, ke kvankam Esperanto grandpaŝe disvolviĝis en la pasintaj 100 jaroj, tamen ĝia disvolviĝo ankoraŭ ne atingis la deziratan gradon, precipe por ni fervoraj esperantistoj. Tial, kiam Esperanto staras ĉe la sojlo de la dua centjaro de sia vivo, oni devas serioze esplori la problemon, kial ĝis nun Esperanto restas ne vaste aplikata en la mondo? Pri tiu ĉi problemo, Huang Hua, prezidanto de la Honora Komitato de la 71-a UK, en sia respondo al la ĉefredaktoro de "Hungara Vivo", diris: "Pro tio ke unuflanke oni ankoraŭ ne sufiĉe konas la signifon kaj rolon de Esp. kaj aliflanke ĝia aplikado en diversaj kampoj ankoraŭ estas tre limigita." Mi opinias, ke la juĝo de Huang Hua estas reala kaj sekve tre trafa. Kaj mi volas aldoni, ke la duflankaj kaŭzoj estas sendependaj kaj samtempe influantaj unu la alian: la nesufiĉa kono de homoj pri Esperanto malhelpis la plivastiĝon de ĝia apliko; kaj male, la malvasteco de apliko ne povas plene montri la signifon kaj rolon de Esperanto, kio influas la konon de homoj pri Esperanto. Kaj mi ankaŭ



Esperantaj gazetoj eldonitaj aliflände

opinias, ke la dua kaŭzo estas pli grava, la aplika sfero de Esperanto estas ankoraŭ malgranda. Ĉar oni klare konos kaj volonte aplikos Esperanton nur tiam kiam ĝi plene montros sian rolon en ĉiuj sociaj kampoj. Alie, estas tute vane, eĉ se vi ĉiamaniere beligas la utilecon de Esperanto. Ĝi estas sama kiel varo, kiu konkeras la koron de la klientoj ĉefe pro sia uzebleco, sed ne de la fanfaronaj reklamoj. Se mia vidpunkto ne eraras, ni eble trovas la ĝustan direkton por ke Esperanto akiru pli grandan disvolviĝon en la venontaj 100 jaroj.

Necesas emfazi, ke kvankam la aplika sfero de Esperanto estas kompare malgranda, ni tamen devas agnoski, ke tiuflanke ni jam havas bonan bazon. Ni jam havas Esperantan disaŭdiĝon en Varsovio, Pekino, Zagrebo, Berno, Budapeŝto ktp. Ni regule publikigas Esperantajn gazetojn "Esperanto", "Heroldo de Esperanto", "Monato", "Hungara Vivo", "El Popola Ĉinio", "Fonto" ktp. Ni eldonis ankaŭ certan kvanton da libroj.

Ankaŭ en turismo, sciencoj kaj tekniko, Esperanto akiris ĝojindan progreson. La problemo estas en tio, ke ni devas kvante pligrandigi kaj kvalite plialtigi ĝian aplikadon. Ĉiflanke la 71-a UK ĝustatempe faris rezolucion speciale por la esperantistoj. Ĝi alvokis la Esperanto-Asociojn de diversaj landoj kaj fakajn Esperantajn organizojn, ke ili klopodu en praktika uzo de Esperanto. Ĝi emfazis, ke oni devas konscie kaj sisteme apliki Esperanton en sciencoj kaj tekniko kaj aliaj fakoj. Mi pensas, ke se la adeptoj de Zamenhof en la tuta mondo rigardas la rezolucion ne nur skribaĵo, sed prenas ĝin kiel agan programon kaj ĝustatempe ĝin praktikas, Esperanto sendube surpaŝos brilan, fruktodonan kaj novan etapon en la venontaj 100 jaroj.

Kiel ĉina esperantisto longtempe sin okupanta pri la Esp-movado, mi elkore dankas, ke la komitato de UEA en la supredirita rezolucio aparte menciis la atingojn de la ĉina Esp-movado kaj faris alvokon ĉiamaniere subteni ĝin. Vere, en la lastaj jaroj la

ĉina Esp-movado havis relative grandan disvolviĝon. En certa grado, ni devas ŝuldi tion al la forta subteno kaj amika kunlaboro de la internaciaj Esperantaj rondoj. Kaj en la venontaj jaroj, la internacia helpo daŭre ludos gravan rolon por la plua disvolviĝo de la ĉina movado. Simo Milojević en sia artikolo "Ĉinio kaj Esperanto — reciprokaj esperoj" skribis: "Ĉinio estas la plej granda espero de Esperanto." Eble ni devas diri objektivite, ke tiu ĉi frazo estas nur espero, tamen ni ĉinaj esperantistoj volas klopodi plenforte por efektiviĝi tiun ĉi latentan esperon. Ni povas diri fiere, ke Ĉinio estas tia lando, kiu volas sin dediĉi al ĉiuj aferoj utilaj al la homa progreso. Sendube, Esperanto estas unu el tiaj noblaj aferoj. Ĝi meritas nian dediĉadon. Aliflanke, ni ĉinoj konsciis, ke Ĉinio, kun preskaŭ kvarono de la monda loĝantaro, devas fari pli multan kontribuon al la homaro, inkluzive tiun al la Esp-movado. Ĝuste tion diris Huang Hua, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko, en siaj salutvortoj al la 71-a UK. Liaj vortoj evidente esprimis la volon de la ĉina popolo. Tial, kiam ni celebras la centjariĝon de Esperanto kaj bonvenigas la novan etapon en ĝia disvolviĝo, mi sincere deziras, ke ni ĉinaj esperantistoj kune kun niaj tutmondaj kolegoj kune laboru por realigi la belan idealon de Esperanto!

Al nova etapo! Faru novan strebadon! □

* La aŭtoro estas ĝenerala sekretario de ĈEL, honora membro de UEA kaj eksĉefredaktoro de EPC. La artikolo estis verkita laŭ nia peto.

100 jaroj de literaturo en Esperanto

de WILLIAM AULD¹

Por D-ro Zamenhof literaturo estis ĉiam grava faktoro en la evoluo de lia lingvo kaj ties movado. Pro tio en la Unua Libro inkluziviĝis ankaŭ poemoj, tradukita kaj originalaj; kaj pro tio li dediĉis dum tridek jaroj grandan parton de sia trookupata tempo al tradukado de literaturaj verkoj. Strange, dum la samaj tridek jaroj ne mankis esperantistoj, kiuj tion malaprobis, tiel ke Edmond Privat povis diri dum la 7a Universala Kongreso en Antverpeno (1911), ke “kelkaj al ni riproĉis, ke ni faras literaturon en Esperanto. . .”² La lingvo, laŭ ili, devus esti “nur komerca kaj scienca”³. Tio karakterizis du malsamajn sintenojn al la koncepto pri internacia lingvo. Eĉ kelkaj subtenantoj de la ideo ne volis agnoski egalecon de Esperanto kaj la lingvoj “naturaj”, kaj volis severe limigi ĝian uzadon al dua-grada rolo.

Tia opinio ne povis sukcesi kontraŭ la plimulto, por kiu Esperanto estis afero emocia, enkorpiĝo de aspiroj al harmonio kaj paca kunvivado de la homoj, malgraŭ diferencoj gentaj, religiaj kaj sociaj. Kaj literaturo estas unuavice esprimilo de la emocioj. Kiam mortis la juna edzino de Frenkel, kiam mortis la fileto de Emba, kiun lingvon ili elektis por esprimi sian funebrojn? — Esperanton⁴. Tiaj verkoj perfekte refutas nerespondecajn akuzojn de iuj niaj kontraŭuloj, ke Esperanto estas sen-

viva kodo, aŭ ke literaturo ne eblas en “lingvo artefarita”.

Alia diskutpunkto inter la fruaj esperantistoj temis pri tio: se indas, ke Esperanto havu literaturon, ĉu tiu literaturo devus esti tradukita aŭ originala? Kiam aperis en 1907 la unua longa romano originale verkita en nia lingvo, “Kastelo de Prolongo”⁵, ĝi estis akceptita de kelkaj kiel defio kontraŭ tiuj, kiuj favoris nur tradukadon. Spuroj de tiu disputo estas rimarkeblaj iam-tiam en nia hodiaŭa movado. Per tradukado, oni argumentis, oni pruvas la kapablecon de Esperanto redoni ĉiajn sencojn de la aliaj lingvoj. Tio estas ja vera; sed ĝi ignoras la fakton, ke Esperanto kapablas ankaŭ esprimi nuancojn, kiujn ne posedas aliaj lingvoj. Tiujn nuancojn trafas, kompreneble, nur niaj verkistoj originalaj, kiuj manipulas Esperanton ekster nacilingvaj kadroj.

Ofte la esperantistoj estas tro ekstremismaj, tro rigide difinas siajn poziciojn. Kiel dirite, Zamenhof jam en la Unua Libro difinis la dezirindon: literaturo kaj tradukita kaj originala, el kiuj ambaŭ kontribuas al la bonfarto kaj eĉ la ekzisto de la lingvo. Tia estas la idealo, kaj tia estas nia literaturo centjara.

Jam en 1894, Zamenhof definitive pruvis la taŭgecon de la sepjara(!) lingvo por altnivela literatura tradukado, per la “Hamleto” de Ŝekspiro, kies



La aŭtoro

kvaliton oni de tempo al tempo egalas sed tre malofte preterpasis ĝis hodiaŭ⁶. Nun en mia biblioteko troviĝas literaturaj tradukoj en Esperanton el ne multe malpli ol cent diversaj lingvoj, el kiuj la plimultaj tradukoj ŝajnas kontentige adekvataj. Tiel admirinde la lingvo, pere de ĝiaj talentaj posedantoj, plenumas tiun gravan faceton de sia esenca rolo.

Pere de Esperanto oni povas jam nun tre bone sin eduki pri la mondliteraturo, ĉar haveblas ne nur tradukoj de granda nombro da rekonataj majstroverkoj el la t. n. grandaj lingvoj (kiuj kutime estas studeblaj ankaŭ per nacilingvaj tradukoj), sed ankaŭ tradukoj de ĉefverkoj en malpli disvastigitaj lingvoj, kies nacilingvaj tradukoj plejparte aŭ ne ekzistas, aŭ estas

fuŝe tradukitaj, aŭ estas malfacile troveblaj. (Kompreneble ekzistas ankaŭ iuj fuŝaj tradukoj en Esperanto!). Mi priskribis aliloke⁷ la haŭson regantan sur la kampo de nacilingva tradukado, kaj ankaŭ⁸ premisis la avantaĝojn de Esperanto kiel lingvo por kompara literaturo. Pli ol unu samideano, precipe inter laboristoj kaj aliaj aŭtodidaktaj, asertis, ke Esperanto estis lia "universitato". Laŭ mia opinio ankaŭ multaj kleruloj profitus kaj profitis el funda posedo de nia lingvo. Ĝuste sur la kampo literaturo Esperanto funkcias plej senmanke.

Sed lingvo nur traduka vivus nur duone. Kaj fakte, oni rajtas demandi kiel oni esperus traduki, ekzemple, idiotisman konversacion, se en Esperanto idiotismaj konversacioj tute ne okazus? Idiotisma konversacio implicas senperan kaj senĝenan posedon de ĉiutaga Esperanto, kio siavice implicas rektan pensadon kaj sentadon per la lingvo (komparu konversacion per nacilingvo fremda al vi!). Kaj verkemulo, kiu senpere pensas kaj sentas per iu lingvo, certe emos per tiu lingvo verki. Tiel estis en la kazo de Esperanto, kaj pro tio naskiĝis la literaturo originala de tiu lingvo.

La evoluo de nia originala literaturo estas studobjekto interesa kaj instrua. Se, anstataŭ nei ĝian ekziston (neesperantistoj), aŭ lamenti, ke ĝi ne altirisian Ŝekspiron (iuj esperantistoj), la homoj serioze studus ĝin, ili profitus eblecon tute unikan en la mondhistorio. Oni povas vidi la seninterrompan kreskon kaj evoluon de unu literaturo kulturbazo (ĉar tiaj estas la literaturoj), ekde ĝia komenciĝo mem; kaj la lingvo de tiu literaturo estas la sola lingvo de sia speco. Kaj ĝi estas la sola litera-

turo kreita senkonsidere pri geografiaj limoj laŭ tutmonda skalo. Tio ne signifas, ke unuopaj verkoj malhavas geografian orientiĝon: Engholm videble verkis pri Svedujo, Varankin pri Sove-tunio, Schwartz pri Francujo kaj Germanujo, Linton pri Novgvineo, Mijamoto pri Japanujo kaj Okinavo, ktp. Iliaj verkoj sciigas al ni multon pri la koncernaj medioj. Sed ili celis legantaron efektive tutmondan, kaj tio certe influis ilian verkmanieron, kaj sekve la literaturan tradicion de la lingvo. Ĉu aŭ ne tiu literaturo "egalas" la literaturojn nacilingvajn, ŝajnas al mi demando superflua, tamen ĝi estas de tempo al tempo starigita. Oni ne komparu literaturon centjaran kun literaturo miljara. Ĉiu literaturo havas siajn amatajn verkojn pli aŭ malpli nekonatajn eksterlande; ju malpli granda la nacio, des malpli disvastigita la kontakto de tiuj verkoj. Ĝuste tial la tradukado en Esperanton estas tiel grava. La literaturaj revuoj en Esperanto⁹ liveras samtempe "centralojn" de la internacia kulturo kaj la bazojn de kultura komuneco inter la originalaj verkistoj. Mi povas diri, ke unuopaj verkoj en la revuoj sufiĉe ofte influis mian propran verkadon. Certe mi ne estas la sola!

Ĉu en Esperanto jam aperis verkoj, kiuj indas tradukiĝi en la aliajn lingvojn? La respondo devas esti jes — ĉar tio jam okazis. Estas eldonitaj, ekzemple, "Kredu min, sinjorino" en la hungara kaj la japana, "Metropoliteno" en la angla, "La infana raso" en la nederlanda, "Mistero minora" en la pola, "Pri arto kaj morto" en la portugala, ktp. Oni eĉ sukcese filmigis romanon de Jean Forge. Se mankas al ni nediskutebla genia verkisto, nia literaturo

tamen ne estas senvalora. Cetere, tradukado de verkoj kiel "Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud", "Kiel akvo de l' rivero", aŭ "La infana raso" en alian lingvon estas elstare malfacilega tasko, pro la altnivelo kaj subtileco de la literatura lingvaĵo de la originaloj. Pri angla versio de "La infana raso" D-ro Humphrey Tonkin skribis:

"Finfine, ŝajnas al mi, ke la traduko konsterne ja pruvas la tute unikajn kvalitojn de la poezio Esperanta, kiujn efektive oni ne povas senŝanĝe enangligi kaj funkciigi. Eble pro tio, ke ni edukiĝis pere de la poezio angla, ni emas supozi, ke tio ne estas ĝusta, kio ne sonas ĝusta en la angla lingvo, sed la momenta ektimo, ke la belo de Esperanto estas iluzia ĉar en la angla ĝi estas sensuka, estas rapide anstataŭata, ĉu ne, per firma konvinkiĝo, ke en la Esperanta literaturo ni posedas ion unike valoran, kiu estas ne nur ideologia sed ankaŭ lingva, kaj dependas, ne de mondstarpunkto, sed de konscio pri lingvaj interrilatiĝoj."

Cetere, tiun anglan tradukon entuziasme akceptis literatura agentejo, kiu "opinias, ke ni povos vendi ĝin". Post ses monatoj ĝi raportis malsukceson: "La malfacilo pri la provo interesi eldonistojn pri 'La infana raso' estis tio, ke oni devis persvadi ilin, ke ili traktu serioze verkon Esperantan. . . traduko el lingvo, kiun en tiu ĉi lando oni ne traktas sufiĉe serioze por allogi merkaton". Malgraŭ tio, la poezia redaktoro de grava eldonejo "estis imponita de la verko kaj ĝin submetis al la tuta redaktora kiel eblan eldonaĵon". Tia sinteno al Esperanto kaj ĝia literaturo bedaŭrinde ne estas tute malofta. Sed nur tiu rajtas juĝi la valoron de iu literaturo,



Literaturaj verkoj en Esperanto eldonitaj en iuj landoj

kiu scipovas la lingvon, per kiu ^{3.} Samloke, p. 4.
ĝi kreiĝis.

La literaturo de Esperanto estas jam tiel kreskinta, ke estas por multaj esperantistoj malfacile aliri ĝin, parte pro financaj bariloj, parte ĉar mankas facile alireblaj pruntbibliotekoj. Feliĉe, okaze de la centjara jubileo, UEA eldonas serion de antologioj, per kiuj oni povas ricevi almenaŭ partan superrigardon de ĝiaj konturoj, ankaŭ en jam historia kunteksto. Jam aperis, bele presita en Ĉinio, "Esperanta antologio" (poezio), kaj baldaŭ aperos proza antologio kaj "Nova Esperanta krestomatio". Espereble tiuj libroj estos larĝe studitaj; estus domaĝe, se perdiĝus pro simpla nescio la literatura tradicio, kiu estas iel la mortero de nia internacia kulturo. □

1. William Auld estas fama Esperantisto-poeto kaj eksprezidanto de la Akademio de Esperanto. Li verkis la artikolon speciale por la Jubilea Jaro de Esperanto.
2. Privat, Edmond. PRI ESPERANTA LITERATURO. Paris, 1912, p. 3.

4. Frenkel, Romano. VERDAJ FAJRETOJ. Bruĝo, 1908, p. 4. Emba. EN EKZILO. Budapest, 1938, p. 27. Ambaŭ represitaj en "Esperanta antologio".
5. Vallienne, D-ro. KASTELO DE PRELONGO. Paris, 1907. 515 p.
6. Ekzemplojn, pro evidentaj kaŭzoj, la aŭtoro ne donas ĉi tie.
7. Auld, W. "La internacia lingvo kiel belarta tradukilo", en PRI LINGVO KAJ ALIAJ ARTOJ. Antverpeno/La Laguna, 1978, p. 95.
8. Verk. cit. sub 7. Ankaŭ "Kompara literaturo — ĉu eble studobjekto" en Auld, W. FACE TOJ DE ESPERANTO. Londono, 1976, p. 27.
9. Ekzemple: La revuo (1906-1914); Literaturo (1919-1925); Literatura mondo (1922-1926, 1931-1938, 1947-1949); Malgranda revuo (1943-1952); La nica literatura revuo (1955-1962); Norda prismo (1955-1974); Monda kulturo (1962-1966); Literatura fojro (1970-); Fonto (1980-); k.m.a.

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

- * 40-j Brunhilde Kromer dez. kor. kun familio pri diversaj temoj. Adr.: Obotritenring 223, 2754 Schwerin, DDR.
- * 22-j komencanto dez. kor. tm, speciale kun ĉinaj kaj sudamerikaj esperantist(in)oj. Adr.: Ravary J. Francois, 25 rue des Tulipes. Trelissac, 24750 Perigueux, Francio.
- * 20-j studento de Muzika Altlernejo volas konatiĝi kun ĉinaj esperantistaj muzikistoj. Mi ludas violonĉelon, kaj mi atendas unuavice leterojn de arĉinstrumentistoj. Adr.: Machlik Mario, 7400, Leva koz 2. 111. /4, Kaposvar, Hungario.
- * Guangdong Zhanjiang Esperanto-Asocio kolektas pm, pk, kaj E-aĵojn por E-ekspozicio. La sendanto ricevos dank-respondon kaj konvenan donacaĵon. Antaŭdankon por via kunlaboro kaj helpo! Bonvena estas amika inter-rilato. Adr.: S-ro Wu Weiguang, 30, Minxiang Xi Si Lu, Xiashan Qu, Zhanjiang, Guangdong, Ĉinio.
- * Tan Manxi (21-j studento), dez. kor. tm, speciale kun jugoslavaj esperantistoj pri ĉiutaga vivo, kaj interŝanĝi pm, pk kaj Esperantaĵojn. Adr.: Keji Qingbao Shi, Hubei Nong Xue Yuan, Jiangling Xian, Hubei, Ĉinio.
- * Marko Minkisiewicz dez. kor. tm. Adr.: P.P.R. 6 m 10, PL 88-100, Jnowroclaw, Pollando.

1859

de G. WARINGHIEN (Francio)

La jaro 1859 ne elvokas, por la ordinara homo, aparte rimarkindan memoraĵon, kaj tamen ĝiaj postsignoj markis konsiderindajn alpaŝojn en la vojiro de la homaro al tiu preskaŭ neatingebla celo, la paco.

La 24an de Junio 1859 kontraŭstaris, sur la ebenaĵo de Solferino, en la norda Italio, du potencaj imperiestroj, Napoleono la Tria kaj Francisko Jozefo la Unua, ĉiu je la komando de sia armeo, la franca-sarda el 140 mil homoj kaj la aŭstra el 180 mil. La batalo, kiu estis decidofara por la sendependeco de Italio, daŭris la tutan tagon kaj finiĝis per la cediĝo de la aŭstroj. Sed la masakro atingis senprecedentan dimension: oni kalkulis 17 mil mortintojn ĉe la venkintoj kaj 22 mil ĉe la venkitoj, kaj la nombro de la vun-

ditoj larĝe superpasis tiujn ciferojn. La informo pri la venko levis entuziasmon ĉe la franca kortego, sed ĝin ne dividis la spiritoj, kiuj rigardis la vivon de homoj pli valora ol ĉia gloro. Inter ili sin montris plej frue la granda franca poeto Viktoro Hugo. En Gernezejo, lia insulo de ekzilo, la informo pri la sangoplena buĉado tuŝis lin post kelkaj tagoj tra la anglaj gazetoj, kaj jam la 2an de Julio li kriis sian indignon en jena poemo, unu el liaj plej admirindaj, kvankam malplej ofte citataj, pro evidentaj politikaj motivoj:

*De ses mil jaroj la milito
plaĉas al l' akraj popolkoroj,
kaj Dio sian tempon perdas
je far' de steloj kaj de floroj.*

Konsiloj de l' ĉielo vasta,

D-ro L. L. Zamenhof en Dresden, Germanio, en 1908



de l' puro de lili' kaj nestoj
forviŝas ne ĉian frenezon
el la animo de l' hom-bestoj.

Masakroj, venkoj, jen nur kio
donas al ni nian plezuron;
kaj la amasoj nigre svarmaj
sonigas por tintil' tamburon.

La glor' sub siajn or-ĥimerojn
kaj sub triumfajn siajn ĉarojn
metas, ho ve! ĉiujn patrinojn
kaj ĉiujn infanetajn karojn.

Nia feliĉ' estas kruela:
"Ek al la mort'!" jen ĝiaj tonoj;
ĝia dezir': en buŝo havi
salivon de la klarionoj.

Brilas la ŝtal', bivakoj fumas;
palaj, perforton ni aklamas;
la mallumaĵoj de l' animoj
je l' meĉo de l' kanon' ekflamas.

Kaj tio por altrangaj moŝtoj,
kiuj, post via enterigo,
tuj interŝanĝos ĝentilaĵojn,
dum vi ekputros sub eriko,

kaj dum ĉe l' kampo de pereoj
ŝakaloj kaj rabbirdoj fiaj
venos esplori, ĉu plu restas
karnaĵo ĉirkaŭ ostoj viaj.

Neniu gent' elportas, ke la
alia vivu en apudo;
oni enblovas la koleron
en nin, pro nia stulta krudo.

Jen ruso! Buĉu, klabobatu!
Kroato! Paŝu tuj sen halto!
Tre juste. Kial tiu viro
sin vestis do per blanka palto?

Ĉi tiun ankaŭ mi ekstermas
kaj iras plu kun memestimo,
tial ke li la krimon kulpis
naskiĝi dekstre de l' Rejnlimo.

Ho Rosbach, Waterloo! Ho venĝo!
La hom', ebria de l' hordbruo,
ne havas plu alian personon
ol por masakro kaj detruo.

El fontoj oni povus trinki,
en ombro preĝi surgenue,
ami, revadi sub la kverkoj—
murdi la fraton 'stas plu ĝue.

Oni sin hakas, sin harpunas,
kuras tra montoj kaj tra valoj.
Timego kroĉas sin per pugno

je la kolharoj de l' ĉevaloj.

Kaj tamen sur la kamp' aŭroras!
Ha! miras mi ĉu tiu aŭdo,
ke hom' malamoni povas havi,
kiam ekkantis la alaŭdo.

(el "La kantoj de
stratoj kaj arbaroj")



D-ro L. L. Zamenhof kaj lia edzino vizitis la
tombon de G. Washington.

La reagoj al la amasbuĉo de Solferino ne
limigis sin al paroloj, kiel ajn elokventaj ili estas.
Hazarde, unu juna sviso, kiu bezonis la apogon
de Napoleono la Tria por sukcesigi unu sian en-
treprenon en Alĝerio, estis petinta de li akcep-
tiĝon, kaj la imperiestro difinis al li por la ren-
kontiĝo la urbeton Castiglione delle Stiviere, kie
establiĝis lia stabo. Alproksimiĝante al tiu loko,
Henri Dunant estis konsternita de la kvanto da
vunditoj, kiujn oni alportadis en la tutan ĉir-
kaŭaĵon kaj apenaŭ povis prizorgi. Kun la scivo-



- D-ro L. L. Zamenhof inter la komitatanoj de la Varsovia Societo Esperantista. En la unua vico de maldekstre: Grabowski, Zamenhof, Zakrzewski; en la dua vico: Kabe, Brzestowski, Belmont

lemo de junulo (li estis 31-jara) li iris viziti la batalkampon, kaj la terura spektaklo de la diversnaciaj soldatoj, tie forlasitaj sen kuracado kaj baraktantaj en la doloroj de agonio, tiel skuis lian koron, ke forgesante siajn proprajn interesojn, li revenis Ĝenevon kun la intenco fondi ian organizon, kiu ebligus trakti la viktimojn de milito kun iom da humaneco. El tiu noblanima klopodado rezultis, kvar jarojn poste, la starigo de neŭtrala kaj nepolitika "Ruĝa Kruco", kaj en 1864 la subskribo de la fama "Ĝeneva Konvencio", kies aliĝintoj devontigis sin prizorgi la militvunditojn, al kiu ajn nacio ili apartenas. La konvencio estis en 1929 larĝigita al la militkaptitoj (mi mem profitis ĝian efikon dum mia malliberiĝo en Germanio), kaj fine en 1949 al la virinoj, infanoj kaj maljunuloj, kiujn ĝi celis protekti kontraŭ la diversaj perfortoj, ordinaraĵoj de okupacio. Kvankam ne ĉiuj ŝtatoj ĝin subskribis, la starigo de tiu konvencio prezentas

JULIO ARGÜELLES GARCIA (Hispanio):

Miaj impresoj pri la 71-a UK en Ĉinio

Unue mi devas diri, ke mi ne forgesos mian restadon en Ĉinio, precipe pro la bonega akceptado de la ĉinoj al ĉiuj geesperantistoj, kiuj ĉeestis tie. Ili estas tre atentemaj, afablaj, ne nur la ĉinaj geesperantistoj, sed ĉiuj homoj, kiujn ni trovis sur la stratoj, geservistoj, gekelneroj, ŝoforoj ktp.

Mia unua surprizo estis en la flughaveno en Pekino: Kiam nia grupo, atendante valizojn, estis en ronda konversacio, ni aŭdis: "Kie estas la Esperanta grupo el Hispanio?" — demando per perfekte prononcita hispana lingvo. Ni ĉiuj turnis niajn kapojn al la loko, kie sonis la voĉo, kaj ni trovis virinon mezaĝan, kiu montris rideton sur siaj lipoj. Ĉi tiu rideto estas simbolo de ĉiuj ĉinoj, kiel mi povis konstati dum la veturado

tra Ĉinio. Post salutoj kaj prezentado ŝi tre afable invitis: "Iru al la aŭtobuso."

Ni avertis ŝin: "Ni ne povas iri al la aŭtobuso, ni atendas niajn valizojn."

Ŝi respondis al ni: "Ne estas problemo. Viajn valizojn vi trovos en viaj ĉambroj. Venu kun mi."

Ni sidiĝis sur sidlokoj en la aŭtobuso, kaj ŝi proponis iri al la hotelo aŭ komenci vizitojn al diversaj lokoj tra Pekino, ĉar restis tri horoj ĝis tagmanĝo en la restoracio (en ĉi tiu momento estis la 9-a matene). Unuanime ni diris: "Estas preferata la vizitado."

Tiel ni komencis nian restadon en tiaj belegaj lando kaj urbo.

LKK de UK, el la Ĉina Esperanto-Ligo, aranĝis tre perfekte ĉiujn aferojn de sia kompetenteco: kunvenoj por malsamaj branĉoj, prelegoj, ekskursoj, diversaj aktoj kiel teatraĵo, ĉina opero, arta vespero, bankedo. Mi devas substreki la Esperantologian Konferencon, tre interesan temon. Krom ĝi, ankaŭ folklora vespero, balo en hotelo de Pekino, ĉefe tuttaga ekskurso al la Granda Muro (mi dirus Granda Murego). Tien veturis ĉiuj gekongresanoj per pli ol 55 aŭtobusoj: vidi ilin sur ŝoseo, kiel longa serpento da veturiloj, estis granda spektaklo. Neforgeseblaj tagoj. Por mi, tiu estis la plej bona UK, ne nur pro la etoso dum nia restado en Pekino, sed ankaŭ pro la aliaj travivaĵoj, kiujn mi rakontos sube.

Mao Cui, nia gvidantino, kiu

gravan internacian progreson kaj glortitolon por Svislando.

Tamen, antaŭ la hereda plago, kiun konsistigas la milito, ĝi aspektis kiel speco de postoperacia kuracado, ne kiel preventa medicinaĵo. Estas feliĉa koincido, ke ĝuste en la fino de tiu sama jaro 1859, la 15an de Decembro, naskiĝis en la rusa (nun pola) urbo Bjalistoko tiu, kiu estis destinita alporti novan kuracilon "al la mond' eterne militanta", Lazaro Zamenhof, la patro de Esperanto.

Ho, ni ĉiuj scias, ke la alpreno de lia neŭtrala lingvo ne sufiĉos per si mem, por ekstermi la militon. Li mem ne hezitis tion deklari en la Ĝeneva Kongreso, en 1906: "Ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj; ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝelojn; ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj; sed ni kredas, ke

komunikiĝado kaj konatiĝado sur neŭtrala fundamento forigos almenaŭ la grandan amason de tiuj bestaĵoj kaj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de malbona volo, sed simple de reciproka sinnekonado kaj de devigata sinaltrudado." Jes, la kontribuado de Esperanto kiel rimedo de interkompreniĝo sur tereno de lingva egaleco estas ja ankoraŭ malforta helpo en la batalo kontraŭ la milito; sed antaŭ la terura akcelado de la detruaj rimedoj — en malpli ol kvardek jaroj oni pasis de la kanon-obusoj al la satelitaj atombomboj, tiel ke la nun stokitaj nukleaj armiloj sufiĉus por malaperigi ĉian vivon sur la planedo Tero — antaŭ tia ebleco de kolektiva sinmortigo, ĉia kuracilo, eĉ la plej malforta, estas bonvena kaj utiligenda. Kaj se la alpreno de Esperanto prezentas ankoraŭ nuntempe nur unuan paŝeton al tia interfratiĝo de la homoj, tiun paŝeton ni ne rajtas rifuzi fari, ĉar tio estus rifuzi nian partoprenon en la saviĝo de nia propra specio. □

akceptis nin en la flughaveno de Pekino, akompanis nin dum la tuta trairado en Ĉinio, ĉar ni vizitis Ŝĵian, Ŝanhajon, Hangĝoŭ, Guĵlin, Kantonon kaj Hongkongon.

Krom nia gvidantino, en ĉiuj urboj jam menciitaj atendis nin gvidanto aŭ gvidantino de la koncerna loko, ankaŭ hispanparolantoj, kun perfekta elparolo de nia nacia lingvo. Ankaŭ mi devas diri, ke en kelkaj vendejoj ni trovis vendistinojn, kiuj parolis hispane. Estis por mi granda fiero trovi tiajn spertajn hispanparolantojn. Kune kun la du gvidant(in)oj ni nenie havis problemojn, nek en la vendejoj, nek en aliaj lokoj: stacidomoj, flughavenoj kaj hoteloj, kaj dum vizitado al la diversaj mirindaĵoj, palacoj, ĝardenoj, pagodoj kaj temploj kaj dum veturado per ŝipoj ktp.

En Ŝĵian, grupanoj de Esperanta Klubo atendis kaj invitis nin al la kunveno aranĝita en hotelo. Tie ni renkontiĝis denove kun aliaj samideanoj. Kel-

kajn el ili ni konis dum UK. Ni estis prezentataj al ĉiuj.

Mi ne povas priskribi la pejzaĝojn de diversaj urboj, ĉar mi longigus ĉi tiun rakonton, sed, ĝenerale, mi povas certigi la belecon de ĉi tiu vastega lando.

Nova surprizo, ke en Ŝanhajoj niaj samideanoj tieaj invitis nin per renkontiĝo. Bedaŭrinde nia grupo malfruis. Ni eniris en grandan salonon, kie jam aliaj grupoj estis sidantaj kaj komencis kunvenon. Per mikrofono ni aŭdis salutojn kaj bondezirojn. Tuj post nia eniro ili dediĉis al ni grandan aplaŭdadon, ĉar ili estis atendantaj nian alvenon. Reciproke ankaŭ ni aplaŭdis ilin pro ilia ĝentileco, malgraŭ nia malfrua eniro. Nia samideano Arroyo el Madrido faris saluton je la nomo de hispanaj esperantistoj, kaj mi donis tri afiŝojn de Gijon al la estraranoj de la grupo, je la nomo de la Astura Esperanto-Asocio, kio multe plaĉis al ili. Ili promesis al mi, ke tiuj afiŝoj ornamos ilian sidejon.

Manĝado, ho, la manĝado! Grava problemo pro la uzado de manĝbastonetoj. En la unua fojo ĉiuj miris pro tiuj iloj, sed kiel mi diris supre, la gekelneroj (plej bone la kelnerinoj) helpis nin, montrante, kiel ni devas preni la bastonetojn inter la fingroj, poste, kiel ni devas movi unu el ili. Tiamaniere ili faris nin spertaj manĝantoj per manĝbastonetoj. La nutraĵoj estis abundaj kaj bongustaj. Ĉiam la rizo aperis inter la pladoj aŭ ujoj de nutraĵoj, konsistantaj el vegetaloj, viandoj, legomoj, fiŝoj, marbestoj, dolĉaĵoj kaj supo. Ĉi tiu estas la lasta aŭ antaŭlasta nutraĵo servita sur la ronda tablo. Finfine fruktoj, ĉiam sen pano ĉe la ĉefaj manĝaĵoj. La matenmanĝo estas, same kiel en aliaj landoj, marmelado, butero, fromaĝo, pano kaj ovaĵoj. La trinkaĵoj estas kafo, teo, minerala akvo, biero ("San Miguel") kaj oranĝosuko.

Tiaj estas miaj impresoj pri Ĉinio. □

**ĈEN JŪAN ELEKTITA KIEL
MEMBRO DE LA HONORA
PATRONA KOMITATO
DE UEA**


En septembro 1986 la Komitato de UEA elektis per koresponda voĉdonado s-ron Ĉen Jŭan kiel membron de la Honora Patrona Komitato (HPK) de UEA. S-ro Ĉen Jŭan estas vicministro de la Ŝtata Komisiono pri Lingvo de Ĉinio, direktoro de la Instituto pri Aplikata Lingvistiko sub la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj kaj vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo.

Per la sama koresponda voĉdonado la Komitato de UEA elektis s-ron Ralph Harry prezidanto de HPK. S-ro Ralph Harry iam funkciis kiel ambasadoro de Aŭstralio ĉe la Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko kaj nun estas prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio.

Nun HPK havas 12 membrojn. Krom Bakin kaj Ĉen Jŭan el Ĉinio, la ceteraj estas famaj eminentuloj de la politika, scienca, kultura, literatura kaj eduka rondoj el Svedio, Aŭstralio, Nederlando, Finnlando, Britio, Usono, Danlando, Bulgario, Hispanio kaj Japanio.

**ĈINIO SOLENE FESTOS LA
100-JARAN JUBILEON DE
ESPERANTO**

Ĉinio aranĝos diversajn aktivadojn por solene festi la 100-jaran jubileon de Esperanto: la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la Nacia Komisiono de la Ĉina Popola Respubliko por Unesko kune okazigos en Pekino festkunvenon; oni okazigos la Duan Ĉinan Kongreson de Esperanto kaj samtempe festkunvenon tiurilate; la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisios memorigan poŝtmarkon pri la 100-jara jubileo de Esperanto; oni eldonos "Vortaron Esperanta-Ĉinan" kaj aperigos artikolojn en ĉefaj



Ĉen Jŭan prelegas en la 71-a UK.

ĵurnaloj kaj revuoj kaj elsendos ilin en radiostacioj. Esperantaj organizoj de diversaj lokoj okazigos simpoziojn, prelegojn kaj ekspoziciojn de Esperanto.

**NAŬ ESP-ASOCIOJ NOVE
FONDITAJ**

En la fino de 1986 fondiĝis en Ĉinio naŭ Esperanto-asocioj, nome la Esperanto-Asocioj de Ĝeĝjang, Ĝjnan, Tangŝan, Ĝuĝou, Ĉenĝou, Uĝou kaj Tjanŝuj, la Ŝenjang-a Junulara Esperanto-Asocio kaj la Ĝuangŝji-a Sciencist-Teknikista Esperanto-Asocio (prepara komisiono). Ili sidas en ses provincoj kaj ŭĥu aŭtonoma regiono de Ĉinio. Estroj de lokaj koncernaj departe-

mentoj ĉeestis la fondkunvenon kaj ĝojis pri la sukcesoj de la Esperanto-movado gajnitaj en la lastaj jaroj. Por subteni la Esperanto-movadon, iuj el ili volonte akceptis la inviton funkcii kiel honora prezidanto de Esperanto-asocio. La lokaj radiostacioj, televid-stacioj kaj ĵurnaloj raportis pri la fondiĝo de la asocioj.

**LA REVUO "ESPERANTA
LITERATURO" FONDITA**

La nomita revuo kun ĉinaj verkistoj Bakin kaj Cicio Mar (Chun-Chan Yeh) kiel la ĉefredaktoro kaj konsilanto estis eldonita antaŭ nelonge de la Eldonejo de la Centra Ĉinia Politekniko. La verkistoj

Ceestantoj de la fondkunveno de la Ĝeĝjang-a Esperanto-Asocio



skribis vortojn por ĝia unua numero. Cicio Mar skribis por ĝi ankaŭ enkondukan artikolon. "Esperanta Literaturo" aperigas ĉefe originalajn kaj tradukajn verkojn de Esperantaj verkistoj kaj tradukistoj. Ĝi esperas kunlaboron de diverslokaj esperantistoj.

CINIO FESTIS LA 127-AN DATREVENON DE LA NASKIĜO DE ZAMENHOF

Meze de decembro 1986 esperantistoj de dekoj da ĉinaj urboj, kiel Pekino, Ŝanhajo, Hangĝoŭ, Jangĝoŭ, Ŝenjang, Huhhot, Ĉangŝa, Nanĉang, Ĉongĉing, Suĝoŭ, Anjang kaj Dunhŭa, aranĝis diversajn aktivadojn por festi la 127-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof. Ĉen Haŭsu, vicurbestro de Pekino, faris varman paroladon en la festkunveno de Pekino. Li diris: "La espero de la homa solidareco, kiun Zamenhof portis, ne estas utopio. La antaŭvido kaj saĝo montritaj de li en la kreado de Esperanto kaj lia sindonemo por la realigo de la alta idealo ĉiam indas niajn admiron kaj memorigon." Esperantistoj de la Huhhot-a Esperanto-Asocio okazigis ekspozicion de fotoj kaj projekciis bildbendon pri la 71-a UK. La Suĝoŭ-a Esperanto-Ligo okazigis la amuzan vesperon "Amikoj de Esperanto". Esperantistoj de Nanĉang organizis en Baji-parko memorigan aktivadon kaj prezentis en Esperanto diversajn programe-

rojn. Esperantistoj de Anjang partoprenis la konkurson pri Esperantaj scioj. La Ŝanhaja Esperanto-Asocio okazigis kunsidon.

STARIGO DE ESPERANTO-AKADEMIO EN JHELUMO

Okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto fondiĝis la Esperanto-Akademio en Jhelumo, Pakistano, en la pasinta jaro. La ĉefa celo de tiu akademio estas disvastigi Esperanto-movadon en Pakistano kaj aliaj islamaj landoj. La fondinto estas fame konata pakistana esperantisto s-ro Saeed Ahmad Farani. Ili decidis publikigi materialon pri kaj en Esperanto kaj eldoni ĝis la fino de 1987 kvin librojn, inter kiuj du estas tradukitaj el la persa kaj urdua lingvoj. Ili bezonas helpon por financi siajn agadojn.

NORVEGAJ ESPERANTISTOJ EN LA JUBILEA JARO DE ESPERANTO

Laŭ la informo de prezidanto de la Norvega Esperantista Ligo Elna Matland, la Jubilea Komisiono de NEL fondiĝis antaŭ 4 jaroj. Ĝi organizis "migrantan ekspozicion" jam dum 2 jaroj, eldonis afiŝon kun desegnaĵo kaj titolo "Jes, ni parolas Esperanton" kaj aranĝis konkurson inter la lernantoj en la lernejoj por progresintoj kaj konkurson kun la tasko de la mondaj lingvaj problemoj. La unua premio estas vojaĝo al la Junulara

Kongreso en Krakovo en 1987. Ili instigis la norvegan poŝtadministracion eldoni dukoloran broŝuron kun la titolo "Skriv brev pa Esperanto" (Skribu leteron en Esperanto). La nacia komisiono por Unesko eldonos broŝuron kun la titolo: Esperanto kaj Unesko.

La tutlanda kongreso de Esperanto okazos inter la 23-a kaj 25-a de majo 1987 en la ĉefurbo Oslo.

Norvegaj esperantistoj malavare donacis por la jubilea fonduso entute 50 000 NKR.

JUNULARA RENKONTIĜO EN BERNBURG

Inter la 17-a kaj la 20-a de oktobro 1986 la Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR organizis la renkontiĝon de junaj esperantistoj. La aranĝon partoprenis ankaŭ 11 gejunuloj el Pollando.

LA 111-A MEDICINA TAGO

La 25-an de aŭgusto 1986 kadre de la 24-a Tutpollanda Esperanto-Kongreso en Krakovo la Medicinista Sekcio organizis jam la 3-an fakan forumon de medicinistoj nomatan MEDICINA TAGO.

La programo konsistis el 7 disertacioj (prelegoj), kiujn aŭskultis 20-100 personoj.

Polaj medicinistoj kore kaj varme invitas ĉiujn gekolegojn al Krakovo, kie okazos ĉijare la VI-a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco inter la 19-a kaj la 23-a de julio.

ARTIKOLO EL EPĈ EN "JAPANA INFANA LITERATURO"

En la numeroj 1 kaj 2 de 1986 de EPĈ aperis la prelego de fama ĉina verkisto Chun-Chan Yeh "Hans Andersen en Ĉinio". Japana veterana esperantisto Kurisu Kei tradukis ĝin en la japanan lingvon kaj publikigis en la n-ro 9 de 1986 de "Japana Infana Literaturo", organo de la Asocio de Japanaj Infan-Verkistoj. □

Esperantaj ekspozicio kaj konsultiĝa aktivado okazigitaj de esperantistoj de Ĉjuĝjang, Ĝuangdong-provinco, ĉe la 127-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof



Loĝlokoj de ĉinaj paleoantropoj

de LAN ŜAN

Ĉinio estas unu el la fontoj de la homa civilizacio. Granda kvanto de loĝlokoj de paleoantropoj trovitaj iom post iom malkaŝis la evoluadon de la historio de Ĉinio.

Antropologoj opinias, ke la plej intimaj prapatroj de la homaro estis lama-paleoantropoidoj vivantaj antaŭ 14 milionoj da jaroj. Ĉinaj arkeologoj trovis jam fosiliojn de lama-paleoantropoidoj en la gubernioj Kajjŭan kaj Lufeng de Junnan-provinco. Ĝuste pro tio Ĉinio, Hindio kaj orienta Afriko estas rigardataj kiel la plej fruaj fontoj de la homaro.

Lama-paleoantropoidoj jam povis iri rekte kaj uzi neprilaboritajn bastonojn kaj ŝtonpecojn en ĉasado, sed ankoraŭ ne sciis fari instrumentojn. Antaŭ 2-3 milionoj da jaroj aperis homoj, kiuj sciis fari instrumen-

tojn. Ĉar ili konservis en si multajn trajtojn de paleoantropoidoj, tial ili estis nomataj simihomoj. El la fosilioj de simihomoj trovitaj en Ĉinio la plej famaj estas tiuj de Jŭanmoŭ-, Lantjan- kaj Pekin-homoj.


Jŭanmoŭ-homoj vivis antaŭ 1.7 milionoj da jaroj. Ili ricevis la nomon pro tio, ke ili estis trovitaj en Jŭanmoŭ-gubernio de Junnan-provinco. La fosiliaj homoj estis la plej frue trovitaj ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en Azio. En 1963 kaj 1964 oni trovis en Lantjan-gubernio de Ŝenŝji-provinco kraniojn, suprajn kaj mal-suprajn makzelojn kaj dentojn de simihomoj vivantaj antaŭ 800 000 jaroj kaj nomis ilin Lantjan-homoj. Ĉi tiuj havis tre dikan kranion kaj larĝan fruntalon kliniĝantan rimarkinde malantaŭen, kun proksimume 780 mililitroj da encefalo. Ili

vivis en Ĉinio malpli frue ol Jŭanmoŭ-homoj. Pli poste estiĝis Pekin-homoj antaŭ 500 000 jaroj.


Okcidente de Ĝoŭkoŭdjan sudokcidente de Pekino troviĝas du montetoj. La orienta nomiĝas Longgu-monto. Antaŭ 500 000 jaroj primitivaj homoj vivis en tiu loko. Oni nomis ilin Pekin-homoj. Decembre de 1929 ĉinaj arkeologoj trovis fosiliojn de Pekin-homoj en kaverna ĉe la norda deklivo de la monto. Ili faris modelon de pekin-homa kapo laŭ la trovitaj fosilioj: Ĝi havis malaltan kaj platan fruntalon, dikajn ciliarojn, elstarajn zigomojn, dikan kranion kun 1 075 mililitroj da encefalo kaj etendiĝantan mentonon. Ĝi portis multajn trajtojn de simihomoj.

En la lastaj jardekoj oni elterigis ĉe la monto ostajn fosiliojn

Kaverna, kie vivis Pekin-homoj



Fajenca vazo elterigita ĉe Banpo-ruino



de pli ol 40 Pekin-homoj, centmil ŝtonajn instrumentojn fari-tajn kaj duonfaritajn, nombro- da ostaj kaj kornaj laboriloj. En la kaverno oni trovis spurojn de Pekin-homoj en fajro-uzado kaj cindron 6-metre dikan. Tie lasi- ĝis bestaj kaj fiŝaj ostoj kaj plan- taj semoj, kio montris, ke Pekin- homoj sciis uzi fajron por lumi- go, varmigo kaj manĝaĵ-rostado. Ili vivis kelkdekoje en primitiva stato de miksedziĝo. Ili parolis simplan lingvon. Pro ekstreme malfacila vivo ili vivis mallonge. La elterigitaj ostaj fosilioj mon- tris, ke triono de ili mortis en la aĝo de malpli ol 14-jaroj.

Post 200 000—300 000 jaroj la simihomoj evoluis al paleoan- tropoj. En Ĉinio oni trovis je- najn fosiliojn de paleoantropoj: Maba-homoj en la vilaĝo Maba de Ŝaŭgŭan de Gŭangdong-pro- vinco, Ĉangjang-homoj en Ĉang- jang-gubernio de Hubej-provin- co kaj Dingcun-homoj en la vila- ĝo Dingcun de Ŝjangfen-guber- nio de Ŝanŝji-provinco. Ilia korpo pli similas al tiu de la nunaj homoj ol la korpo de Pekin-homoj. Ekz., la kranio de Maba-homoj estas pli maldika ol tiu de simihomoj kaj ilia frun- to pli plena; la supra makzelo de Ĉangjang-homoj ne etendiĝas; kaj iuj trajtoj de la dentoj de Dingcun-homoj similas al tiuj de la nunaj mongoloj. Dingcun- homoj jam sciis fari per recipro- ka batado diversajn hakilojn unu- kaj plur-klingajn. Ilia socio jam iris en la stadion de samsan- ga amas-edziĝo. Tio montris, ke ili transiris de la primitiva hom- amaso al la klana sistemo.

Antaŭ 40 000—50 000 jaroj la paleoantropoj evoluis al novaj homoj, kiuj perdis trajtojn de simihomoj kaj tre similis al la nunaj homoj. En Ĉinio oni tro- vis jenajn fosiliojn de novaj ho- moj: Liŭĝjang-homoj en Liŭ-



Parto de ruino de Banpo


ĝjang-gubernio de la Gŭangŝji-a Ĝŭang-nacieca Aŭtonoma Re- giono, Zijang-homoj en Zijang- gubernio de Siĉŭan-provinco, Hetaŭ-homoj en Hetaŭ de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kaj kavernhomoj sur Longgu-monto ĉe Ĝoŭkoŭdjan de Pekino.

La kavernhomoj estis la plej evoluintaj el la novaj homoj. Ili vivis antaŭ 17 000 jaroj. Ilia korpo tre similis al tiu de la nunaj homoj. Ili faris ŝtonajn kaj ostajn instrumentojn per fro- tado kaj borado, kunkudris fe- lojn kiel veston per osta kudrilo, kunligis bestajn ostojn kaj kon- kojn por fari ornamaĵojn kaj ellernis la metodon uzi fajron. Ili havis simplan labordividon laŭ malsamaj seksoj kaj vivis en la matriarka socio, en kiu la fra- toj de unu klano kolektive edzi- ĝis al la fratinoj de alia klano.

En 1921 oni trovis loĝlokon de homoj de la malfrua neoliti- ko en Mjanĉi-gubernio de He- nan-provinco. Arkeologoj nomis tion ruino de Jangŝaŭ-kulturo. Poste oni trovis plurajn ruinojn de Jangŝaŭ-kulturo, el kiuj la plej fama estas Banpo-ruino pri- fosita en 1952, apud Ŝji'an de Ŝenŝji-provinco. Jangŝaŭ-kul-

turo aperis en la prospera pe- riodo de la matriarka komunumo antaŭ 6 000—7 000 jaroj. Banpo-ruino okupis areon de ĉ. 50 000 kvadrataj metroj. Ĝi di- vidiĝas en lokojn por loĝado, ceramikado kaj tomboj. Tie oni trovis grandan kvanton da sina- paj kaj brasikaj semoj kaj por- kaj, hundaj, bovaj, ŝafaj, ĉevalaj kaj kokaj ostoj. Tio montris, ke siatempe oni jam kulturis lego- mojn kaj bredis brutojn, kaj agrikulturo jam fariĝis ekonomia bazo. La elterigitaj fiŝretaj peza- ĵoj, fiŝhokoj, fiŝĉasiloj kaj sag- pintoj montris, ke la tiamaj fiŝado kaj ĉasado okupis gravan pozicion.

La postaj Daŭenkoŭ-kulturo kaj Longŝan-kulturo estis pli progresaj ol Jangŝaŭ-kulturo. La ruino de Daŭenkoŭ-kulturo estis trovita en 1959 unuafoje en Taj'an-gubernio de Ŝandong- provinco. Tiu kulturo daŭris de antaŭ 4 000 jaroj ĝis antaŭ 2 000 jaroj a. K. La prifosita tombejo de la klana komunumo montris grandan diferencon in- ter la kvantoj de entombigitaj objektoj. Krome oni trovis an- kaŭ geedzojn en sama tombo. Tio montris, ke la tiamaj socio ekiris en la stadion de la patriar- ka klana komunumo, en kiu



Ŝtonaj instrumentoj faritaj de Dingcun-homoj

aperis diferenco inter riĉeco kaj malriĉeco kaj praktikiĝis monogamio.

Longŝan-kulturo portas la nomon pro tio, ke ĝia ruino estis trovita en 1928 unuafoje en Longŝan-urbeto de Ĝangĉiu-

gubernio de Ŝandong-provinco. Ĝi prosperis antaŭ 4 000 jaroj ĉefe en la meza kaj malsupra basenoj de la Flava Rivero, tuj post Daŭenkoŭ-kulturo. Tiam la patriarkeco jam evidentiĝis. Kun apero de privata havaĵo, en la matriarka klano la pozicio de la

patriarko estis malsama ol tiu de la ordinaraĵoj, kaj ankaŭ tiu de la liberuloj tute diferenciĝis de tiu de la sklavoĵoj. Komen- ciĝis disfali la klana socio daŭ- rinta dekmilojn da jaroj kaj estis baldaŭ naskiĝonta nova soci- sistemo sklavismo. □

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkupo- no por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da raba- to. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respon- decas pri la enhavo de la anonce- toj, nek pri la plenumado de la pro- mesoj faritaj en ili.

* Luo Mingyong (25-j laboristo), dez. kor. pri literaturo, arto, fotografado, filatelo k.a. Adr.: Wan Yuan Zao Zhi Chang, Wanxian Shi, Sichuan, Ĉinio.

* 30-j junulo dez. kor. kun divers- landaj esperantistoj kaj filate- listoj, kaj interŝanĝas sperton de lernado de Esperanto. Adr.: Bi Bingqiu, Hengxian Yin Shua Chang, Guangxi, Ĉinio.

* Lin Qiusheng dez. kor. kun okcidento-eŭropaj geesperanti- stoj pri ĉina luktarto kaj

vojaĝo. Adr.: 164/32 Kai Feng Lu, Shanghai, Ĉinio.

* 25-j oficisto, dez. kor. tm pri fotado kaj angla lingvo Esper- ante kaj angle. Chen Shixiang, P.O.Box 111, 2; Shenyang, Liaon- ing, Ĉinio.

* S-ro Gong Wenliang(39-j), dez. kor. kun geamikoj tutmonde pri ĉiuj temoj. Certe respondos. Adr.: 20, Chenwei Lu, Hebei Qu, Tianjin, Ĉinio.

* 16-j Gyula Vass dez. kor. kun geesperantistoj tm pri sporto, muziko k.t.p., kolektas bk, pm kaj kalendarojn. Adr.: Bulevar- dulindentei, Nr 36 ap 10, 4150 Odorheiu-Secuiesc, Rumanio.

* 35-j geedzoj dez. kor. tm Esper- ante pri turismo, vojaĝoj, pro- blemoj de la nuntempa vivo, in- terŝanĝi bk. Halina kaj Zbig- niew Zawistowski, 46 Dwor- cowa, 21/7, 83-130, Pollando.

* 18-j Katalin Foris dez. kor. tm pri turismo, filozofio kaj vojaĝado. Adr.: R-4000 SF. Gheorghe, Str. Pacii Nr. 5. Rumanio.

* 18-j Katalin Horvath dez. kor. tm pri amikeco kaj vojaĝado. Adr.: R-4000 SF.Gheorghe, Str. Progresului, B1.23, ap.37, Ru- manio.

* 17-j Judit Foris dez. kor. tm pri turismo, filozofio kaj vojaĝado. Adr.: R-4000 SF.Gheorghe, Str. Pacii, Nr. 5. Rumanio.

* 17-j Emese Filipa dez. kor. tm pri biologio kaj filozofio. Adr.: R-4072 Moacsa, Str. Principala, Nr. 163, Rumanio.

* Marek Baczkowski 36-j dez. kor. tm pri fotado kaj vojaĝo. Adr.: Runek Novego Miasta 25 m 4, PL-00-229 Warszawa, Pollando.

* 26-j f-ino dez. kor. tm. Adr.: Sedigh, k: Shahid-Sabori-14. Roberoj Station Mansor Abad, kh: Tehran New, Tehran/16439. Iran.

* Rakotomanga Bruno dez. kor. kun ĉinaj amikoj pri diversaj temoj precipe pri wushu. Adr.: Lot II p 84 Bis, Avaradoha- Besarety, Tananarivo. 101. Madagaskaro.

Ok sanigaj ekzercoj (VIII)

(Daŭrigo)

Metu la maldekstran manon ĉe la talio aŭ maldekstra ingveno (se vi vin ekzercas kuŝante surdorse, do la mano estas libera). Frotu per la dekstra mano korpoparton maldekstre de la piloro, dekstren tra la umbiliko, kaj direktu la manon al la deirpunkto. Faru la samon pli ol 30 fojojn. Poste metu la dekstran manon ĉe la talio aŭ dekstra ingveno kaj frotu sammaniere per la maldekstra mano pli ol 30 fojojn en la kontraŭa direkto (Vd. bildoj 21 kaj 22). Frotu la ventron malforte. La ekzerco postulas longan tempon, tial kiu ne suferas intestajn kaj stomakajn malsanojn, ne faru ĝin aŭ masaĝu nur 5-6 fojojn.

Kiu ne povas froti sian ventron pro diversaj kaŭzoj, premu nur kelke da difinitaj punktoj anstataŭe: Kuŝu surdorse kaj premu la ventron per dikfingro de unu mano aŭ per ĝiaj montra, longa kaj ringa fingroj, dum la alia mano subtenu la premanantan manon kaj premu malrapide malsupren tiel forte, ke oni povas elteni la doloron. Ĉesu por momento kaj malrapide levu la manon. Premu tiamaniere la tutan ventron. Generale, vi devas premi 7-8 punktojn laŭ *ĵenmaj* (la meza linio de la ventro) aŭ ambaŭflanke de ĝi. La frotado ne nur akcelas la sango-cirkuladon en la ventro kaj helpas kuraci intestajn kaj stomakajn malsanojn, sed ankaŭ efikas por rapida endormigo.

Kiu ne povas froti sian ventron, frapetu ĝin per ambaŭ pugnoj.



21



22

Pro la seksa diferenco virinoj plejofte devas kuŝante froti malforte aŭ supren forte kaj malsupren malforte (Atentu precipe baldaŭ akuŝontaj pli aĝaj virinoj), ĉar la forta frotado povas vundi la internaĵojn kaj kaŭzi internaĵoptozon. Krom tio, ne estas diferenco de frotado inter viroj kaj virinoj.

Ventrofrotado utilas ne nur al digestado, sed ankaŭ al kuracado de diversaj intestaj kaj stomakaj malsanoj. Ĝi vigligas la funkciadon de diversaj organoj, akcelas metabolon, iom post iom likvidas fokuson de infekto kaj resanigas malsanulojn.

Absolute ne faru ventrofrotadon, kiam vi estas tro sata aŭ tro malsata. Antaŭ frotado vi devas ellasi akvon. La suferantoj de internaĵoptozo devas fari malfortan frotadon kuŝante kaj ankaŭ la suferantoj de hepatkaj lien-ŝvelo devas tiel fari.

Estas absolute malpermesite froti la ventron al tiuj, kiuj suferas malignan abdomenan tumoron, gastroperforadon, intestinal perforadon, hemoragion de internaĵoj, apendiciton kaj peritoneiton.

Estas normale, ke dum aŭ post la ekzercado vi aŭdas vian stomakan murmuron, furzas, ruktas, sentas ventrovarmon kaj malsaton kaj eĉ volas feki kaj pisi pro la ŝanĝiĝo de la fiziologia funkcio dum la stomaka kaj intesta movado.

(Daŭrigota)

Respondo por "Pensu kaj Respondu":

La tajdo neniam atingas la trian ŝtupon, ĉar la ŝipo kaj la ŝtuparo leviĝas samtempe kun la tajdo.

ORA BRILO

de LI ĈJANG

Oro, kiel oni scias, estas valora metalo. Ĝi havas eminentajn trajtojn kemiajn kaj fizikajn. La brilaj objektoj el aŭ kun oro aspektas impone, riĉe, noble kaj elegante. Estas teknologio aspirata kaj esplorata de homoj, kiel orumi objektojn el ordinaj metaloj, por ke ankaŭ ili ore brilu. La ĝenerale aplikata galvanizado ne apartiĝas de bonkompleksa ciano. Tamen nur 0.002 gramo da ciano povas mortigi homon. La laboristoj de or-galvanplasto, iom post iom kolapsiĝas en la longtempa laborado kaj ne povas sin liberigi de la Morto, kiam ili ofertas al la mondo orbrilajn objektojn. Ĉina inĝeniero Ljang Ŝjudong kaj la de li gvidata teknikista

grupo decidis venki ĉiajn malfacilojn kaj krei novan teknologion por subigi la demonon — cianon.

Komence de 1983, nelonge post kiam Ljang komencis la esploron pri la nova teknologio, al li estis taskita malfacila laboro — ripari la turojn el oritaj lamenoj de la Pekina Ekspozicio konstruita komence de la 50-aj jaroj. En la pli ol 30 jaroj post sia naskiĝo la turo serioze rustiĝis pro atako de vento, pluvo kaj sunlumo kaj ie sur ĝi la or-tavolo grandpece falis. Pro tio ĝi urĝe bezonis riparon.

Tamen la afero estis ne tiel simpla. La teknologio pri orumado estos kompleksa, konsumos

grandan kvanton da oro kaj bezonas hidrargon 7-oble pli multan ol la bezonata oro en la preparado. Tia teknologio estis de longe ne uzata. Koncerne orgalvanplastikon, oni devas malmunti la kuprajn lamenojn 1.5 metrojn longajn de sur la turo kaj prepari grandan orumujon, kio kompreneble estis malfacila. Ljang kaj liaj kolegoj decidis apliki la metodon ori la lamenojn per broso, kio tamen estis ne farita en Ĉinio. Ĉion oni devis komenci de la nulo.

Antaŭ ĉio, kiel forigi la minacon de ciano restis ankoraŭ kaptrompe. Ĉar la ora likvaĵo entenas cianon venenan, la laboristoj sentis ĝian odoron malagrabla, kapturita kaj naŭza. Post plurfojaj eksperimentoj Ljang preparis oran likvaĵon kun malmulte da ciano, sekve de tio, la malfacilo estis portempe eliminata. Tamen la ciana toksigo denove aperis ĉe la laboristoj en longtempa uzado de la likvaĵo. "Mi nepre forigos la minacon de ciano!" tiel pensante Ljang oferis ĉion sian al la streĉa esplorado kaj eksperimentado. Post duonjara penado li inventis sencianan orlikvobrosan teknologion. Dank' al la nova teknologio, la laboristoj ne plu suferis de ciano kaj la kupraj lamenoj estis ne malmuntitaj de sur la turo de la Pekina Ekspozicio. Ĝi tamen ore brilis denove.

Decembre de 1984, la nova

Ljang Ŝjudong en galvanizado





Ljang Ŝjudong (la unua de maldekstre) donas konsilojn al laboristoj.

teknologio sukcese trapasis la ŝtatan ekspertizon. Fakuloj opiniis, ke la teknologio sen ciano, malbonodoro kaj polucio povas ŝpari oron kaj estas vere eminenta, tial ĝi meritas plenan disvastiĝon. Ljang Ŝjudong gvidante sian teknikistan grupon komencis apliki la inventon en produkta praktiko. Per la nova teknologio ili orumis la 13 ĉinajn ideografiaĵojn sur la skulptaĵo "Paco" donacita de Ĉinio al Japanio, 5 budhostatuojn de Ĝebang-templo de Tibeto kaj la Ĉefurba Muzeo, rondajn ornamajn pintojn sur la tegmentoj de antikvaj haloj, la ornamajn najlegojn sur la pordegoklapoj de la Imperiestra Palaco en Pekino, 130 premipokalojn kaj 500 memorigajn monerojn. Fakte pruvis, ke la scienca teknologio karakteriziĝas per pura orkoloro, kompakta or-tavolo, glata surfaco, forta alglueco, korodimuneco kaj aliaj eminentaj trajtoj.

Aprile de 1986, Ljang kun sia nova invento partoprenis la 14-an Ĝenevan Internacian Ekspozicion pri Inventoj kaj Novaj Teknikoj. Tie lia scienca orumado allogis multajn

vizitantojn kaj Ljang fariĝis multe atentata persono. Ĉe la stando, li uzis apartan plumon ligitan kun elektra fonto kaj atente ŝmiris diversajn objektojn per ora likvaĵo, sekve de tio, la malhele koloraj ĉevaloj, budhostatuoj ekbrilis ore. Rapide sekigis la ora likvaĵo sur la figuroj. Ĝi forte algluiĝis al la figuroj. Scivolemo instigis rigardantojn elpreni siajn okulvitrojn, ringojn, harpinglojn, horloĝĉenojn, rimajn butonojn kaj metalmonerojn faritajn el arĝento, kupro, fero, aluminio, zinko, kaj peti Ljang orumi ilin. Tio kompreneble estis plej bona ekzameno por lia nova invento. Sendube Ljang konkeris la koron de la rigardantoj. Dank' al lia ŝmiro la objektoj ore ekbrilis kaj fariĝis pompaj. La scirolaj rigardantoj verŝis admirajn vortojn.

La ekspozicion partoprenis ĉ. 600 reprezentantoj el 22 landoj kaj regionoj. Tie eksponiĝis pli ol 1 000 inventoj. En la premia kunveno la prezidanto deklaris, ke Ljang Ŝjudong estas honorita per premio "invento de la disvolviĝantaj landoj" (ora meda-



Artaĵo galvanizita per nova tekniko.

lo), unu el la 19 specialaj premioj, ora medalo kaj gratula premio de la ekspozicio pro sia originala kaj praktika teknologio pri scienca orumado.

Ljang kun honoro revenis la patrolandon. Nun li dediĉas sian tutan energion al praktika aplikado kaj nova kreado. Ekspansiis lia teknikista grupo. La nova teknologio estas aplikata tra la tuta lando. Ili subskribis interkonsenton kun fabriko sub la Pekina Metiarta Kompanio pri orumado de tradiciaj klozoneaĵoj. En iliaj oficĉambroj vidiĝas orbrilaj klozoneaj homfiguroj kaj objektoj. Por ripari diversajn orumitajn objektojn Ljang esploras pri diverskolora orumado. Tio estas lia nova studobjekto. □

Junaj vartistinoj en Pekino

En la lastaj du jaroj aperis vartistina merkato en Pekino. La merkato plej viglas en festoj kaj ferioj. Inter la vartistinoj estas junaj knabinoj ruĝvizaĝaj kaj en belaj vestoj. Ili parolas kun dungantoj ĝenerale en sia dialekto.

“Ĉu vi loĝas en etaĝdomo?”

“Ĉu ĉe vi estas kolora televidilo kaj lavmaŝino?”

“Mi volas sola okupi unu ĉambron.”

“Mi ne prizorgos maljunulojn, nek bebojn malpli-ol-unujarajn.”

La dungantoj ĝenerale ŝatas laboremajn kaj honestajn vartistinojn. Tamen la postuloj de tiuj junaj vartistinoj surprizis la dungantojn. Kiel malfacile estas dungi vartistinojn!

En Pekino troviĝas 760 000 familioj de laborantoj-geedzoj. Kvankam en la lastaj jaroj multiĝis infanvartejoj kaj infanĝardenoj, kio tamen ne povis kontentigi la bezonon de la socio. Laŭ statistiko, Pekino bezonas 80 000 vartistinojn, sed nun estas nur 50 000 dungitoj. Pro tio en Pekino serioze mankas vartistinoj.

La ekonomia reformo de ĉinaj urboj rapidigas vivtakton de la homoj, tamen la socia servo ankoraŭ restas postiĝinta. Oni ankoraŭ renkontas multajn malfacilojn en infanvartado, veturado, manĝado, vestfarado kaj riparado. En iuj lokoj oni devas longe viciendi por matenmanĝo. Ili estas peze ŝarĝitaj per dommastrumado.

Pro manko de vartistinoj, infanoj kun ŝlosilo ĉe la kolo pli kaj pli multiĝas, akuŝintinoj foje refoje prokrastas denove eklabori pro infanvartado, iuj malfruas al laboro pro dommastrumado. La statistiko montras ke la mezaĝajn intelektulojn multe ĉagrenas la domlaboroj. La urbaj laboristinoj kaj oficistinoj ĉiutage okupiĝas pri domlaboroj pli ol kvar horojn kaj ili longtempe statas en laciga laborado. Manko de necesa flegado kaj edukado al infanoj de laborantoj-geedzoj jam fariĝis socia problemo.

La pezaj domlaboroj ne nur forrabas valorajn horojn por ripozo, amuzo kaj profesia laboro, sed ankaŭ malhelpas disvolviĝon de talento kaj inteligento de la laborantoj. La vartistina merkato naskiĝis kaj disvolviĝas ĝuste surbaze de tio, ke oni deziras sin liberigi de laciga dommastrumado.

La vartistinoj en Pekino venis el 24 provincoj, kaj duono de ili venis el Anhuj-provinco en orienta Ĉinio. Inter ili la plej aĝaj estas 22-jaraj kaj la plej junaj 15-jaraj. Dungite ili estas salajrataj ĉiumonate per 35-45 jŭanoj, krom senpagaj manĝo kaj loĝo. Ili plejparte estas klerigitaj en mezlernejoj kaj taŭgas por servi en la hejmoj de laborantoj-geedzoj kun modernaj elektraj ekipaĵoj, kies infanoj

Interkonsento farita



bezonas ilian helpon en lernado.

La kamparaj knabinoj laboras en Pekino kiel vartistinoj pro diversaj kaŭzoj, el kiuj la ĉefa estas superfluo de laborfortoj en la kamparo. Ekzemple, ĉ. 750 kamparaj knabinoj el la gubernio Uĥej, Anhuj-provinco, servas kiel vartistinoj en Pekino. En la gubernio ĉ. duono de la laborfortoj estas superflua. Kvankam la tieaj industrioj senĉese disvolviĝis en la lastaj jaroj, tamen tiu disvolviĝo estis limigita de diversaj faktoroj. La superflujaj laborfortoj ne povis ricevi laboron en la lokaj industrioj. Tial liverado de servoj al aliaj urboj estas la ĉefa eliro por la superflujaj laborfortoj.

Ĝenerale urboj forte allogas al si kamparajn gejunulojn per siaj ekonomia prospero kaj civilizita vivmaniero. Iuj knabinoj el la riĉaj kamparaj familioj laboras en urboj kiel vartistinoj ja por plivastigi sian vidkampon kaj vojaĝi tie, dum aliaj el la familioj de meza bonhaveco por sin vivteni. Ili laboras tie ne nur por plivastigi sian vidkampon sed ankaŭ por aĉeti al si vestojn kaj diversajn objektojn. Estas ankoraŭ aliaj, kiuj laboras tie por akumuli monon por sia edziniĝo, nur malmultaj por eviti devigan edziniĝon pro mono.

En Ĉinio estas proverbo: "Hejme estas bone ĉiam, sed ekstere ja neniam." Tiuj vartistinoj estis dorlotitaj de siaj gepatroj eĉ en mizera vivo kaj nun malgraŭ ke ili portas modajn vestojn, ili estas servistinoj. Ĉiutage ili gajnas netan enspezon de nur 1-1.5 jŭanoj. Tio atestas, ke multaj vilaĝoj en la ĉina kamparo restas malriĉaj.

Vartado estas antikva okupo en Ĉinio. Sed ĝi nun radikale



Vartistino en flegado

ŝanĝiĝis. Ĝeneraldire ankaŭ la vartistinoj servas al la popolo. En la malnova Ĉinio la vartistinoj estis humiligataj kaj diskriminaciataj. Tia fenomeno jam ne plu ekzistas. Nun la vartistinoj okupiĝas per infanvartado, kuirado, dompurigado, flegado de maljunuloj, malsanuloj kaj kripluloj. Tia laboro apartenas al la socia profesio. En la pasinteco la vartistinoj povis perlabori preskaŭ nenion krom ĉiutagaj manĝoj, nun iuj el ili ne nur enspezas preskaŭ tiom, kiom diplomitaj studentoj, sed ankaŭ havas feriojn. Ĝenerale la dungantoj rigardas ilin kiel siajn familianojn.

La vartistinoj prenas sur sin dommastrumadon, tiel ke urbaj laboristoj kaj oficistoj havas la eblon pli multe zorgi pri sia laboro. La laboro de kamparaj knabinoj en la urbo akcelas ankaŭ ekonomian disvolviĝon en la kamparo. Laŭ statistiko, la gubernio Uĥej ĉiujare enspezas 200 000 jŭanojn per la vartado en aliaj lokoj. Tiu enspezo levas vivnivelon de parto da kamparanoj kaj aĉetpovon de la kamparo kaj akcelas la tiean ekonomian disvolviĝon. Krome, var-

tistinoj en grandaj urboj ankaŭ povas ricevi pli da informoj, kiuj estas urĝe bezonataj de la kamparo.

Dank' al oftiĝo de kontaktiĝoj kun kulture evoluintaj urboj, senĉese altiĝas la kultura nivelo en la kamparo. Faktoj pruvis, ke la vartistinoj iagrade riĉiĝis siajn sciojn, plivastigis sian vidkampon, levis sian kapablon aprezi kulturan vivon kaj akceptpovon de la moderna civilizita vivmaniero. Ili enkondukas urbajn vivmanierojn en la kamparon, kio pli malpli rompis postiĝintajn kutimojn formiĝintajn en miloj da jaroj.

La vartistinoj oportunigas pekinajn loĝantojn, tamen ankoraŭ restas multaj problemoj. Nun en la vartistina merkato mankas specialaj administrantoj, tial ĝi estas en malordo, kio kompreneble malutilas al la socia sekureco. Iuj el la vartistinoj postulas altan rekompencan. Iuj vartistinoj laŭvole forlasas siajn dungantojn pro manko de skriba interkonsento. Kelkiam okazis, ke iuj vartistinoj faris krimon. Tial iuj dungantoj kun ĉagreno diris: "Eĉ dunginte vartistinon, mi ne estas trankvila." □

Papertondaĵoj

de ĈJANG ĈJANG

Papertondaĵoj, tradicia popola ornamo de Ĉinio, estas grava konsistiga parto de la ĉinaj popolaj belartaĵoj. Oni uzas nur malgrandan tondilon por fari papertondaĵojn, kaj iuj profesiaj metiistoj uzas specialan tranĉilon por fari papertranĉaĵojn. Jam en Han-dinastio (206 a. K. — 220 p. K.) kaj Tang-dinastio (618—907 p. K.) ĉinaj virinoj eltendis florojn, fiŝojn aŭ iajn figurojn el ora aŭ arĝenta folio aŭ el kolora silko kaj gluis ilin sur la tempioj por sin ornami. Poste oni eltendis el kolora papero floron, herbon, beston aŭ homon kiel ornamon de fenestro aŭ pordo aŭ skizon de brodaĵoj por spici sian vivon. En la feŭda socio oni tondis el papero ankaŭ monbiletojn, selformajn ingotmonerojn kaj ĉevalojn por kulti fantomojn kaj diojn.

La figuroj de papertondaĵoj estas tre ŝatataj de la popolo. Ili

Svatistino en teatraĵo



signifas bonaŭguron, feliĉon kaj longvivecon. Iliaj komponado, plastiko kaj koloroj ne estas limigitaj de naturalismo, sed oni troigas ilin forme kaj kolore per tondado simpla kaj delikata. Oni atentis la egalecon, densecon, simetriecon kaj ekvilibron de la tondaĵoj.

Ĉinajn papertondaĵojn oni ne nur aprecas kaj konservas, sed ankaŭ uzas por skizi brodaĵon, garni donacon kaj lanternon kaj ornamo fenestron kaj pordon.

Oni skizas ofte florojn kaj birdojn por brodado. Ĉinaj virinoj servigas la desegnojn al brodado de ŝuoj, ĉapo, kapkuseno, antaŭtuko, mansaketo kaj pordkurteno.


Papertondaĵo sur donaco estas bonaŭgura desegno, per kiu oni esprimas bondeziron por naskiĝtaga datreveno, geedziĝa festo kaj aliaj festotagoj.

Papertondaĵo sur lanterno montras gajecon. Ĉinoj ŝatas festan iluminadon. Ili algluas sur ornamaj lanternoj belajn, elegantajn papertondaĵojn por pliintensigi gajan etoson.

Oni prenas florojn, birdojn, bestojn, pejzaĝojn kaj teatrajn figurojn kiel desegnojn por fenestraj papertondaĵoj, kiuj dividiĝas en kvin specojn: tiujn por unuopa fenestro, tiujn por duopa fenestro, tiujn por fenestroanguloj, tiujn por pluropa fenestro kaj tiujn por granda fenestro. Ofte per fenestraj papertondaĵoj oni beligas sian loĝdomon kaj pliintensigas la festan etoson.

Papertondaĵon oni algluas ankaŭ sur lintelo. De la antikveco ĉinoj ŝatas ornamo sian pordon per papertondaĵoj. Ĉiu serio da pordaj papertondaĵoj konsistas el kvin pecoj grandaj kaj malgrandaj. La granda longas 25 centimetrojn kaj larĝas 14 centimetrojn, kaj la malgranda longas 19 centimetrojn kaj larĝas 12 centimetrojn, kun kvasto sube. La pordaj papertondaĵoj portas bonaŭgurajn vortojn kaj desegnojn de floro, birdo, fiŝo, insekto, drako kaj fenikso. Kun la ekonomia kaj kultura disvolvigo de Ĉinio, estas popularaj papertondaĵoj pri modernaj agrikulturaj maŝinoj, elektraj aparatoj, scienco kaj tekniko.




Estas du specoj de la ĉinaj papertondaĵoj, unu- kaj plurkoloraj. La unukoloraj estas simplaj, klaraj, vivoplenaj, modestaj; kaj la plurkoloraj — belaj, pompaj kaj tre taŭgaj por ornamo. La lastaj estas faritaj el pluraj paperetoj interligitaj aŭ el blanka papero multekolorigita. Pro la vasteco de la ĉina teritorio la papertondaĵoj en norda kaj suda Ĉinio havas malsamajn stilojn de arto kaj malsamajn lokajn gustojn. La nordaj papertondaĵoj karakteriziĝas per modesteco, simpleco, ĝeneraligo kaj troigo kaj montras la senafektecon kaj obstinecon de la nordanoj, dum la sudaj papertondaĵoj estas realismaj, mildaj, ĉarmaj kaj delikate faritaj. Ambaŭ havas intensan lokan guston kaj donas saman efekton per malsamaj artoj. □



*Bonaŭgura vorto duobla ĝojo kun
figuroj de drako kaj fenikso
(papertranĉaĵo por geedziĝa festo
kaj aliaj festotagoj)*


*Nova fizionomio de taj-a vilaĝo
(papertondaĵo el plurkoloraj pa-
peretoj interligitaj)*







Palacaj lanternoj (koloraj papertranĉaĵoj)

Drak-lanterna danco (papertondaĵoj el plurkoloraj paperetoj interligitaj)






Fenestraj papertondaĵoj






Pordaj papertrancĉaĵoj pri la kvar sezonoj

Longvivuloj (papertondaĵoj sur donaco por naskiĝtaga datreveno)



Skizoj de brodaĵoj (maldekstre por ŝuoj, meze por kapkuseno kaj dekstre por ĉapo)



Neĝa animo (Novelo)

Oni eksciis, ke Man Guj revenis, kiam li atingis enirejon de la vilaĝo.

Li revenis tiel senbrue, kiam vilaĝanoj informiĝis pri lia reveno kaj eldomiĝis renkonte al li, ili rigardis lin mirigite kaj aspektis suspekta.

La subiranta suno triste ĵetis ruĝajn radiojn al la proksimaj montokrestoj. La montoj fariĝis pli kaj pli timigaj. La purpura vespera nebulo dense disvastiĝis en la valoj, miksiĝinte kun pli da malĝojo. La aŭtuna vento susuris en la arbaro. Ne plu vidiĝis la antaŭa ĝojo.

Ĉu li estas la brava ĉasisto de la vilaĝo Liŭcun? Ĉu tio estas la simbolo de la vilaĝaj herooj? Li stumble revenis en ĉifita blanka kitelo, kovrita de polvo kaj herberoj, kaj kun la kapo loze volvita en kaptuko. Man-kis al li la pafilo, eĉ ne vidiĝis apud li la eta neĝblanka ĉevalo. Li portis neniam ĉasaĵon kaj aspektis tre laca kaj deprimita.

Ĉu Man Guj estis tia en la pasinteco? Nur se li iris al la montoj, li neniam revenis tiel embarasita de ĉasado, ĉar li estis brava, sagaca kaj lerta pafisto. En la vespera sunbrilo aŭdiĝis forta bruo de rapida galopado de sur malproksima montvojo. Tuj sekve alflugis la neĝblanka maso. Tiam ĉiufoje kolektiĝis homoj ĉe la vilaĝa enirejo. Oni staris sur la piedpintoj kaj etendis la kolon, kun mieno pia kaj respektplena. En palpebruma daŭro alkuris la ĉevalo. Antaŭ la rajdanta Man Guj metiĝis lupo aŭ leopardo, ĉiu kun paftrujo sur la frunto.

Tia felo ja estas altvalora. Kaj li revenis hejmen en admiroj.

Li, 20-jara, restis needziĝinta. Liaj gepatroj forpasis jam antaŭ longe. Mono ŝajne ne multe utilis al li. Krom aĉeti necesajn vivbezonaĵojn li estis drinkema. Li donacis la restan monon al samvilaĝanoj, tial ili traktis lin precipe familiare kaj respektoplene.

Man Guj ne volis edziĝi. Tio ŝajne estis ne necesa por la juna ĉasisto. Lin interesis nur rajdi en montaro kaj krei por li gloran reputacion per la pafilo. Reveninte hejmen, li do drinkis per granda bovlo kaj manĝegis viandon, kaj li kondukis tute konforme al la titolo de heroo.

Li amis sian solan kunulon — la ĉevalon.

Ĝi estis vere bona ĉevalo, kiu estis malalta kun oreloj pintaj kaj malgrandaj, muskoloj fortaj. Tute blanka, ĝi brilis kiel arĝenta sateno. Ĝi kuris rapide kaj stabile. Ĝi nomiĝis Blanka Roko, ĝi estis kvazaŭ skulptita el pure blanka roko. tamen viva kaj animita.

Blanka Roko konis la ordonojn de la mastro. Sen indiko de la mastro ĝi povis lerte elekti vojon en ĉasado. Ĝenerale je la momento de pafado, ĝi montris perfektan ekvilibron. Je la pafado, ĝi jam sciis, ke la ĉasaĵo estis trafita, kaj laŭte henis por montri sian admiron al la mastro. Ordinare ĝi aspektis tenera kaj aminda. Ĝi, premante sian kapon al la sino de la mastro, lekis liajn manojn, ruktetante, per kio ĝi intime esprimis sian amon al la mastro. Man Guj

komprenis ĉion, kion la ĉevalo diris, tial li ne sentis solecon.

Kompreneble Man Guj traktis ĝin ne malbone. Ĝenerale, en la profunda nokto, post sonĝo li vekiĝis akurate, iris al la stalo kaj aldonis dispecigitan furaĝon miksitajn kun faboj. La lanterno palflave brilis ĉe kolono. Li silente sidis apude, rigardante sian ĉevaleton, kiel ĝi maĉas furaĝon, kaj kiel alterne ripozigas la piedojn. En la kompleta nokta silento la maĉado estis aŭdebla tre klare kaj pro tio la nokto fariĝis pli silenta.

“Man Guj, kia rabobesto trafis vin?”

“Ĉu vi estas vundita?”

Man Guj ŝajne aŭdis nenion. Li malsprite, kun klinita kapo, sin movis al la hejmo, kaj respondis nenion.

Neniu sciis kio okazis.

Ĉu lin trafis granda besto? Tamen li ne havis sur si sangan makulon kaj vundon. Estis neimageble, ke li estus rabita. Kiu aŭdacus prirabi Man Guj, riskante sian vivon?

Man Guj revenis rekte hejmen.

Fine falis nokta kurteno. Ne plu videblis la proksimaj montoj, vojoj kaj la vilaĝo. En la vilaĝo jen kaj jen flagris lampoj kvazaŭ truoj sur la obskura fono. Ne plu aŭdeblis bruoj kiel en la pasintaj tagoj. Oni singardeme preparis manĝon, enkaĝiĝis kokojn, interparolis atente kaj flustre. Ĉiu, kaptita de pli-grandiĝanta dubo, sentis fortan korpremon.

Man Guj ne eldomiĝis en sinsekvaj tri tagoj.

Memorante la bonfarojn de la ĉasisto, iuj maljunuloj interkonsente kun brando kaj almanĝaĵoj iris al lia hejmo por lin konsoli.

La pordo estis fermita, sed ne riglita. En la domo estis ne lamplumo nek Man Guj. La maljunuloj venis al la ĉevalstalo en la malantaŭa korto. Tie sur la kolono pendis brilanta malhelflava lanterno. Unu homo kliniĝis genue sur la maldika furagotavolo.

Li estis Man Guj.

Kion li faris en la stalo? La vizitantoj vokis lin foje refoje. Estis nenia respondo. Poste li rondiris en la stalo, senĉese spiregante kaj eligante suferan blekon malklaran. Lia kapo ŝajne estis tiritita de io senĉese malantaŭen kaj ambaŭflanken. Malgraŭ ĉia penado li neniel povis sin liberigi.

La maljunuloj kun miro sin retiris je kelkaj paŝoj. Sur iliaj fruntoj filtriĝis ŝviteroj. Timigite de la scenoj, ili ne kuraĝis eĉ spiregi.

Post kelkaj minutoj Man Guj ĉesis rondiri, malrapide levis la kapon, mallevis la palpebrojn kaj el la brusto eligis obtuzan voĉon:

“Ho, Blanka Roko, mi bedaŭras, bedaŭregas. Mi ligis vin al acero. Sur la fono de skarlataj acerofolioj vi, neĝblanka, aspektis tre bela. Mi iris en la transan arbaron por instali kaptilojn, kunportis nur unu ponardon kaj restigis la pafilon sur via selo. Ĉe la foriro mi kisis vin, dirante: ‘Blanka Roko, atendu min ĉi tie! Voku min, se okazos io. Ho, voku min!’”

Man Guj subite levis la kapon kaj kriis kun granda ĝojo,

imitante la henon de Blanka Roko.

La juna ĉasisto daŭrigis:

“Apenaŭ mi fininstaligis la kaptilojn, mi aŭdis vian vokon, malpaciencajn kaj akran. Dekkelkaj lupoj atakis vin. La lupoj, fortaj kaj ferocaj, kun ŝaŭmanta buŝo kaj elmontritaj dentoj, furioze sin ĵetis kontraŭ vin. Vi turniĝis ĉe la loko kaj kalcitris, ne lasante la ferocajn bestojn proksimiĝi al vi. La brido ĉe la turniĝo fariĝis pli kaj pli mallonga. Ŝanceliĝis la pafilo sur la selo. Mi korŝire bedaŭras, ke mi ne kunportas ĝin en la mano! Tamen nur unu ponardo ĉe mi. Por lukti kontraŭ la grego da lupoj sola ponardo ne sufiĉas. Se mi min ĵetus al ili, mi estus ĉirkaŭita kaj disŝirita de la malsategaj filupoj.”

Man Guj veis dolore kaj tragike, ruktis plurfoje kaj diris home kaj ĉevale:

“Ha, mi vidis vin. . . Vi ne toleros, ke la ferocaj lupoj dispecigos vian rajdbeston. . . Tamen vi ne venis al mi. Mi scias, kion vi pensas. Vi domaĝas la honoron de heroo. Mi malesperas. Vi timas la gregon da lupoj. Vi ne domaĝas la vivon, sed la honoron. . .”

Jen rikanis Blanka Roko. La rido estis terura.

“Mi bedaŭras, ho, bedaŭregas. Subite unu lupoj sin ĵetis malantaŭ vin. Ĝi forte eksaltis, enigis la dentojn profunden en vian kokson kaj ŝiris de vi karnon de granda peco. Vi dolore ekstremis, forte kalcitris kaj hufbatis foren la lupon kun la karno en la buŝo. Via neĝblanka felo sangmakuliĝis. Mi elingigis la ponardon. Mi ne povas toleri tian brutan malhonorigon al ĉasisto. Ĝuste en tiu momento vi forte henis, sin liberigis de la

brido, alte eksaltis kaj sagrapide kuris antaŭen. La lupoj konkure postkuris vin. Via sango makulis la vojon.”

“Ho, mi korŝire iras for. Ja estas tia mia amata heroo. Ho, mastro mia, mi foriras. Vi ne serĉu min. Iru hejmen! La pafilo pendas sur mia selo. Ho, mi ne povas redoni ĝin al vi. . .”

La juna ĉasisto eklamentis. Plorspasmis li gratis la teron kaj tuj aperis sub liaj fingroj du malprofundaj kavetoj. En la lamplumo vidiĝis liaj fingroj sangantaj.

“Man Guj!”

“Man Guj!”

Man Guj subite stariĝis, longe spirĝemis kaj sin ĵetis el la stalo. Tra la malantaŭa korto, li eltrudis sin tra la pordo kaj malaperis en la obskura nokto.

De sur la montvojo ŝajne aŭdiĝis galopado.

Post longa tempodaŭro la maljunuloj konsciis la okazaĵon, tremante diris malklare:

“Li freneziĝis. Vere puninda!”

“Kia heroo? Fi! . . .”

Man Guj, kiel la simbolo de heroo de la vilaĝo Liŭcun, baldaŭ malaperis en la memoro de la vilaĝanoj. Liaj multaj bravaĵoj perdis la koloron pro la morto de Blanka Roko. Ĝi estis vere bona ĉevalo kaj rigardebla eĉ kiel sanktaĵo. En neĝŝtorma nokto de unu jaro, ĝi flarsentis, ke grego da lupoj surprizos la vilaĝon. Ĝi do henis longe, forte hufbatis la palisaron. De tio vekiĝis Man Guj. Li prenis la pafilon kaj vokis kelkajn junulojn. Ili lerte embuskis la lupojn en la arbaro malantaŭ la vilaĝo, kaj per tio savis la porcojn kaj ŝafojn de la vilaĝo. Sed mortis tiel bona ĉevalo. Ĝi mortis pro momenta hezito de sia mastro. La tuta vilaĝo be-

daŭris pro tio. Kaj krom bedaŭro oni sentis ankaŭ malhonoron. En la ĉasista vilaĝo aperis tia okazaĵo, kaj plie, ĝi okazis ĉe la brava ĉasisto

“Ne lernu de Man Guj!” admonis la junuloj unu alian.

“Ne estu tiaj, kia Man Guj!” edifis la maljuna generacio la estontajn ĉasistojn.

Fine Man Guj ne plu estis menciata. Estis ĝojinde, ke li forlasis la vilaĝon Liŭcun, kiu malpeziĝis kaj ĝojigis pro forlaso de la malhonoro.

Ĉio fariĝis same kiel antaŭe.

Pasis pliaj tagoj. En profunda nokto la vilaĝanoj ofte vekigis de ĉevala galopado kaj hendo, ŝajne aŭdigis iam la voko raŭka, nebuleca kaj longa “Blanka Roko! Blanka Roko!”

Kredeble, tio estis la voĉo de Man Guj.

Iuj kuraĝaj vilaĝanoj senbrue leviĝis, duonmalfermis la pordon kaj vidis: Super la montoj vualitaj de nokto fulme ekbrilis blanka lumstrio. Iuj diris, ke brilis karmezina lumo simila al fajro. Tamen neniu povis tion klarigi, se oni volus pli klare scii la detalon.

Oni malklare aŭdis nur voĉon de Man Guj, sed ne povis vidi lian figuron. Ĉu li mortis aŭ migris malproksimen? Pri tio neniu estis certa.

Iuvespere, knabo hazarde glitis en profundan valon por kolekti sekajn arbobranĉojn. Li levis pretervole siajn okulojn kaj vidis, ke senmove staras ĉe krutaĵo Blanka Roko kun kapo kaj vosto alte levitaj. Ĝi estis tutkorpe blanka kun vundo cikatriĝinta apenaŭ videbla ĉe la postaĵo. Sur la dorso de la ĉevalo sin klinis iu homo kun pafilo oblikve pendanta sur la ŝultro kaj en blanka vesto ĉifona kaj sangmakulita.



La knabo panike forkuris en la vilaĝon, forlasinte la kolektitajn arbobranĉojn. La novaĵo surprizis la vilaĝanojn, kiuj svarme sin direktis tien. La valo en vespero elspiris profundan malĝojon. La sange brila suno verŝis la radiojn sur la ĉevalon kaj la rajdanton. La pejzaĝo estis terure bela!

Tio estis roko ĉeval-forma, apud kiu senorde kuŝis mortigitaj lupoj. Iuj el ili mortis antaŭ longe kaj la aliaj antaŭ nelonge. La kugloj senescepte trafis al ili la kapon.

La rajdanto estis Man Guj. Li jam mortis.

Li trovis sian pafilon kaj ankaŭ la “ĉevalon”. Per la

sango de la lupoj li kultis la honoron meritan por heroo. Li estis morte laca. Li sin klinis sur la dorso de la ĉevalo, brakumis ĝian kolon, kaj feble verŝis sian koron al la ĉevalo.

La “ĉevalo” direktis sian kapon ĝuste al la vilaĝo Liŭcun, lia hejmloko.

Li restis brava ĉasisto.

La vilaĝanoj senvorte staris tie, kvazaŭ skuitaj de ia forto, ke ili eĉ ne atentis noktofalon.

Trot, trot, trot. . .

En la valoj, sur la montoj aŭdigis obtuza galopado, kiu hajle faris imponan, kuraĝigan muzikon. Kiel posteuloj de ĉa-

(Daŭrigo sur p. 51)

La *fu*-o de Han-dinastio

de MEJ ĜI

La *fu*-o estas unu el la literaturaj formoj, esence prozo intermiksita kun poezio, kiu aperis en la Periodo de Militantaj Regnoj (403-221 a.K.) kaj prosperis en Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.).

La *fu*-o evoluis el la poezio de Ĉu kaj disvolviĝis sub ĝia influo. Post kiam Han-dinastio unuigis la tutan landon, la literatura formo de la poezio de Ĉu estis akceptita de la tuta lando kaj iom post iom disvolviĝis en la *fu*-on. Komence de Han-dinastio, oni nomis la *fu*-on kaj la poezion de Ĉu kune *cifu*-o, sed esence la tiama *fu*-o heredis la karakterizaĵojn de la poezio de Ĉu kaj malmulte diferencis de ĝi. En la mezo de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 25 p.K.) la poezio de Ĉu kaj *fu*-o disiĝis en stilo. La *fu*-o estis malpli lirika, sed pli argumenta kaj pli rakonta ol la poezio de Ĉu. Ĝi estis pli proza ol la lasta.

La bazaj trajtoj de la *fu*-o karakteriziĝas per ĝiaj retoriko, ritmo, ekstravaganca priskribado kaj intermiksiĝo de poezia kaj proza trajtoj. La *fu*-oj de Han-dinastio disvolviĝis en du kategoriojn, nome longan *fu*-on kaj mallongan *fu*-on. La mallonga *fu*-o ĉefe estas verkaĵo lirika kaj elverŝanta la sentojn. Plejparto

de la *fu*-oj apartenas al la kategorio de la longa *fu*-o. Per ekstravaganca metodo la longa *fu*-o ĉefe priskribas urbojn, palacojn, ĝardenojn kaj luksegan diaboĉadon de imperiestroj kaj princoj. Ĉe la fino de la *fu*-oj la verkintoj kutime aldonas mallongan paragrafon por eufemisma admono. Tamen tio estas hipokrita esence. La longa *fu*-o ĝenerale estas riĉa je enhavo, bela antitezo kaj paralelismo. Kaj aliflanke, la *fu*-oj en la posta periodo ne havis verajn sentojn, tro akcentis rafinitecon de lingvaĵoj kaj imitadon kaj ofte estis troigaj, tamen ne devas esti neglektataj kaj neataj la loko de la *fu*-oj en la literatura historio kaj ilia influo sur la evoluo de la posta literaturo.

La prospero de la *fu*-o en Han-dinastio ne povis disiĝi de la kondiĉoj de la tiama politiko, ekonomio k.a. La socia akumulado de riĉaĵoj, milita ekspansiigo kaj senprecedenca unuiĝo de la lando en Han-dinastio ebligis al la *fu*-verkistoj distrumpeti la hegemonion de Han-dinastio per diversaj temoj. La karieroj de imperiestroj, la pompeco de palacoj en la ĉefurbo, la orgio de reganta kliko fariĝis temoj utilaj por la *fu*-verkistoj. Kaj cetere, pluraj imperiestroj de Han-dinastio ŝatis *fu*-ojn, kio akcelis la prosperon de la *fu*-oj.

En la 70-80 jaroj post la fondiĝo de la dinastio la reprezentantaj *fu*-verkistoj kaj iliaj ĉefaj verkoj estis Ĝja Ji kaj liaj “Funebre al Ĉju Jŭan” kaj “Odo al Strigo”, Mej Ĉeng kaj lia “Sep Aferoj Edifaj”.

Ĝja Ji, naskita en 201 a. K., estis tre eminenta politikisto kaj literaturisto en la komenca periodo de Han-dinastio. En la aĝo de dudekelkaj jaroj li prezentis kompletan da doktrinojn pri politiko kaj leĝa sistemo, en kio plene montriĝis lia politika talento. Sed ĝuste pro tio, li estis malakceptita de korteganoj kaj malpromociita *tajfu* (titolo de nominala senpova ofico por altrangaj mandarenoj aŭ korteganoj) de la princo de Ĉangŝa. Li tre ĉagreniĝis pro sia maljusta malpromocio. Dum la vojaĝo al Ĉangŝa, ĉe Ŝjangŝuj-rivero, li skribis “Funebre al Ĉju Jŭan”. En tiu *fu*-o li esprimis sian admiron kaj simpatian al Ĉju Jŭan kaj elverŝis sian korprematecon kaj malkontenton. La verko estis imitaĵo de verkoj de Ĉju Jŭan kaj forme kaj stile. Foje, dum lia restado en Ĉangŝa, strigo flugis en la domon de Ĝja Ji. La birdo, kiel simbolo de malfeliĉo laŭ tieaj loĝantoj, vekis ĉe li melankolion, kaj li verkis la *fu*-on “Odo al Strigo”, per kiu li esprimis sian malcedemon kaj



Ban Gu



Caj Jong



Jang Ŝjong

bedaŭron pro la nerimarkita talento.

Ankaŭ Mej Ĉeng estis alia grava *fu*-verkisto en la komenca periodo de Han-dinastio. Lia majstroverko "Sep Aferoj Edifaj" metis la bazon por la longa *fu*-o kaj estis grava verko interliganta la pasintecon kaj la estontecon en la disvolviĝo de la *fu*-o. "Sep Aferoj Edifaj" el pli ol 2 000 ideogramoj, en formo de prozo kun demandoj kaj respondoj inter gasto kaj mastro, troige priskribis muzikoaprecaĉon, frandadon, veturilon kaj ĝian jungitaron, palacan ĝardenon, ĉasadon, tajdorigardadon, kaj fine venis al la konkludo, ke la orgia vivo estas malpli delectinda ol trafikaj vortoj kaj spritaj rezonoj. En tio montriĝis la funkcio de la eŭfemisma admono de la *fu*-o. "Sep Aferoj Edifaj" faris supozon, ke la kronprinco de Ĉu-regno malsaniĝis, kaj lin vizitis gasto el U-regno. Ĉe la komenco la teksto rakontis la kaŭzojn de lia malsano kaj certigis, ke lian malsanon kuracos neniu medikamento nek akupunkturo aŭ kaŭterizo, kaj ke efikos sur

lin nur trafikaj vortoj kaj spritaj rezonoj. Esence la teksto intencis pruvi, ke la malsanon al la kronprinco kaŭzis la aristokrata orgio.


"Sep Aferoj Edifaj" karakteriziĝas per abunda imago, libera paralelismo kaj figura priskribo. La plej pompa paragrafo estas priskribo pri tajdo. De diversaj flankoj la aŭtoro priskribis la formon, movadon, bruegon kaj variajn ŝanĝiĝojn de tajdo. Per multaj figuraj hiperboloj la teksto skuas la animon de la legantoj.

Malgraŭ ke "Sep Aferoj Edifaj" portas mankojn ofte vidatajn en la *fu*-oj, ĝi estas rigardata kiel verko altnivela en ideologio kaj arto. Post ĝi aperis multaj verkoj imitantaj "Sep Aferoj Edifaj", kiuj formis specifan stilon "ĉjilin" de literaturo, esence *fu*-o.

En la pli ol 200 jaroj ekde la regperiodo de imperiestro Udi, Han-dinastio transiris de prospero al dekadenco kaj poste al reprospero. En tiu periodo aperis abundo da *fu*-oj. La plej

granda *fu*-verkisto de tiu periodo estis Sima Ŝjangju.

La ĉefaj verkoj de Sima Ŝjangju estis la *fu*-oj "Ziŝju" kaj "Ŝanglin". Laŭdire imperiestro Udi tre admiris "Ziŝju" kaj akceptis Sima Ŝjangju kaj nomis lin kiel mandarenon. Poste Sima Ŝjangju verkis por ĉasado de la imperiestro kun la titolo "Ŝanglin". La du *fu*-oj ne estis verkitaj unu post la alia, sed esence ili estis analogaj en formo kaj interligiĝantaj en enhavo. Per interparolo inter la tri fikтивaj personoj Ziŝju, Ujoŭ kaj Uŝigong, la teksto troige priskribis la ĉasadon kaj luksan palacon de imperiestroj kaj prikantis la nekompareblan superbon de la dinastio unuiginta la tutan Ĉinion. La teksto "Ziŝju" komenciĝis per la laŭdo de s-ro Ziŝju al Ĉu-regno. Li diris: "En Ĉu kuŝas sep lagoj, el kiuj nur unu mi vidis. La lago estas la plej malgranda el la sep, nomata Junmeng." Tuj post tio li troige prikantis la skalon de la ĉasado de la regnestro de Ĉu ĉe la lago Junmeng. Sed sinjoro Ujoŭ superregis lin per sia troiga rakon-



“Ziŝju” (Ksilografita eldono de Ming-dinastio)


to. Li diris, ke Boŝje aŭ Meng-ĝu (lokoj en Ĉji-regno) povas enteni en sia angulo 8-9 lagojn grandajn kiel Junmeng. En la fino Uŝigong superregis ilin ambaŭ per sia priskribo pri grandiozeco de la imperiestra ĝardeno kaj ĉasado. Kvazaŭ pli kaj pli potenciganta tajdo, la teksto atingis sian altan imponecon. Granda kvanto da ripetitaj vortoj, antitezoj kaj paralelismoj multe plibeligis la tekston. Ambaŭ *fu*-oj “Ziŝju” kaj “Ŝanglin” finiĝis per eŭfemisma admono al luksego kaj diboĉado.

Ambaŭ *fu*-oj “Ziŝju” kaj “Ŝanglin” okupas gravan lokon en la historio de la *fu*-oj de Handinastio. Ili starigis la tradicion de la *fu*-oj kiel himno. Ekde Sima Ŝjangĝu, la *fu*-oj komencis preni kiel la ĉefan enhavon la prikanton de la digneco kaj imponeco de kortego kaj tiun rutinon la postaj *fu*-verkistoj here-

dis sensanĝe kaj sekve formiĝis la tradicio de la *fu*-oj kiel himno. Sed kun tempopaso, la prikanto de *fu*-oj fariĝis pli kaj pli vanta pro flatado al la ŝajne prospera socio kaj al la feŭdaj regantoj, kaj iom post iom la *fu*-oj perdis sian kreivon.

En tiu periodo aliaj famaj *fu*-verkistoj kaj iliaj ĉefaj verkoj estis Jang Ŝjong kaj lia “Ĉasado” kaj Ĝang Heng kaj lia “Du Ĉefurbroj”. Ambaŭ *fu*-oj estis distingigaj en stilo, sed tamen ili estis imitaĵoj de la verkoj de Sima Ŝjangĝu.

En la lastaj cent jaroj de Handinastio la *fu*-oj dekadencis kaj transformiĝis. Tiutempe la politiko de la dinastio putriĝis tagon post tago, kaj en la socio regis tumulto kaj ĥaos. Anstataŭ longa oni verkis mallongan *fu*-on, en kiu ili esprimis sian malcontenton kaj indignon. Tiutempe tiaj verkoj estis malabun-



“Funebre al Ĉju Ĵuan” (Ksilografita eldono de Ming-dinastio)

daj, kaj la reprezentantaj verkistoj kaj iliaj verkoj estis Caj Jong kaj lia “Spertaĵoj en Vojaĝo”, Ĝaŭ Ji kaj lia “Kritiko al la Sociaj Malvirtoj”. “Spertaĵoj en Vojaĝo” prezentis multe da pensoj de Caj Jong pri la paseo. Kun la celo kritiki la aktualaĵojn de la socio per komparo kun la paseo, la aŭtoro esprimis sian simpatian al la popolo en la mizera vivo kaj la indignon de la sufokitaj ambiciuloj. Ĝaŭ Ji estis tro senĝena kaj frivola kaj dum la tuta vivo li estis ne pli ol prefekto. Lia *fu*-o “Kritiko al la Sociaj Malvirtoj” montris lian simpatian al la ekspluatata kaj subpremata popolo, kondamnis la avidecon de la reganta klaso, kiu kiel eble plej kruele ekspluatis la popolon por sia malmodera diboĉado. La fortaj sentoj kaj la klaraj amoj kaj malamo montris la malcedemon de la aŭtoro kontraŭ la malvirtoj. □

Sep aferoj edifaj* (Fragmento)

de MEJ ĈENG

Kronprinco de Ĉu-regno malsaniĝis. Iu U-regnano lin vizitis kaj diris al li: "Mi aŭdis, ke Via Moŝto malsaniĝis. Ĉu via malsano iom mildiĝis?" La kronprinco respondis: "Dan-kon! Mi sentas min tre laca."

.....

La vizitanto: "Via Moŝto, mi povas resanigi vin ne per medikamento, nek per akupunkturo kaj mokso, sed per kelkaj gravaj vortoj. Ĉu vi volus aŭskulti?"

La kronprinco: "Tre volonte."

.....

La vizitanto: "La 15-an de la oka monato oni kune kun nobeloj ekskursas malproksimen al Gŭangling (nun Jangĝou) por amikiĝi kaj rigardi tajdon de rivero. Ne vidinte tajdon, oni jam estas terurita de granda akvoforto. Malgraŭ siaj alta inteligento kaj oratora talento oni tamen ne povas detale priskribi, kiel la akvo impetas, leviĝas, torentas, kirliĝas kaj plaŭdas. Estas tempo de fluso. Tajdo, komence ne klare videbla de malproksime, senlima, terura, fine tondre alruliĝanta. Direktu viajn okulojn al la Suda Monto, (de kie komenciĝas la tajdo) kaj la orienta maro (en kiun la rivero enfluas), kaj vi trovos, ke la senlima akvo kaj la lazura ĉielo kunfandiĝas ĉe la malproksima horizonto, kaj malfacile distingos, kie estas la limo de la akvo. Oni sekvas per la okuloj tiun imponan pejzaĝon kaj atente rigardas al la malproksima oriento, kie sin levas la suno.

La fluo kun ondegoj kuras malsupren, kaj oni ne scias, kie ĝi haltas. Intertempe la torento malordiĝas kaj kontraŭfluas supren. La torento impetas kontraŭ la suda bordo kaj malaperas for de la okuloj, kio estas maltrankviliga kaj laciga por la rigardantoj. La vespera tajdo jam malfluis kaj sekvas la matena, kaj tiu donas al la rigardantoj neforgeseblan impreson. Post rigardo de la tajdo oni fariĝas freŝigita kaj liberigita de ĉiaj pigro, suspektemo, laceco, ĉagreno, kvazaŭ la haroj, dentoj, manoj, piedoj kaj eĉ la internaĵoj estus lavitaj de akvo. Tiam la homoj, eĉ malsanaj dum longa tempo, pene rektigas sian kurbiĝintan dorson, movas siajn lamajn kru-rojn, malfermas siajn blindajn okulojn kaj atente aprezas la tajdon, por ne paroli pri tiuj, kiuj suferas iom da ĉagreno kaj ebrio. Tial oni diras, ke estas facile refreŝigi la cerbon kaj forigi la suspektemon per rigardo de la tajdo."

La kronprinco: "Tre bone. Sed kiaj estas la trajtoj de la tajdo?"

La U-regnano: "Tio ne estas notita en libroj. Sed mi informiĝis de mia instruisto, ke la tajdo havas tri trajtojn, kiuj ŝajnas dioj, sed fakte ne. La unua trajto estas, ke la tondra tajdo aŭdeblas cent li-ojn (unu li-o egalas 0.5 kilometron) fore; la dua, la riverakvo kontraŭfluas kaj la marakvo enriveriĝas; kaj la tria, la montvalo en- kaj ellasas nebulon tagnokte. La rivero pleniĝas, superpleniĝas kaj ekto-rentas, kaj leviĝas ondoj kaj poste ondegoj. Komence la tajdo aspektas kiel ardeoj ŝvebantaj malsupren. Iom poste formiĝas blankaj ondegoj kiel alkurantaj blankaj kaleŝoj kun blankaj kurteno, tegmento kaj jungitaj ĉevaloj. La ondoj jen leviĝas, jen dispeciĝas kiel nuboj kaj sin ĵetas antaŭen kiel armeo bone ekipita. Ili jen flankeniĝas, jen leviĝas, kiel ĉefgeneralato



en leĝera militĉaro komandanta sian armeon. Ili kuras tiel rapide kiel ĉaro kun ses drakoj sekvantaj la riveran dion kaj kiel blankaj akcesoraj ĉielarkoj flugantaj senĉese. Ili konkuras pri saltado, postkuras kaj frapas brue unu kontraŭ alia. Ili aspektas kiel fortika remparo aŭ militista formacio. Ili muĝas, torentas nehaltigeble. Ili impetas kontraŭ ambaŭ bordoj, jen saltas, jen falas kiel bravaj, indignaj militistoj. Ili atakas sentime, grimpas sur klifon, atingas riverkurbiĝon, transsaltas bordon kaj sablan insuleton kaj pereigas ĉiujn malhelpantojn. La tajdo startas de Hŭoŭej kaj zigzage fluas antaŭen, unue

malrapide kaj poste rapide kaj senbrue. Ĝi lantas ĉe la monto Uzi, sin direktas al la templo de U Ziŝju kaj poste tondre preterkuras Ĉi'an kaj Ĉajsang. Ĝi, kvazaŭ ekscititaj ĉevaloj kaj teruraj tondroj, freneze torentas antaŭen. Ondegoj furioze leviĝas kaj koliziĝas unu kontraŭ alia ĉe la haveno Ĝjiĝji pro barajoj antaŭ si. Tie la birdoj ne havas tempon flugi, la fiŝoj ne havas tempon naĝi kaj la surteraj bestoj ne havas tempon kuri. La ondegoj, dancantaj senorde, kuras al la Suda Monto, atakas la nordan bordon, inundas la montan regionon kaj la okcidentan bordon. Ili fine ĉesas batali, breĉinte la bordon. En la furio-

zaj ondegoj eĉ fiŝoj kaj testudoj perdas sinregadon kaj povas esti nur libere pelataj kaj ĵetataj de ondoj. Eĉ feoj miras pri la fenomeno. Tio estas vere kapturna, malprudentiga kaj morna!"


.....

La kronprinco stariĝis kaj, sin apogante sur la tablo per la manoj, diris: "Mi ekkonsciis, aŭskultinte vian paroladon, kvazaŭ profetan." Li ŝvitis kaj subite resaniĝis. □

* Tio ĉi estas la lasta el la ok paragrafoj de "Sep Aĵeroj Edifaj". La aŭtoro per priskribo de la tajdo admonis la kronprincon, ke li ŝanĝu siajn vivmanieron, interesojn kaj ideologion.

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

- | | | |
|---------------------|---------------------|---------------------|
| 1. Flava Rivero | 4. Kenli-gubernio | 7. Luŝeng-gubernio |
| 2. Ĉinghaj-provinco | 5. Ŝjuĝoŭ | 8. ĵuanmou-gubernio |
| 3. Hŭa'jŭankoŭ | 6. Kajjŭan-gubernio | 9. Liĝjang-gubernio |



Kun malnovspicaj metaforoj

de SPOMENKA ŠTIMEC (Jugoslavio)

ŬANG GUJ KAJ LI ŜJANG-ŜJANG eposo de Li Ĝji, elĉinigita de Laŭlum, eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo. Formato: 15×21 cm. 58 p. kun 3 ilustraĵoj en koloroj. Prezo: \$ 2.85.


El Ĉinio venis nova libro. La titolo "Ŭang Guj kaj Li Ŝjang-ŝjang" unuavide ne multon diras al la neĉina leganto. La aŭtonomo Li Ĝji (1922-1980) nekonate sonas.

La versaj formoj de la eposo malkaŝas tuj, ke ne temas pri la nuntempa verko. La biografia noto informas, ke la poeto, inspirita per la popola arto de Norda Ŝenŝji-provinco, kie Li Ĝji naskiĝis, verkis la eposon en 1945.

Ekde la unuaj strofoj la leganto estas entirita en la dektrisolaban ritman formon de la popolkanta "Ŝintjanjoŭ":

*La flavsabl' sin sternis, vaste
sen mezuro
sed kiu kamp' ne estis havo de
riĉulo?*

El la libro fontas vilaĝbildo, tre puraj kaj alitempaj, tra kiuj moviĝas sklavoj kaj mastroj. Ĉiu literaturo konas tiun rilaton inter ekspluatanto kaj ekspluatato. (En la kroata literaturo de Jugoslavio elstaras la similtajn "Baladoj de Petrica Kerempuh" de Miroslav Krleža.) Tiu konata rilato ĉi-tie estas esprimita per la nekutima ĉarmo de la popola verso. En la traduko de Laŭlum ĝi fluas tiom nature kaj tiom kortuŝe, ke la libro sur pluraj paĝoj fariĝas siaspeca trezorejo de la popoldiro, kiu, mi kuraĝas diri, kom-



pletigas La Proverbaron de Zamenhof.

Nuntempa verkisto malofte elektus tian temon kaj la formon. Naivaj komparoj, sinceraj troigoj; bela fidela knabino, voluptema grandbienulo, malriĉa, forta batalema junulo, preta sian vivon oferi por la revolucio, . . . Ĉio konata: la amato venas por savi Ŝjang-ŝjang en la lasta momento antaŭ ol ŝi kontraŭvole devas edziniĝi.

*Je la renkont' la manojn ili interprenis,
paroli, ridi volis, sed nur vane
penis.*

*Post longa baraktado Ŭang Guj
diris vorton*

*"Ni zorgis revolucion kaj ĝi
nian sorton".*

Ĉiuj kliŝoj de la revolucia poezio ĉeestas — sed la libro efikas majstroverke en Esperanto. La traduk-

laboro de Laŭlum malkovras sinceran ŝatanton de la popolkanto kaj de la popola stilo. Li en tiu ĉi libro, descendas en la kernon de la popola pensmaniero. (Kiu bonŝance povis ĉeesti lian prelegon pri popolverkado dum la 71a UK, tiu povis de proksime varmiĝi je lia vasta kulturo kaj je lia amo al la praaj formoj de la popola verkado.)

La libro prezentas la kolektajn de la popola pensmaniero kaj de la popolaj metaforoj. En ĝi troviĝas tio, kion multaj kulture altevoluintaj landoj forĵetis, sed en kio pulsas la varmo de la pasinteco, ĝia historio, ĝia lingvo.

Sincera kaj amoplena traduko kiun la leganto, ĉirkaŭata de la malamplena mondo, renkontos kun plezuro, malsuprenante al la radikoj ne nur de la ĉina popolo sed ankaŭ al la radikoj de si mem. □

Rakontaj filmoj de

Ĉinio en nova provado

Ekde 1977, kun la senprecedenca liberigo de la longtempe katenita penso, la ĉina kinematografio eniris novan stadion de disvolviĝo. Dum tiu periodo la filmistoj iom post iom malfermis sian vidkampon longe fermitan. Ili akiris duoblan movforton en retrorigardo de la tradicio kaj en studo de mondaj artoj, kio ebligis al la filmofarado de Ĉinio impete disvolviĝi. Oni nomis tiun stadion nova periodo de ĉinaj filmoj. Ĝia disvolviĝo nun ankoraŭ estas en alta tajdo.

En tiu periodo ĉinaj filmoj rapide kreskis ne nur en kvanto, sed ankaŭ en nova kreo de arto. Al ili okazis senprecedenca prospero. Dum la 27 jaroj de 1949 ĝis 1976 la meza jara produktokvanto de ĉinaj rakontaj filmoj estis 40-50, maksimume 70. En 1982 la produktokvanto unuafoje superis 100. En la postaj jaroj la nombro estis ĉiam inter 120 kaj 150.

La sukcesoj en arto inkluzivas la provon de renovigo de enhavo kaj formo. La eminentaj filmoj en la lastaj jaroj koncentre montris la vastecon kaj profundecon de la provado.

En 1984 la ĉina kinematografio kulminis denove en produktado, kaj aperis nombro da esploraj filmoj, kiuj multe ŝanĝis la tradician aspekton de la ĉina ekrano.

Ili estas filmoj faritaj de iuj junaj filmistoj ĵus diplomitaj el kinematografia instituto, kiuj tute ne sekvis la malnovan tradicion de ĉinaj filmoj emfazantaj rakonton kaj intrigon, sed intence simpligis rakonton kaj intrigon kaj klopodis prezenti la enhavon de la filmoj per scenoj poluritaj de koloro, bildo-komponado, lumo-uzo kaj aliaj plastikoj.

“Leŭso” estas reprezentanta verko de tiuj filmoj. Ĝia rakonto estas tre simpla: En la tridekaj jaroj iu kadro de la Okavoja Armeo (iama nomo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo) venis al la Leŭsa Altebenaĵo de okcidenta Ĉinio por kolekti popolkantojn. Li enloĝiĝis en hejmo de iu kamparano. Tie la vivo estis monotona kaj malriĉa. Knabinoj devis edziniĝi tre junaj por sin vivteni. La juna filino de la dommastro, trovinte novan esperon de sia vivo sur tiu armeano, forlasis la familion post sia edziniĝo. La filmo prezentas preskaŭ neniun intrigon kaj dialogon kiel eble plej malofte. En ĝi troviĝas silentemaj kamparanoj kun gapa rigardo, naivaj infanoj ĉifone vestitaj, novedzino-bonveniga trupo kun buntaĉaj koloroj kaj surdiga bruoj, pluvo-peta sceno en sufoka kaj mistera atmosfero kaj ankaŭ grandioza polva sceno de centoj da kamparanoj ludantaj

tali-tamburinojn. La pli okulfrapaj scenoj estas tiuj de la senfina Leŭsa Altebenaĵo. El tiuj fragmentaj scenoj oni vidis la grandajn riĉajn historion kaj kulturon de Ĉinio. La filmo ne nur estis alte taksata de enlandaj fakuloj, sed ankaŭ gajnis sinsekve la premion “Arĝenta Leopardo” de la 38-a Internacia Filma Festivalo de Locarno, Svisio, kaj kvar grandajn internaciajn premiojn.

Tamen ne aprecas tiujn filmojn ordinaraj spektantoj pro ilia manko de rakonto kaj malrapida disvolviĝo de iliaj intrigoj. Ili pli ŝatas filmojn kun nova provo, sed ne tro malproksimajn de la tradicia formo. Unu el tiaj filmoj estas “Ruĝe Vestita Knabino”, kiu gajnis la premion “Ora Koko” de 1984 plej honoran por la ĉinaj filmoj. Ĝi estas adaptaĵo de la novelo “Ruĝa Ĉemizo sen Butonoj”. La heroino de la filmo estas mezlernejanino strebanta al sincereco. Kiam ŝi rigardas la ĉirkaŭan mondon per siaj propraj okuloj, ŝi sentas nekomprenon. Ŝia patro estas eminenta pentristo, sed lia talento dumlonge ne ricevis agnoskon de la socio pro tio, ke li ne estis snoba en pentrado. Ŝi estimas sian pliaĝan fratinton, redaktoron de iu revuo. Ĉi tiu publikigis en la revuo malbonan poemon de ŝia instruistino, por ke la juna fratino estu elektita



Sceno el la filmo "Leŭso"



Sceno el la filmo "Ruĝe Vestita Knabino"

kiel lernantino bona en korpo-kulturo, lernado kaj fizika laborado. La lernantino ne ricevis indulgon de la instruistino kaj iuj kunlernantoj pro kuraĝa eldiro de vero. Ŝi estis maljuste kritikita de la instruistino eĉ pro portado de moda ruĝa ĉemizo. La filmo prezentas konflikton inter sincera karaktero kaj sociaj moroj. Tian temon neniam prezentis la pasintaj ĉinaj filmoj, tial ĝi estis laŭdata de fakuloj kaj spektantoj.

La rakonta filmo "Girlando ĉe Alta Monto" estis unu el la tiujraj filmoj plej bonvenaj al la spektantoj. Ĝi modlis figurojn de iuj veraj armeanoj kaj iliaj parencoj kaj samtempe prezentis ian seriozan fakton en la armeo kaj eĉ en la lando. Pro tio ĝi gajnis la premion "Cent Floroj" post balotado de spektantoj.

En 1985 ne estis multaj eminentaj filmoj, sed la ĉefaj ankorau konservis provan spiriton de la nova periodo. La filmo "Sovaĝa Monto", kiu gajnis la premion "Ora Koko" por tiu jaro, spegulas reformon en Ĉinio. Malsame kiel la pasintaj fil-

moj, kiuj priskribas batalon ĉefe inter reformistoj kaj kontraŭreformistoj, ĝi direktis la rigardon al la vivo kaj psikologio de ordinaraj homoj.

Ĝia heroo Hehe estas kamparano en malgranda montvilaĝo. Li travojaĝis iujn lokojn kaj volis riĉiĝi en la reformo per entreprenado de kromproduktado. Sed, pro sinsekva malprofito, li estis elpelita de sia edzino kaj enloĝiĝis en la domo de alia kamparano. La dommastrino Gujlan estis inspirata de Hehe pro liaj vikleco kaj strebado al la nova vivo, kaj ili iom post iom trovis komunan senton. Sed ŝia edzo Hujhuj estas kamparano konservativa en penso. Li esperis riĉiĝi per terkulturado. La psika diferenco kondukis ilin al sento-malakordo kaj eksedziĝo. Fine Hehe edziĝis al Gujlan, dum Hujhuj kaj Ĉiŭĵong, la eksedzino de Hehe, fondis novan familion.

La filmo kun nova senco priskribas la disiĝon kaj refondiĝon de du kamparanaj familioj kaj per tio vidigas fendiĝon de la malnova ordo de vivo sub la impeto de la epoka tajdo.

Aliflanke, ĝi klopodas atingi verecon en modlado de figuroj kaj en prezentado de la medio. Ĝi gajnis la grandan premion en la 8-a Tri-kontinenta Internacia Filma Festivalo en Francio.

En 1985 la alia filmo "Incidento de Nigra Kanono" vekis grandan eĥon. Ĝi prezentas fantazian rakonton. Ĝia heroo Ĝaŭ Ŝuŝin estas inĝeniero. Li ŝatas ludi ĉinan ŝakon. En oficovojaĝo li forgesis ŝakpecon nigra kanono en hotelo kaj telegrafis al la hotelo por peti resendon de la ŝakpeco. Pro la nekomprenebla teksto la telegramo estis sendita de la poŝtofocejo al la direktoro de la kompanio, kie laboras Ĝaŭ Ŝuŝin. Tio estigis miskomprenon kaj suspekton de la direktoro. Tiam granda ekipaĵo importita de la kompanio estas en muntado. La kompanio havigis al fremdlanda specialisto ne Ĝaŭ Ŝuŝin, kiu scias fremdan lingvon kaj havas fakajn sciojn, kiel interpretiston, sed alian personon, kiu ne havas fakajn sciojn kaj plurfoje faris misinterpretadon, ke la ekipaĵo brulis dum la funkciado kaj tio kaŭzis gran-



Filmado

dan perdon. La filmo montris, ke direktoroj de iuj entreprenoj ne kredas intelektulojn, samtempe ĝi profunde malkaŝis tradician kulturalan psikon de la ĉinaj intelektuloj, nome ilian malfortan karakteron. Ekz., Ĝaŭ Ŝuŝin estis apatia kontraŭ la malkredo de la direktoro kaj klopodis serĉi konsolon en tio kaj sin riproĉis.

En 1986 aperis nombro da "grandaj filmoj", kiaj "Sun Jatsen", "Milito inter Ĝili kaj Fengtjan-klikoj" kaj "Ĝingis-Hano". La granda strukturo, grandaj scenoj, granda personaro kaj granda investo montris ĉiam pli grandan forton de la ĉina kinematografio.

El la ordinaraj filmoj "T-provinco en 1984 kaj 1985" estas verko spegulanta la nunan reformon. Ĝi per ĵurnalista verkmaniero objektivite spegulas kon-

flikton inter la leĝa sistemo starigita en la reformo kaj la tradicia "homa regado". Estro de iu fabriko subskribis labor-kontrakton kun sia supera kompanio. Poste la direktoro de la kompanio unuflanke perfidis la kontrakton, kio suferigis al la fabrikestro petis subtenon de la leĝo. Dank' al tio la kontrakto revalidiĝis kaj la fabriko ricevis kompenzon. Sed post la limdato de la kontrakto la direktoro de la kompanio ne subskribis plian kontrakton kaj per tio eksigis la fabrikestron. Kaj la juĝisto, kiu honeste laboris, estis pretekste transigita al malgranda juĝejo. La filmo ricevis vastan laŭdon per sia kuraĝa malkaŝo de aktualaj kontraŭdiroj kaj per sia kompleta raporto pri la reformo.

"Mislokiĝo" estis alia nova filmo farita de la reĝisoro de

"Incidento de Nigra Kanono". Ankaŭ ĝia heroo estas Ĝaŭ Ŝuŝin. Nun li tamen estas alte takсата kaj fariĝis buroestro. Sed la nova ofico alportas al li novajn ĉagrenojn: senfinaj kunvenoj rabas al li preskaŭ la tutan tempon, ke li ne havas energion por okupiĝi pri scienca esplorado. Sekve li faris roboton similan al li, por ke ĝi ĉeestu anstataŭ li diversajn sekajn kunvenojn. Ekster lia atendo la roboto tuj pasiĝas al kunvenoj kaj volas lin anstataŭi komplete: plenumi lian oficon kaj eĉ trakti lian am-aferon. Tio kaŭzas al li multajn ĝenojn. Ĝaŭ Ŝuŝin devigite ĝin detruis. Sendube, li ne povas forigi siajn ĉagrenojn per sciencaj scioj kaj inventoj. Eble tio estas edifo donita de la fikcia filmo. En tiu senco la filmo estas interesa kaj ankaŭ pensiga. □

Antikva dongba-a kulturo

En la multnacieca Ĉinio, ĉiu nacieco havas sian kulturon. La dongba-a kulturo de naŝi-nacieco en sudokcidenta Ĉinio estas unu el la originalaj naciecaj kulturoj.

Novembre de 1986, mi veturis al Liĝjang-gubernio de Junnan-provinco koncentre loĝata de naŝi-oj kaj iom konis la dongba-an kulturon.

Kiam mi vizitis studoficejon pri la dongba-a kulturo de Liĝjang-gubernio, iu maljunulo en naŝi-a kostumo deklamis por mi la bildsimilajn kaligrafaĵojn pendantajn sur muro. Efektive, nenion mi komprenis. Deklaminte, la maljunulo klarigis al mi han-lingve. Origine tio estas antikva naŝi-nacieca proverbaro skribita per dongba-a hieroglifo. La proverbaro estas esprimriĉa kaj logika. Ekz. "Kato estas la plej malgranda dombesto, sed ĝi apartenas al subordo de rabobestoj."

Mi atenteme rigardis la hieroglifon. La strekoj estas tre subtilaj kun klara arta lerteco. Oni povas tuj koni iujn bestnomojn, kiaj leono, tigro kaj gruo.

Kio estas la dongba-a kulturo? Pri tiu demando iu studanto diris al mi, ke naŝi-nacieco en Liĝjang-gubernio iam havis originan ŝamanismon nomatan dongba-a religio. Ĝi fondis la hieroglifon kaj dongba-an kulturon, kiu konsistas ĉefe el "dongba-aj sutroj" verkitaj per la hieroglifo kaj dongba-aj belarto, ceremonio kaj danĉmuziko.

"Dongba" signifas homon intelektan kaj saĝan. Poste la vorto "dongba" fariĝis alinomo de sorĉisto de dongba-a religio. La maljunulo, kiu klarigis por mi la proverbaron, estas unu el la malmultaj "dongba-oj". La oficejo petis ilin

ordigi kaj traduki la dongba-ajn sutrojn. Pere de la generacio-post-generacia deklamo kaj transskribo de "dongba-oj", la kulturo povas ekzisti ĝis hodiaŭ.

Rigardante la verkojn montritajn en vitrinoj, mi estas surprizita de la imagipovo kaj fondkapablo de la naŝi-oj. Malgraŭ ke la sutroj estas malnovaj kaj flavaj, la skribaĵoj ja estas vivecaj. Antaŭ pli ol mil jaroj naŝi-oj kreis la hieroglifon. Laŭ ĝiaj disvolvaj periodoj, la hieroglifo dividiĝas en ideografiaĵojn bildajn kaj alfabetajn. Naŝilingve la antaŭa prononciĝas kiel "ŝiĝiŭlu^ˆŭ" signifanta postsignon sur ligno aŭ ŝtono (skribosigno ĉizita aŭ pentrita sur ligno aŭ ŝtono). Strekoj de tiaj ideografiaĵoj estas komplikaj. Ofte ili esprimis ion per la figuroj. Pro tio, ke la "dongba-oj" uzas ilin por skribi sutrojn, do oni nomas ilin dongba-a lingvo. La lasta prononciĝas kiel "gebatee". "Geba" signifas posteulon. Tio pruvis, ke alfabetaj ideografiaĵoj estas kreitaj kaj uzataj de postaj "dongba-oj". Malgraŭ ke iliaj strekoj estas simplaj kaj signemaj, ili ĉirkuilas tamen nur en mallarĝa kampo kaj sutroj skribitaj per ili estas malmultaj.

La dongba-a lingvo havas pli ol 2 100 ideografiaĵojn kaj vortojn, kiuj estas sufiĉaj por esprimi subtilan senton, noti komplikajn aferojn kaj verki poemon kaj artikolon.

Oni diris al mi, ke oni deklamas "dongba-an sutron" en kulto. Laŭ nekompleta statistiko, la "dongba-a sutro", konservata en kaj eksterlande, nombras pli ol 20 000 ekzemplerojn kun enhavo de bonvenigo al dio kaj adiaŭo de fantomo, peto de feliĉo kaj longa vivo, likvido de plago kaj ankaŭ antikvaj naŝi-aj literaturoj, mitoj, longaj eposoj, proverboj, baladoj k. a. La mi-

taj eposoj estas romantismaj. Ekz. fama eposo "Memoraĵo pri Kreado" surbaze de amo de juna paro priskribis, kiel ili batalis kontraŭ inundo, monstro kaj dio, kiel ili alportis de la ĉielo semon de bestoj kaj grenoj al la tero venkinte malfacilojn kaj kiel ili ekspluatis virgan teron, kultivis kampon, bredis brutojn kaj produktis homojn.

En eksponhalo de la oficejo prezentiĝas multaj rulpenetraĵoj kaj surbambuaj penetraĵoj. Iu studentino konigis al mi, ke la dongba-a belarto konsistas el pikturo, skulpturo kaj paperfiguroj. Rulpenetraĵo kaj surbambua penetraĵo estas la plej origina kaj reprezenta arto heredita de la antikva pentrarto de naŝi-nacieco. Tion prezentante ŝi diris al mi montrante grandan koloran tolpenetraĵon: Jen estas la fama bildo Hengding, kiu estas longa je pli ol dek metroj kaj larĝa je tridek centimetroj. Ĝia figuro estas klara kaj bele ornamita. Kun forta, flua kaj aparta kaligrafio, la bildo montras naturan belecon de primitiva arto. Ĝia enhavo estas stranga. El ĝi vidiĝas pli ol 370 homoj grandaj kaj malgrandaj, dioj kaj fantomoj kiuj aktivis en infero, homa mondo kaj edeno. Oni konjektas, ke eble ĝin influis budhisma kulturo.


Rigardinte dongba-an penetraĵon, mi allogiĝis de malfermita sutro. En ĝi pentriĝis multaj homoj dancantaj. Demandinte mi sciis, ke ĝi es-



Dongba-aj penetraĵoj

tas lernolibro pri dancarto nomata "ĉuomo". Naŝi-lingve "ĉuomo" signifas modelon de dancado. Ĝi aperis pli frue ol "Laban-dancoskemo" de Hispanio. Hieroglifo de la lernolibro, per kiu oni notis dancadon kaj antikvan muzikan instru-

Dongba-aj hieroglifoj





Maljunaj naŝi-oj studas dongba-an pentrarton.

menton, estas bela kaj esprimriĉa. Tie montriĝas dancpaŝoj, kantoj kaj eĉ distingiĝas dancistoj kaj dancistinoj.

Kune kun dongba-a sutro herediĝis ankaŭ multaj ceremonioj kaj ceremoniaj instrumentoj de dongba-a religio. Estas pli ol 50 specoj da ceremonioj en dongba-a religio kaj la grava parto estas por kulto. La ceremoniaj instrumentoj estis uzataj en kulto de dongba-a religio, inkl. de amuleta bastono, mantamburo, markonko kaj ceremonia kostumo. Ĉio ĉi tio funkcias kiel valoraj materialoj por studi la naŝi-an kulturon.

En la oficejo oni diris al mi, ke ekde la 19-a jarcento, la dongba-a kulturo altiras atenton de multaj erudiciuloj en- kaj eksterlandaj. Iuj origine ne okupiĝis pri tio, sed kiam ili ekkonis la

dongba-an kulturon, ili do estis tuj interesitaj de ĝi. Usona erudiciulo s-ro Lock (1884 — 1962) studis botanikon en sia junaĝo. En 1922 li faris esploron en Liĝjang-gubernio kaj konis la studan valoron de la dongba-a kulturo. Ekde tiam li loĝis tie ĉi pli ol 20 jarojn! Li verkis dekelkajn librojn pri la dongba-a kulturo. La lasta el liaj verkoj estas “Enciklopedieta Vortaro Naŝia-Angla”. Li zorgeme kolektis pli ol 2 000 ekzemplerojn de “dongba-a sutro”. Dank’ al lia konigo plilarĝiĝis la influo de la dongba-a kulturo en la mondo.

La dongba-a kulturo donis valorajn historiajn materialojn por studi la historian originon, lingvon, literaturon, religion, produkton, ordinaran vivon, socian evoluon, filozofion, astronomion, kalendaron k. a. de naŝi-nacieco. □

(Daŭrigo de p. 39)

sistoj, la vilaĝanoj sentis, ke la gajiga galopado arde tiklas la bruston, kaj ili unuvoĉe ekkantis la kanton tradician:

*Malfermu la pordon,
Ĉe la galopado.*

*Bruligu la torĉojn,
Dum ardas pafiloj.
Iuj adiaŭis la mondon,
Ceteraj postvivas surtere.
Trinku ni brandon,*

*Al ĉaso tagiĝe.
Ankaŭ Man Guj devus surĉe-*

*vale reveni la vilaĝon Liŭcun,
kun siaj ĉasaĵoj. . .* □

Esperantigis **LIŬ CAJŜENG**

** La aŭtoro, Hunan-provincano, estas 38-jara. Antaŭe li verkis poemojn kaj komencis verki novelojn en la lastaj jaroj.*

Hirundoj revenis

Hunedoara estas fama urbo en Rumanio kun historio de pli ol du mil jaroj. Ĉi tie troviĝas multaj historiaj objektoj kaj belaj vidindejoj. La parkoj, kiuj kroĉiĝas al monto kaj apudas al rivero, ĉarmas per diversaj floroj. Tie la harmonie aranĝitaj historiaj objektoj, bonordaj, puraj kvartaloj kaj modernaj vivekipaĵoj multe interesas la vizitantojn. Sed antaŭ ok jaroj eĉ hirundoj ne flugis tien. Kio estis la kialo?

Apud la urbo troviĝas fer-

minejo kaj la urbo estas tradicia bazo de la fer-ŝtala industrio, kiu, kun disvolviĝo de la ekonomia konstruado de Rumanio, pli kaj pli grandiĝas kaj nun tie arbore staras altaj fornoj kaj akvoturoj. Sed la fer-ŝtala industrio ne nur kreis la civilizacion de la urbo, sed ankaŭ alportis median polucion. La fumo elfluginta el grandaj fumtuboj dense ŝvebis super la urbo, venenis la arbarojn, poluciis la grundon kaj riverojn, damaĝis la kultivaĵojn, minacis la sanon de loĝantoj kaj

eĉ hirundoj ne alflugis, kio sonorigis alarmon al la loĝantoj.

Por krei puran medion por si mem kaj por la posteuloj, oni faris penigan laboron. Laŭ la Mediprotekta Leĝo ercoselektejo, ŝtalfabrika, koaksigejo, gudra kaj asfalta fabriko kaj aliaj entreprenoj serioze poluciaj al la medio prenis teknikan kaj administran rimedojn por redukti la polucion al aero, akvo kaj grundo. Oni muntis modernajn purigilojn al la fumotuboj de la ŝtalfabrika, por ke ili ne lasu venenan gason kaj fumon en aeron, kaj ekipaĵojn al la maŝinoj de la ercoselektejo por preventi ellason de ercaj polvoj kaj repreni ilin. Nun 28 el la 30 riverpoluciaj entreprenoj de Hunedoara jam estis armitaj per akvopurigaj ekipaĵoj. Krome, la magistrato mobilizis la loĝantojn por planti herbojn kaj arbojn kiel la "naturajn purigilojn".

Dank al tiuj rimedoj la stato radikale ŝanĝiĝis. Oni ne nur reduktis la polucion, sed ankaŭ reprenis grandan kvanton da materialoj. Nun la aero super la urbo fariĝis freŝa kaj plantoj prospere kreskas. Krome, sur la tero de 35 hektaroj ĉirkaŭ skoriejo disetendiĝas verdaj legomoĝardenoj. Hunedoara estas ne nur industria centro, sed ankaŭ bela turisma urbo. Hirundoj jam revenis. Ili libere flugas en lazura ĉielo kaj ripozas sur elektraĵoj. □

Parto de Bukareŝto



Malseka lando — vindotuko de ekologia ekvilibro

Malseka lando estas tia loko, kiu ĉiam estas tromalseka aŭ kovrita de maldika akvotavolo. Ĝi estas vindotuko de ekologia ekvilibro kaj lulilo de homa civilizacio.

Malseka lando servas kiel filtrilo, tra kies densa flaŭro kaj kompakta grundo akvo fariĝas pura. Torfo kun forta adhereco povas elpurigi oleon, metalajn komponaĵojn el akvo kaj adherigi polvojn kaj bakteriojn en aero. Ĝi estas kiel giganta spongo, kiu sorbas kaj konservas grandan kvanton da akvo, moderigas atakon de diluvo, provizas riverojn per akvo, reguligas klimaton kaj servas kiel ideala loko por amuzo kaj turismo. Ĝi estas ankaŭ la bazo de nutraĵoj. Tie produktiĝas akvokaŝtano, trapo, rizo, fragmito, lotuso kaj aliaj. Tie troviĝas ankaŭ diversaj pormielaj kaj drogaj plantoj. La lando estas ankaŭ la plej bona loko por fiŝoj, kie produktiĝas du trionoj da fiŝoj de la tuta mondo. Tie vivas ne nur akvaj birdoj, sed ankaŭ raraj sovaĝaj bestoj minacataj de pereco.

En Ĉinio vivas multaj specioj de grupoj (Ĉinio havas 9 el la 15 specioj de grupoj de la tuta mondo). Grupoj estas frekventantoj de malseka lando. Ili funkcias kiel informilo por la ekologia sistemo de malseka lando. La prosperiĝo de grupoj simbolas la bonan staton de ekologia sistemo

de malseka lando. Male, montriĝas la malboniĝo aŭ detruigo de la tiea ekologia sistemo. Pojang-lago, la plej granda dolĉakva lago de Ĉinio, situas en centra Ĉinio. Vintre ĝia akvo retiriĝas kaj emerĝas vasta kota plaĝo kaj herbaj insuletoj, kiuj allogas la nordajn akvajn birdojn por tie vintri. En la sepdekaj jaroj, pro senbrida ĉasado oni jam ne aŭdis pepadon de birdoj, nek vidis grupojn. En 1983 la lago estis enlistigita kiel natura rezervejo por vintraj migraj birdoj, oni ne aŭdis plu pafadon. Dum la vintro de tiu jaro ĉi tie vivis ĉ. 840 grupoj. Kompreneble, ankaŭ la neracia dispoziciado de industriaj entreprenoj kaj akva polucio detruas vivmedion de la birdoj kaj severe minacas ilian prosperiĝon, kio devas esti serioze traktata.

Malseka lando ludas gravan rolon en la produktado kaj homa vivo, sed en iuj lokoj oni ekspluatas ĝin kiel virgan teron. Iuj eĉ konstruas baraĵon en lago por akiri kultureblan kampon. Pro tio detruigas la ekologia ekvilibro, malboniĝas vivmedio kaj detruigas riĉfontoj. Tia akiro vere ne povas kovri la perdon. En la lastaj jaroj Ĉinio faris sintezan enketadon kaj analizon kaj starigis diverstipaĵn rezervejojn en malsekaj landoj, kiaj Futjan de Gŭangdong-provinco, Caŭhaj de Gujĝoŭ-provinco, Zalong de Hejlongĝjang-provinco, la Birda Insulo kaj Longbaŭtan de Ĉinghaj-provinco.

Kredeble, dank' al la komuna klopodo de nia popolo malseka lando certe ludos pli gravan rolon en ekologia ekvilibro kaj en homa civilizacio. □

Zalong-rezervejo



HUMURAĴO

Iu homo ĉiam ŝajnegas sin, ke li konas ĉiun, kiun li alparolas. Foje, li estis monpunita de higiena kontrolanto pro sia sputo de mukaĵo surteren.

“Saluton,” li diris al la kontrolanto, “ŝajne, mi vidis vin ie antaŭe.”

“Laŭ mi, tio ne eblis,” diris la kontrolanto.

“Mi certe vidis vin,” li daŭrigis. “Mi pensas, ke tio eble okazis tie, kie vi laboris antaŭe!”

“Povus esti, ĉar tie, kie mi laboris, iris tien kaj reen multaj homoj. Eble mi forgesis vin.”

“Pasis jam longa tempo, kaj mi forgesis vin. Kie vi laboris antaŭe?”

“Antaŭe mi estis policano kaj gardis ŝtelistojn en prizono.”



KIU AGAS PLEJ RAPIDE?
(Distraĵo)

Tio estas inteligenteca distraĵo, sen limigo de la nombro de ludantoj kaj ludejo.

Ludmaniero: Per la pinto de la montra fingro rapide tuŝi jenajn ciferojn laŭ la natura sinsekvo de 1 ĝis 12. Iu persono precize registras per elektra klik-

horloĝo la tempon uzitan de ĉiu ludanto. Poste oni povas vidi, kiu agas plej rapide. Pri la kriterioj bv. konsulti la duan tabelon.

(8)	(4)	(11)
(6)	(2)	(9)
(10)	(7)	(5)
(12)	(3)	(1)

Tuŝ-tempo	Kapablo
≤3.5 sekundoj	A
3.6-4.5 sekundoj	B
4.6-6.5 sekundoj	C
6.6-7.5 sekundoj	Ĉ
>7.6 sekundoj	D

PENSU KAJ RESPONDU

Nemalproksime de bordo ankriĝas ŝipo, ĉe kies flanko pendas ŝnuro kun 10 ŝtupoj kaj la ŝtupa spaco estas 30 cm. La plej malsupra ŝtupo apenaŭ tuŝas la akvo-surfakon. Kvankam sur la maro regas kvieteco, ne ventas nek ondas, tamen okazas tajdo sur ĝi. La fluso altiĝas je 15 cm. ĉiuhore. Post kiom da horoj la tajdo povas atingi la trian ŝtupon?

(Respondo trovebla en ĉi numero)

ENIGO KAJ ELIGO DE OVO
(Magio)

Preparo: Unu kuirita kokovo senŝeligita. Unu botelo de lakto. Unu skatolo da alumetoj.


Ludo: Frotu alumeton, ĵetu ĝin en la botelon kaj metu la senŝeligitan ovon sur la aperturon de la botelo, por ke la ovo per si mem falu en la botelon, kaj oni neniel elprenu ĝin el la botelo. Blovu aeron en la botelon, por ke la ovo mem eliĝu.

Kialo: La botelo estas duonvakua ene pro brulado de la alumeto, la atmosfero puŝas la ovon en la botelon. Dum blovado la premforto en la botelo estas pli granda ol tiu de la atmosfero, tial la ovo estas puŝita kaj elboteligita.

Atentu: Oni devas elekti kokovon kun grandeco simila al tiu de la botelaperturo; la ovo devas esti kuirita modere, por ke ĝi povu ŝtopi la aperturon.

BLOVO-PILKADO
(Familia distraĵo)

Ĉirkaŭigu kvadratan tablon per lignaj tabuletoj, starigu po unu golejon faritan el lignaj pecetoj aŭ kartonpecoj ambaŭflanke de la tablo kaj metu unu tablotenisan pilkon sur ĝi. Du ludantoj (aŭ du grupetoj, ĉiu el 2-3 homoj) konkuras inter si per buŝblovo en atako kaj defendo por blovi la pilkon en la golejon de la rivalo.



Leporo Blanka kolombo
Olivarba branĉo
(Por leporjaro de Ĉinio)

de MA GANG
kaj LE TJAN

Traduko kaj reaperigo de niaj artikoloj estas bonvenaj

Lastatempe niaj legantoj demandis, ĉu ili rajtas traduki kaj reaperigi niajn artikolojn. Pri tio ni iam respondis, ke ni estas ĝojaj, se oni tradukas kaj reaperigas niajn artikolojn kaj fotojn. Ni opinias, ke tio utilas al la interkompreniĝo inter la ĉina kaj alilandaj popoloj kaj atestas, ke Esperanto povas ludi bonan rolon en amikiĝo de la mondaj popoloj. Koncerne tion ni deziras nur, ke unue, sciigu nin, el kiu numero de EPĈ estas citita la artikolo; due, sendu al ni po du koncernajn eldonaĵojn.

Ni informiĝis, ke en 1986 la gazetoj de 6 landoj publikigis niajn artikolojn kaj fotojn de nia revuo.

Ĉeĥ-lingva ZELEZNICAR (Fervojo) en sia 21-a n-ro publikigis la tradukaĵon de "Pasaĝera

hejmo" el la 9-a n-ro, 1985 EPĈ, kaj en la 23-a n-ro, 1986 la elesperantigitan artikolon "Kuraĉisto' en vagonaro" el la 9-a n-ro, 1986, EPĈ.

Ital-lingva IL FOGGIO VOLANTE (La flugfolio) en sia 1-a n-ro, 1986, publikigis la artikolon "Protekto de 'vivpana korbo' de la homaro" el la 11-a n-ro, 1985, EPĈ.

La sved-lingva ĵurnalo SKÖVDE NYHETER la 4-an, jan. 1986, reprenis la du antaŭajn paragrafojn de "Revuo al la kreskanta esperantistaro de Ĉinio" el la 12-a n-ro, 1985, EPĈ, kaj la 3-an de sept. 1986, la lastajn kvar paragrafojn de "La teritorio kaj loĝantaro de Ĉinio" el la 8-a n-ro, 1986, EPĈ.

Pers-lingva "IRANA SEMAJ-

NA SPORT-REVUO" en sia 16-a n-ro, 1986, publikigis la tradukitan artikolon kaj fotojn pri la ĉinaj luktartoj el nia gazeto.

German-lingva DER NEUE WEG (NOVA VOJO) de GDR la 9-an de julio, 1986, publikigis la tradukaĵon de la artikolo "Pagodoj de Ĉinio" el la 7-a n-ro, 1985, EPĈ.

Japan-lingva "Infana Literatura de Japanio" en sia 9-a n-ro, 1986, publikigis la tradukitan artikolon "Hans Andersen en Ĉinio", el la 1-a kaj 2-a numeroj, 1986, EPĈ.

Ni elkore dankas la supre menciitajn gazetojn, ĵurnalojn kaj la legantojn, kiuj elesperantigis kaj diskonigis niajn artikolojn.

— La Red.



Alilandaj gazeto kaj ĵurnaloj, kiuj tradukis kaj reaperigis artikolojn de EPĈ

Urso ellaboras mielon



Nigra urso ŝatas mielon. Tial, imitante abelon ĝi kolektis nektaron kaj volis konstrui grandan abelujon.

Iutage, la nigra urso kolektis nektaron en floraro. Tiam pigo kantis sur arbo. La urso diris: "Ne ĝenu min per via teda pepado, starante sur la arbo! Ankaŭ vi devas fari ion utilan."

"Kion fari?" demandis la pigo.

"Ellaboru mielon!" gaje diris la urso, "la mielo estas bona nutraĵo. Ĉiuj ĝin ŝatas. Estus eksterordinare, se la bestoj ĉiuj en la arbaro ellaboru mielon!"

"Mi ne kapablas tion fari," malsamopinie diris la pigo, "ellabori mielon estas nur la okupo de abeloj."

La urso diris: "Hm! Vi havasflugilojn pli grandajn ol tiuj de

abelo. Via kondiĉo estas multe pli favora ol la mia. Sed vi ne volas tion. Malmultepromesa!"

La pigo ne volis aŭskulti la babiladon de la urso kaj forflugis kapti insektojn.

Alian tagon, konstruante la abelujon, la urso vidis, ke elefanto aliras, kunportante grandan lignotrunkon per la rostro.

La urso tuj ĝin salutis, dirante: "Venu al mi, sinjoro elefanto!"

"Por kio?" demandis la elefanto.

"Helpu min en konstruado de abelujo," fiere diris la urso, "Mi jam ellernis kolekti nektaron kaj baldaŭ ellaboros mielon en la abelujo."

"Ĉu vi scipovas ellabori mielon?"

"Jes!" diris serioze la urso, "tion povas ne nur mi, sed ankaŭ la aliaj bestoj, se nur ili estas diligentaj!"

"Ĉu ankaŭ mi?" plue demandis la elefanto.

"Kompreneble!" diris la urso, "vi estas diligenta, ne timas malfacilaĵojn kaj havas neelĉerpeblan forton. . ."

Ne finaŭdinte la vortojn, la elefanto foriris kun la ligno.

La abelujo estis konstruita, tamen la urso neniel povis ellabori mielon. Tagoj pasis unu post alia, kaj la malsato komprenigis la urson. Fine, ĝi malrapide eliris el la abelujo kaj venis al maizkampoj, ĉar ĝi bone sciis, ke post tuttaga deŝirado de maizspikoj ĝi restigos al si unu. □

Lernema alaŭdo

Matene, alaŭdo bele kantante flugas al la leviĝanta suno. Ĝi kantas tiel bele, ke ankaŭ la paseroj, kiuj plej ŝatas pepadi matene, sentas, ke ilia pepado estas unutona, kaj ĉesas pepi.

Du paseroj tre admiras la alaŭdon. Unu el ili diras:

"Se ni havus tian oran voĉon!"

"Ĝia voĉo estas denaska," diris la alia.

"Tute prave!" diris la unua, "Dio estas tre maljusta. Li donis al ĝi belan voĉon, sed kia estas

la nia? Ni scipovas fari nenion alian krom pepi."

Post plendado kontraŭ Dio ili silentiĝis.

Tiam, kantinte momenton, la alaŭdo flugis sur branĉon kaj demandis al ili:

"Kial vi ne plu kantas, fratoj paseroj?"

La paseroj honteme respondis: "Nia voĉo estas malagrabla".

"Mi tre ŝatas vian voĉon," diris la alaŭdo, "Mi volas lerni de vi!"

"Ĉu tio ne estas moko pri ni!" demandis la paseroj, "kiu ne scias vin, alaŭdon, kiu denaske havas belan voĉon kaj povas kanti diversajn oreplacajn kantojn? Ĉu ankaŭ vi bezonas lerni de aliaj birdoj?"

"Vi eraris!" diris la alaŭdo, "se mi vere havas belan voĉon, tio estas rezulto de mia lernado de ĉiuj birdoj, inter kiuj estas vi ambaŭ. Kompreneble, mi devas lerni de vi."

Tion aŭdinte, la paseroj rigardis unu al la alia kaj diris plu nenion. □



Oazo en Dezerta Tropika Zono


Fotoj de GAŬ MINGJI



Dinghuŝan-rezervejo

Sciencistoj en la rezervejo

Dinghuŝan-rezervejo ($112^{\circ} 34'E$, $23^{\circ}10'N$) en la nord-orienta antaŭurbo de Ĝaŭĉing, Ĝuangdong-provinco, suda Ĉinio, estas proksima al la Tropiko de la Kankro. Preskaŭ ĉiuj aliaj lokoj de la tero ĉe la sama latitudo, kiaj la norda parto de la Hinda Duoninsulo, la suda parto de la Araba Duoninsulo, la norda parto de Afriko kaj la suda parto de Norda Ameriko, estas dezertoj. Tial la zonon, kie ili troviĝas, oni nomas dezerta tropika zono. Tamen suda Ĉinio, influate de la varma kaj humida musono el Pacifiko, vestiĝas per subtropika arbaro kaj estas nomata oazo en la dezerta tropika zono. La arbaro kun areo de pli ol 1 100 hektaroj estas riĉfonto rara ne nur en Ĉinio sed ankaŭ en la mondo.

Post kiam Dinghuŝan estis difinita en 1956 kiel rezervejo, la Botanika Instituto de Suda Ĉinio sub la Ĉina Akademio de






Arboradikoj

Kuraca planto






Rara arbospeco

Sciencoj fondis specialan organizon por ĝin protekti kaj konstrui. En 1979, rekomendite de la Ŝtata Komisiono pri Homo kaj Biosfero de Ĉinio, sankciite de la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio kaj aprobite de rilata fakto de UN, la loko estas difinita kiel

unu el la tri rezervejoj, kiujn Ĉinio partoprenigas en la rezerveja reto de la monda biosfero, kaj ĝi estas ankaŭ unu el la tri esploraj stacioj pri la lokalizo de ekologia sistemo, kiuj entreprenas la esploran planon de la Homo kaj Biosfero de Unesko.

Floroj



Arbo el la familio de pteridacoj



Poŝtmarkoj pri antikvaj ĉinaj sciencistoj

de LU DONG



Tiuj tri serioj da poŝtmarkoj prezentas figurojn de antikvaj ĉinaj sciencistoj, kiuj faris eminentan kontribuon al la disvolviĝo de scienco de la ĉina nacio. La kvar pecoj (supre maldekstre), emi-



siitaj en 1955, montras farmakologon Li Ŝigen, astronomon Ĝang Heng, matematikiston Zu Ĉongĝi kaj astronomon Seng Jiŝing. La ok pecoj (malsupre), emisiitaj en 1962, prezentas Caj Lun kaj paperfaradon, Sun Simjaŭ kaj preparadon de medikamento, Ŝen Kŭo kaj geologian esploradon, kaj Gŭo Ŝouĝing kaj astronomian observadon. Kaj la kvar pecoj (supre dekstre), emisiitaj en 1980, surhavas figurojn de sciencisto Ŝju Ĝuangĉji, akvomastromisto Li Bing, agronomo Ĝja Siŝje kaj tekstila specialisto Hŭang Daŭpo.





**ĈINIO PRODUKTIS EN 1986
390 MILIARDOJN DA KG
DA GRENO**

Kvankam Ĉinio suferis diversajn naturajn katastrofojn en agrikultura produktado en 1986, tamen ĝia totala produktokvanto de greno atingis 390 miliardojn da kg., je ĉ. 10 miliardoj da kg. pli multe ol tiu en 1985.

**NOVA CELO DE LA ĈINA
ŜTALA INDUSTRIO**

Ĉinio produktis 50 milionojn da tunoj da ŝtalo en 1986 kaj fariĝis la kvara granda lando laŭ produktokvanto de ŝtalo en la mondo. Ĝi celas produkti 54 milionojn da tunoj da ŝtalo en 1987 kaj strebos al 80 milionoj da tunoj da ŝtalo ĉirkaŭ 1995 por anticipi plenumi la planon difinitan por la kuranta jarcento.

La unua altforno de Ĉinio, kiu produktas ĉiutage 10 000 tunojn da fero




Konservo de greno

**ĈIUFLANKA DISVOLVIĜO
DE LA ELEKTRA INDUSTRIO**

En 1986 Ĉinio produktis 445.3 miliardojn da kilovattthoroj da elektro, je 15.3 miliardoj da kilovattthoroj pli multe ol kiom oni difinis por la plano. La jara produktokvanto de elektro pliiĝis je 9.4% kompare kun tiu en 1985 kaj starigis rekordon en la ĉina

historio. Ankaŭ la plano de elektroenergia konstruado estis superplenumita. En 1986 la totala kapacito de la nove instalitaj generatoroj estis 5.96 milionoj da kilovattoj, kaj la laŭplane konstruitaj grandaj kaj mezgrandaj generatoroj estis transdonitaj al uzado je la jarfino. Krome, estis konstruitaj ankaŭ 6 500 kilometroj

Oni ekipas Ĝjaŭzŭo-elektrejon per generatoro kun kapacito de 200 000 kilovattoj.



da elektraĵ transformatoraj lineoj de pli ol 110 kilovoltoj.

LA 11-A ALTPRODUKTA JARO DE DAĈING-OLEKAMPO

Daĉing-olekampo en Hejlongĝjang-provinco de Ĉinio ekspluatis malriĉan naftan stratumon 1 000 metrojn sub la tero, aplikante novan teknologion, ke en 1986 la olekampo ne nur produktis 55 milionojn da tunoj da nafto surbaze de la jara produktokvanto de 50 milionoj da tunoj da nafto en la pasintaj sinsekvaj dek jaroj, sed ankaŭ kreis kondiĉojn por la posta stabila alta produktado.

TOTALA EKSPORTOVALORO DE ĈINIO TRIOBLIĜIS EN OK JAROJ

Pasis nur ok jaroj, de kiam Ĉinio praktikis la pordmalferman politikon al eksterlando difinitan je la fino de 1978, tamen multe ŝanĝiĝis la longdaŭra ferma kaj duonferma stato en la eksteraj ekonomiaj rilatoj. Ĝia totala valoro de diversaj eksportitaj varoj en 1986 superis 30 miliardojn da usonaj dolaroj, t.e. triobliĝis en la pasintaj ok jaroj. Kvankam Ĉinio faris grandan penadon dum la pasintaj preskaŭ 30 jaroj antaŭ 1978, tamen ĝia totala eksportovaloro estis nur 9.7 miliardoj da usonaj dolaroj.

GRANDKVANTE KRESKIS LA ĈINA EKSPORTITA KARBO

Lastjare en la monda karba merkato livero superis bezonon. En tia situacio Ĉinio eksportis 9.85 milionojn da tunoj da karbo kaj akiris pli ol 397 milionojn da usonaj dolaroj, je 30% kaj 27% respektive pli multe ol en 1985, kaj per tio rompis la rekordon en la historio tiuflanke.

LA TRIA GRANDA HAVENO EN SUDA ĈINIO KONSTRUITA

Konstruiĝis la tria granda ha-

veno en suda Ĉinio, Fangĉenghaveno en la Gŭangŝji-a Ĝŭangnacieca Aŭtonoma Regiono, kun sep profundaj ankrejoj por 10 000-tonelaj ŝipoj kaj ĉefaj kompletigitaj ekipaĵoj. Ĉiujare ĝi povas en- kaj elŝipigi 4.69 milionojn da tunoj da varoj kaj estonte 9.1 milionojn da tunoj da varoj.

KEMIFIBRA PRODUKTO-KVANTO DE ĈINIO SUPERIS MILIONON DA TUNOJ

Laŭ informo de la Ĉina Tekstila Ministerio, Ĉinio produktis pli ol milionon da tunoj da kemifibroj en 1986 kaj fariĝis la kvara granda lando laŭ produktokvanto de kemifibroj nur post Usono, Japanio kaj Sovetio. Escepte de iuj specialaj kemifibraĵoj, Ĉinio povas produkti teksaĵojn ĉefe el polipropilenaj fibroj, vinilono, orlono, dilono, kaprono k.a.

ĈINA REZERVOKVANTO DE ORO OKUPAS LA KVINAN LOKON

Respondeculo de la Geologia kaj Minerala Ministerio de Ĉinio anoncis, ke Ĉinio akiris rimarkindan progreson en or-mina prospektorado. La rezervokvanto de oro de Ĉinio okupas la kvinan lokon en la mondo nur post Sud-Afriko, Sovetio, Usono kaj Kanado.

PLI OL 2 000 SURTERAJ SATELITAJ TELEVIDSTACIOJ STARIGITAJ EN ĈINIO

Je la fino de 1986 Ĉinio jam starigis 2 050 surterajn satelitajn televidstaciojn. Tiu de la Ŝinhŭa-a Novaĵ-agentejo en Pekino en grandeco de kofro, por telesendi ĉinlingvajn artikolojn povas en unu aŭ du sekundoj telesendi pere de satelito novaĵ-artikolojn, fotojn kaj diversajn donitaĵojn kaj informojn al pli ol 4 000 ĉinaj, orientaziaj kaj japanaj ĵurnalaj redakcioj kaj radiostacioj kun bazaj donitaĵoj.

ARTEFARITA FEKUNDIGO DE NIGRAKOLAJ GRUOJ

Nigrakola gruo estas kurioza birdo propra al Ĉinio kaj ankaŭ migranta birdo. Inter la 15 mondkonataj gruospecioj nur ĝi vivas sur altebenaĵo. Antaŭ nelonge iu zoologia ĝardeno de Ĉinghaj-provinco, nordokcidenta Ĉinio, unuafoje sukcesis arte fekundigi nigrakolajn gruojn.

NUTROKVANTO PRENITA DE LA ĈINA POPOLO

La Sanprotekta Ministerio de Ĉinio unuafoje publikigis en Pekino la enketon pri nutro de Ĉinio: La meza kvanto de ĉefaj nutraĵoj prenita de la ĉina popolo estas iom pli alta al tiu de aliaj aziaj popoloj. La kvanto de varmo kaj proteino prenita de la nordaj ĉinoj jam proksimiĝis al la meza kvanto de la mondaj popoloj. Escepte de la loĝantoj de Taj'ŭan kaj Tibeto, sume 240 000 diverstipaj homoj de 28 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj estas esploritaj.

"PLENA ĈINLINGVA VORTARO" ELDONATA


Antaŭ nelonge la unua volumo de "Plena Ĉinlingva Vortaro" eldoniĝis en Ĉinio. La vortaro konsistas el 12 volumoj kaj unu aldona volumo de indekso. Enhavante ĉ. 370 000 artikolojn kun pli ol 50 milionoj da ideografiaĵoj, ĝi estas plena vortaro kun studa kaj praktika valoro. La ceteraj volumoj eldoniĝos antaŭ 1990.

27 MONDĈAMPIONECOJ GAJNITAJ DE ĈINIO

En 1986 ĉinaj sportistoj gajnis 27 mondĉampionecojn en mondkonkursoj pri volanludo, tablotenis, naĝo, aviadila modelo, pafado, paraŝutado, velŝipa modelo, gimnastiko, flugpilko, ĵudo, halterlevo kaj akrobata gimnastiko. Ĉinaj



Ĉina sportisto Jang Jang, kiu gajnis la ĉampioncon de la vira unuopa ludo en la finalo de la Monda Grandpremia Konkurso de Volanludo



Nova produktolinio de artefarita felo en Ĉinio

sportistoj rompis la mondajn rekordojn en halterlevo kaj virinaj 5 000-metra kaj 10 000-metra marŝoj sur vego. La ĉina paraŝuta teamo akiris la plej bonan sukceson en la kvaropa arta paraŝutado.

FOSILIA DENTO DE ĈINA SIMIHOMO MALKOVRITA

Ĉinaj sciencistoj lastatempe trovis en Junnan-provinco fosilian denton de plej antikva ĉina simihomo antaŭ 2-2.5 milionoj da jaroj. La eltrovo donis novan ateston, ke Junnan estis unu el la plej fruaj loĝlokoj de la homaro.

LA PLEJ FRUA KOMETA MAPO

Antaŭe oni prenis la kometan mapon de Jerusalemo de 66 p.K. kiel la plej fruan. La kometa mapo, lignogravurita stelmapo de Ŝjuji, lastatempe trovita en Ĝjansu-provinco, Ĉinio, estas cent jarojn pli frua ol la supre menciita.

Tiu mapo estis trovita de la Nankina Muzeo en tombo de la

Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 8 p.K.) en Ŝjuji-gubernio de Ĝjansu-provinco. Ĉinaj arkeologoj vidis, ke sur la mapo la vosto de la kometo estas parte ŝirmita de la luno, kaj konstatis, ke la antikvaj ĉinaj astronomoj jam sciis, ke la kometo estas pli malproksime de la tero ol la luno. Tiu kono estiĝis 1 600 jarojn pli frue ol en Eŭropo.

SUBTERA TERMOFLUO SUR LA ĈINGHAJ-TIBETA ALTEBENAĴO


Sur la altmarnivela kaj frosta Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo ŝprucas pli ol 400 termofontoj kun temperaturo de minimume 15°C, kiuj, senfrostaj kaj vaporantaj tutjare, formas miraklon sur la neĝkovrita altebenaĵo. Ekz., en suda Tibeto iu termofonto, kun aperturo 5 500 metrojn super la marnivelo, kaj kelkaj rondaj lagetoj el fontakvo, ĉiu kun diametro de dek metroj, tutjare ŝprucigas akvon de 86°C.

LONGEGA ŜTONA KAVERNO

Lastatempe en la pitoreskejo de Tajlaŭ-monto de Fuĝjan-provinco estis trovita longega ŝtona kaverno. Por trairi ĝin prospektoroj uzis 8 horojn. En la kaverno lirlas fontakvo kaj staras diversaj groteskaj rokoj. Ĝia malvastejo estas irebla nur por unu homo, sed ĝia vastejo povas enteni sume cent homojn. Tia kaverno estas unika ne nur en Fuĝjan-provinco, sed ankaŭ malofte videbla en la aliaj lokoj de Ĉinio. □

KOREKTO

1. Anstataŭ "Lastjare" legu "En novembro 1985" en la dekstra kolumno, 11-a linio, p. 58, n-ro 3, 1987.
2. Daŭrigo de p. 41 de n-ro 3 aperas sur p. 44.
3. Oni senatente inversigis la 19-an kaj 20-an liniojn en la maldekstra kolumno, p. 67, n-ro 2, 1987.



eldonata de la Ĉina Esperanto-Eldonejo konigas al vi Ĉinion ĝenerale. La unua libro de tiu ĉi serio aperis en 1984, kaj jam 7 libroj publikiĝis ĝis nun, nome:

40 Vidindaj Lokoj en Ĉinio (12-Es-1825P) £ 1,90 US\$ 3,90

Gvidlibro pri 40 plej famaj pitoreskejoj en Ĉinio. Krom la priskriboj pri la pejzaĝoj vi legos ankaŭ interesajn legendojn kaj popolrakontojn pri tiuj lokoj. Kun koloraj bildoj kaj ilustraĵoj.

Mia Vivo (17-Es-1884P) £ 0,80 US\$ 1,70
La libro rakontas al vi, kiel vivas kaj laboras ĉinoj el diversaj socitavoloj, inter kiuj troviĝas laboristo, kamparano, advokato, arkeologo, dancistino, lamao kaj eĉ frato de la lasta imperiestro de Ĉinio. Kun bildoj.

Dek Ses Urboj de Ĉinio (17-Es-1885P) £ 1,90 US\$ 3,90

La ĝenerala skizo pri la historio, ekonomia konstruado, kulturo kaj edukado k. a. de 16 ĉinaj grandaj urboj. Kun koloraj kaj nigra-blankaj bildoj.

Kuracaj Mangaĵoj (15-Es-2047P) £ 0,65 US\$ 1,25

Estas rekomendataj al vi 87 receptoj de kuracaj kaj sanigaj trinkaĵoj, konfitaĵoj, pladoj k. a. Ĉe la fino troviĝas 3 apendicoj: Pri efikoj de ingredientoj de la kuracaj mangaĵoj, Tabelo pri ĉefaj nutroelementoj bezonataj de la homa korpo kaj Nutra-

ĵoj taŭgaj kaj netaŭgaj por pacientoj. Kun koloraj bildoj.

Ĉinaj Familiaj Pladoj (15-Es-2061P) £ 1,10 US\$ 2,15

Enhavante 86 ĉinajn pladojn. Plejparto el ili estas ne nur nutraj, belkoloraj, bonodoraj kaj bongustaj sed ankaŭ malkaraj kaj facile prepareblaj. La libro detale klarigas la preparadon de la pladoj, ĝi multe helpas al tiuj, kiuj interesiĝas pri la ĉina kuirarto. Kun koloraj bildoj.

Tajĝiĉjŭan (17-Es-2065P) £ 1,30 US\$ 2,50

Tajĝiĉjŭan estas unu el la specoj de la ĉina luktarto, saniga gimnastiko. Krom plifortigi korpon, ĝi ankaŭ donas tre bonan efikon por kuraci hipertension, ulceron, kormalsanon, ftizon kaj aliajn kronikajn malsanojn. Kun klarigo kaj bildo por ĉiu teniĝo.

Gvidlibro pri Pekino (12-Es-2067P) £ 1,55 US\$ 2,85

Ĝi servas kiel helpanto al eksterlandaj gastoj en vizito al Pekino, konigante vidindajn lokojn, hotelojn, restoraciojn, trafikajn liniojn, gravajn telefonnumerojn, metiartaĵojn kaj lokajn produktaĵojn ktp. Kun mapo kaj koloraj bildoj.

Mendu ĉe: Libroservo de UEA, Perantoj de EPC aŭ Internacia Libro-komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio, P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Loĝantoj sur la altebenaĵo

de GE ŜI

LA UNUA LOKO DE LOĜANTOJ

De la riverfonto veturinte malsupren laŭ Tŭotŭo-rivero ni atingis Tŭotŭohejan, la unuan lokon de loĝantoj, kruciĝejon de la Ĉinghaj-Tibeta Ŝoseo kaj Tŭotŭo-rivero.

En la regiono de la riverfonto kun periferio de kelkcent kilometroj, Tŭotŭohejan estas kompare vigla loko. Laŭ la ŝoseo lokiĝas dekoj da malgrandaj domoj, de hoteloj, butikoj kaj poŝtoficejo. Ĉirkaŭ la urbeto estas herbejo punktita de tenadoj. Ĝin preterfluas Tŭotŭo-rivero, la fonto de Jangzi.

La 256 km. longa Tŭotŭo-rivero, kiu fontas en la neĝkovrita monto Geladandong, enpreninte en sin la akvon el degelinta neĝo de la neĝkovritaj montoj kaj fontoj, fariĝis tie sufiĉe granda ĉe Tŭotŭohejan. Kvanke la rivero en la seka sezono larĝas nur 7.8 metrojn kaj profundas apenaŭ ĝisgenue, tamen dum inundo ĝi larĝas 270 metrojn, kun profundo de pli ol 2 metroj. Tie kuŝas la Ŝosea Ponto super Tŭotŭo-rivero, la unua ponto de Jangzi-rivero pli ol 300 metrojn longa.

Antaŭe tie vivis nur malmultaj paŝtistoj. Post la funkcio de la Ĉinghaj-Tibeta Ŝoseo estis

konstruitaj hidrologia, meteorologia kaj transporta stacioj kaj arma gastejo. Transloĝiĝis tien multaj paŝtistoj de Tibeto. Nun la urbeto havas proksimume 1 000 loĝantojn kaj tie situas la subdistrikta registaro de Tanggulaŝan.


En la urbeto mi trovis, ke la tieaj loĝantoj portas diversajn vestojn, kiaj tibetana robo, ĉasista kostumo, trumpetforma pantalono, pantalono kun mallarĝaj krurumoj k. a. Ĉe pordo de ĉiovendejo kuŝas memfaritaj bilardaj tabloj. Ĉio ĉi montras, ke ankaŭ ili aspiras al la vivo de la marbordaj malfermitaj urboj de Ĉinio. La pasaĝeraj aŭtoj inter Lhasa kaj Golmud iaforte portis tien ankaŭ alilandajn vojaĝantojn, kiujn geknaboj senĝene salutas per "Ha lo, ha lo!"

Estas interese, ke preskaŭ ĉiuj junaj virinoj en la loko portas buŝŝirmilon, ĉu en serena tago, ĉu en neĝa tago. Komence, mi pensis, ke eble ili timas la tro malvarman aeron, kaj poste mi sciigis ke tio estas protekta rimedo kontraŭ la ultraviolaj radioj sur la altebenaĵo.

Mi forte interesiĝis pri la tieaj loĝantoj.

JUNULOJ DE LA HIDROLOGIA STACIO

La Tŭotŭohe-hidrologia Sta-



cio estas la unua en la regiono de la fonto de Jangzi-rivero. Tie laboras kvin junuloj, el kiuj la plej aĝa havas malpli ol 28 jarojn.

La stacio konsistas el du terkabanoj, kiuj servas kiel iliaj dormoĉambroj kaj oficejoj.

Mi eniris la ĉambron de la 26-jara staciestro Ŭang Ŭej.

La ĉambro estas meblita simple: du litoj, unu tablo kaj unu fera forno en la mezo, kiun oni hejtas per seka bovfekaĵo. Sur la tablo kuŝas radioricevilo. Sur la muro pendas gitaro. Kalendaroj kaj poŝtkartoj kun figuroj de filmstelulinoj kaj modelinoj de laŭmodaj kostumoj vidiĝas sur la muroj, sur litkapoj kaj sub vitroplatoj.

Mi diris kun rideto: "Via ĉambro vere estas virina mondo."

Ŭang Ŭej diris kun nenia rido: "Sciu, ke ni kvin estas fraŭloj!"

De tio komenciĝis nia interparolo. Post diplomitiĝo de teknika mezlernejo ili estis senditaj labori en la stacio. Ili ne ĉagreniĝas en la malfacila vivo. Ili diris: "Kvankam la akvo estas malmola, ni tamen trinkas ĝin kutime. Ni estas viglaj kvankam tie mankas oksigeno. Sen freŝaj legomoj ni povas hoki fiŝojn kaj ĉasi gazelojn."

Tamen ilin ĉiam ĉagrenas manko de distrado kaj knabinoj. La unusola radioricevilo de la stacio difektiĝis antaŭ kelkaj monatoj kaj ankoraŭ ne ripariĝis. Ili jam tediĝis de kartludo kaj ĉina ŝakludo. La televida surtera satelita stacio ne povas funkcii pro manko de elsenda turo. Kie do ili povas trovi amikinson? En la urbeto estas

tre malmultaj knabinoj, kiuj tamen ne volas edziniĝi al alvenintoj el aliaj lokoj. Neniu el la knabinoj de la urboj Golmud kaj Ŝjining volas labori en la damninda stacio. Ni prenu edziĝintan Ŝjaŭ Ĝang kiel ekzemplon. Antaŭe li provis fianĉiĝi al urba knabino, sed malsukcesis nur pro tio, ke li laboras en Tŭotŭohejan. Fine li devis edziĝi al kampara knabino. Ili kun flamo en la brusto diris: "La sola kaŭzo estas, ke ni laboras en tro alta loko."

Estas ne senkaŭze, ke ili de tempo al tempo ludas gitaron kontraŭ la bildoj de belaj filmstelulinoj.

Tamen ĝuste tiuj kvin fraŭloj jaro post jaro, ĉiun sepan horon mezuras la akvon de Tŭotŭo-rivero kaj, kune kun siaj kolegoj en la hidrologia stacio de Ĉumarhejan kaj tiu de Tongtjanhe-

Kamela karavano sur altebenaĵo



jan, registras donitaĵojn pri hidrologio de Jangzi-rivero kaj liveras ilin al la supera instanco.

EN METEOSTACIO SUR LA ALTEBENAĴO

La konstruo de Tŭotŭohe-meteostacio estas multe pli impona ol tiu de la hidrologia stacio. La arĝentkolora ferbarilo de la stacio montras ĝian apartan pozicion en la urbeto. Ĝi estas unu el la meteostacioj, kiuj troviĝas en la plej altaj lokoj super la marnivelo en la mondo. La klimato de la Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo havas kompare grandan influon sur tiu de la mondo, precipe de orienta Ĉinio kaj la pacifika regiono, tial la meteostacio estas taskita prezenti informojn por interŝanĝi ilin kun la monda meteoservo. Bone konante la gravecon de sia laboro, ili diris al mi kun memfido, ke ĉiutage ili telefonas rekte al la Centra Meteologia Buroo en Pekino.

Ne plu troviĝas en ĝi la malnovaj laborantoj en la komenca periodo post ĝia fondiĝo. El la nunaj 40 laborantoj, escepte de la 45-jara staciestro Hu Gŭanlong, ĉiuj estas malpli-ol-30-jaraj. Iuj el ili memvole venis tien post diplomitiĝo, aliaj kun aspiro al mistera vivo sur la altebenaĵo kaj triaj por ricevi altan salajron.

En la stacio laboras multaj gejunuloj, inter kiuj triono estas junulinoj. Tial tie estas pli vigle ol en la hidrologia stacio. Tiu harmonia kolektivo eltenas la provadon de la malfavora medio. Eĉ en la temperaturo de 40 gradoj sub la nulo, ili neniam ĉesigis la altitudan kaj surteran observadon dufoje ĉiutage kaj akurate sendas la veterinformojn al Pekino.



Loĝantoj de Tŭotŭohejan

La vivo sur la altebenaĵo estas monotona. En la postlaboraj horoj ili faras ĉion eblan por diversaj aktivecoj, kiaj fiŝhokado, pikniko, ŝakludo, lego de eldonaĵoj, balo k.a. Ili humure diris, ke la nivelo de ilia balo estas la plej alta: en la loko ĉ. 5 000 metrojn super la marnivelo.

Junie de 1986, kiam la ĉinaj flosaj ekspedicioj por esplori Jangzi-riveron pasis sub la Ŝosea Ponto super Tŭotŭo-rivero, ankaŭ ili komencis flose veturi Jangzi-riveron. Ili aĉetis du malgrandajn kaŭĉukajn boatojn kaj faris mallongdistancon flosadon tenante kvinstelan flagon kaj kriante la sloganon "Konkeru

Jangzi-riveron". Foje ili flose veturis dekojn da kilometroj kaj revenis ne kontente. Ilia estro Hu ofte timis, ke ili ne povos reveni flose veturinte ĉ. mil kilometrojn.

Amo ĉiam akompanas la gejunulojn. Ankaŭ tie ne estas escepto. Tie estas tri paroj da geedzoj, inter ili estas la grupestro pri altituda observado Ĝu Hajĉing kaj lia edzino.

Ĝu estas parolema kaj vigla. Tamen li fariĝas tuj malbonhumora, kiam mi mencias lian nunan staton. Li diris al mi, ke antaŭ du monatoj lia edzino gravediĝis kaj nun ripozas en sia gepatra hejmo. Mi deman-

dis al li, ĉu la virinoj, kiuj laboras en la stacio, ĝuas specialan avantaĝon de laborprotekto kaj ĉu ili povas ricevi forpermeson por ripozi antaŭ akuŝo. Trovinte, ke mi, alilokano tute ne komprenas tion, li respondis: "Kia libertempo povas esti antaŭ la akuŝo? Por tio ili devas peti longtempan forpermeson sen salajro!" "Ĉu la mono sufiĉas por ĉiutaga vivo?" mi demandis plue. "Ĉu la mono estas pli grava ol homo?" kontraŭdemandis min Ĝu. "En la loko mankas oksigeno kaj legomoj, kaj krome, la akvo havas altan malmolecon. Kiu scias, kian malbonan influon sur la bebon tio alportos?" Por feliĉo de la sekva generacio li volas forlasi la monton kaj labori alie.

En la Printempa Festo, tradicia festotago de la ĉina popolo, nur triono de ili malsupreniras al siaj familianoj, dum la ceteraj devas resti por labori. Tiel, oni ne scias, en kiu jaro ili ekhavis specialan manieron por pasigi la feston: La unuan de la unua monato laŭ la lunkalendaro ili, tamburante kaj eksplodigante krakfajraĵojn, arope iras tra la Ŝosea Ponto super Tŭotŭo-rivero, poste revenas en la stacion kaj ploregas. Per ploro ili esprimas sian sopiron al la familianoj. Plorinte ili daŭrigas sian laboron.

ŜOFORO SUR LA ĈINGHAJ-TIBETA ŜOSEO

Post sia ekfunkcio en decembro 1954 la Ĉinghaj-Tibeta Ŝoseo prenis sur sin la taskon transporti al Tibeto 80% de la varoj el la landinterno. En ĉiu tagnokto veturas sur ĝi meznombre pli ol 1 000 aŭtoj.

Revenante de Tŭotŭohejan al Golmud, mi prenis kamionon de

la Tibeta Transporta Taĉmento kaj havis la ŝancon sperti la vivon de ŝoforoj, kiuj laboras tutajare sur la ŝtorma altebenaĵo.

Ŝoforo Jan Ĝingbin aĝas 29 jarojn. Laŭ lia maldelikata aspekto, oni povas scii je la unua vido, ke li estas serena viro. Tuj post mallonga interparolo en la stirejo ni jam amikiĝis. Li fiere diris al mi, ke li laboris sur la ŝoseo jam dek jarojn. En 1986 li estis juĝita kiel duaklasa ŝoforo. Li bone konas, kiom da kurbiĝoj kaj kavoj kaj kiaj ŝtonoj estas sur la ŝoseo de Lhasa ĝis Golmud, kiu longas ĉ. 1 000 km.

Kiam ni estis en gaja interparolo, ni sentis drastan ekbalanciĝon de la kamiono. Li tuj bremsis ĝin, dirante: "Krevis la pneŭmatiko. Ne maltrankviliĝu! Baldaŭ ĝi funkcios denove." Elpreninte riparilojn el sub la sidloko, li elsaltis kaj mi sekvis lin.

La suno estis subiranta kaj frostis la malvarma vento sur la altebenaĵo. Li lerte demetis la pneŭmatikon kaj mi senprokraste helpis lin. Post ioma penado mi sentis sufokitecon pro manko de oksigeno. Mi demandis lin, ĉu tio okazas ofte. Li respondis al mi: "Jes." Novembre de 1985 neĝegis. Dekoj da aŭtoj haltis survoje. Ili vivis de la manĝaĵoj liveritaj de helikopteroj. Tage ili ludis kartojn sur tegmentoj de stirejoj kaj nokte dormis en ili.

Parolante li laboris. Post pli ol duonhoru li anstataŭigis la malnovan per nova kaj ni daŭrigis nian vojon.

Fariĝis malhele. Nia kamiono preterkuris plurajn gastejojn, tamen li neniam volis haltigi ĝin. Mi lin demandis: "Kie ni noktu?" Li respondis senhezite: "Ĝuste ĉi tie." Mi komprenis,

ke li intencas daŭrigi la vojon en la nokto. Mi vere maltrankviliĝis. "Ĉu ne povus okazi io neatendita tiukaze?" "Ne gravas!" li diris indifere. "Kiam ni fariĝos dormemaj, ni haltigos la kamionon ĉe la vojo kaj dormetos."

Ju pli fariĝis malhele, des pli multe li babilis. Li diris al mi ankaŭ, ke la ŝoforo, kia li, veturigas pasaĝeron aŭ laŭ aranĝo de sia gvidanto, aŭ por gajni al si monon aŭ por sin distri en interparolado kun li. Verŝajne, mi estis lia akompananto, kiu babilis kun li survoje.

Por la sekureco mi ekbabilis kun li pri ĉio en la mondo, por ke li ne dormetu. Li rakontis al mi pri siaj familio, gepatroj, edzino, filo kaj interesaĵoj en la vivo. Li fanfaronis, ke foje li kverelis kun iu pro devanco de ties aŭto kaj fine li venkis; foje li faris proceson kontraŭ trafik-kontrola stacio, ankaŭ li venkis kaj foje li konkursis pri senmova sidado kun ŝoforo, kiu direktis sian aŭton kontraŭ la lia kaj fine cedis al li la vojon.

Kelkajn horojn poste, mi sentis soifon kaj miaj palpebroj malleviĝis pro dormemo. Mi parolis pli kaj pli malmulte, dum li fumis cigaredojn unu post alia.

Kiam mi estis baldaŭ endormiĝonta, akra krio subite vekis min. Tuj poste mi aŭdis muzikaĵon el sinsekvo da tiaj krioj. Jan sola laŭte kantis. Kompreneble, li faris tion ne por mi, sed por si mem, por forpeti la dormemon.

Mi neniel povis aŭdi klare, kion li kantis. Sed mi pensis en mi, ke la kantado certe aŭdiĝas malproksime de la altebenaĵo preskaŭ skrapanta la ĉielon. . .


□



La Ŝosea Ponto super Tūotūo-rivero


Prospektoroj ĉe Tūotūo-rivero





Paštejo ĉe Tŭotŭo-rivero

Meteostacio sur la altebenaĵo





Kuracistoj kuracas altebenaĵan malsanon de paŝtistino.

Vojkonstruado sur la altebenaĵo



815N



Tūotūo-rivero